


# **Dr. Márkus Gábor**

## **TRANS LA FLAVA MARO**



Dr. Márkus Gábor - TRANS LA FLAVA MARO

**ISBN 978-963-08-3761-3**

La aŭtoro dediĉas ĉi tiun libron kun dankoj al s-ino Granda (Oh Gi Sook), al la nekonata japana juna viro en la Osaka stacidomo, al la ruĝan vestaĵon kun flava ĉapelo havanta koreino vojaĝanta el Osaka al Busan en la Panstar Dream ŝipo kaj al multaj aliaj amikecaj azianoj kiuj bonkore helpis lin dum sia orientazia vojaĝo.

En ĉi tiu eldonaĵo ĉiuj hungaraj, japanaj, koreaj kaj ĉinaj nomoj aperas en siaj originalaj formoj, do la familia nomo troveblas unue kaj la persona nomo poste. Sekve de tio ekzemple la familia nomo de la aŭtoro estas Márkus kaj lia persona nomo estas Gábor. La ĉi tie represitaj verkoj estis rekonstruitaj de la originalaj verkoj, pere de perkomputila teksto-prilaboro. Hideg Sándor signife kontribuis al la gramatika korekto, la traduko de tekstoj, la bildredaktado kaj la preseja preparlaboro kaj pro tio la aŭtoro sincere dankas.

Eldonite en Budapeŝto, en 2012.

Presejo: Vareg Hungary Kft.

Recenzojn, komentojn kaj rimarkojn bonvolu sendi al la retadreso de la aŭtoro, eldonanto kaj vendisto de la libro

**[dr.markus.gabor@gmail.com](mailto:dr.markus.gabor@gmail.com)**



La Centro por Japanaj Studoj (CJS) en Nanzan Universitato en mezjapana urbo Nagoya, kie la aŭtoro kompletigis sian studprogramon je la komenco de la okdekaj jaroj.





Prof. Dr. Johannes Hirschmeier, SVD, President of the Nanzan University  
(写真提供：南山学園資料室)  
Prof. Dr. Akashi Yoji, Dean and Director of the CJS



## ANTAŬPAROLO

Mi konatiĝis kun la aŭtoro de ĉi tiu libro en la dua parto de la sesdekaj jaroj, kiam li el ebenlanda urbeto kaj mi el transdanubia vilaĝo alvojaĝis al la hungara ĉefurbo por ke ni komencu niajn studprogramojn en la Budapeŝta Ekonomikoscienca Universitato.

Post la fino de sia universitata studprogramo Márkus Gábor ricevis eblecon pro sia lingvoscio de angla, rusa, esperanto kaj japana lingvoj, ke li partoprenu ankaŭ alian studprogramon en Nanzan Universitato en urbo Nagoya. Post la sukcesa kompletigo de sia studado li ricevis doktorecon pro la rezultoj de sia esplorado rilate al la komponentoj de la japana ekonomia evoluo.

En urbo Nagoya antaŭ Márkus Gábor la mondo malfermiĝis. Tie li povis ekkoni el la libroj de Johannes Hirschmeier, la internacie fama profesoro kaj doktoro de Harvard Universitato, kiajn entreprenodirektajn metodojn uzis la japanaj industriaj kaj komercaj organizoj por ke ili povu fariĝi la plej konkurkapablaj organizoj de la mondo en multaj fakterenoj.

Sub la gvidado de profesoro Akashi Yoji, doktoro de washingtona Georgetown Universitato li povis studi kiel Japanio konstruis kaj formis siajn internaciajn rilatojn post la dua mondmilito por ke la lando povu atingi tiun kondukantan rolon en la mondmunkato.

Reveninte al Eŭropo Márkus Gábor kontinue kunlaboris kun diversaj orientaziaj sciencaj kaj kulturaj organizoj. Li invitis prof-rojn Akashi Yoji, Mizuno Yoshiaki, Shen Chenru kaj So Gilsu al Budapeŝto por prelegi en niaj universitatoj pri la komponentoj de la sukcesa japana, korea kaj ĉina ekonomia evoluo post la milito. Li invitis ankaŭ s-ron Ahn Jong-soo (Kara An), la redaktoron de „La Solidareco” por diskuti la socian situacion en Koreio kaj poste ili kune prelegis pri gravaj sociosciencaj problemoj en la korea ĉefurbo, en Seoul.

Post la orienteuropeaj politikaj ŝanĝoj oni konstruis novan demokratian institucio-sistemon en Hungario kaj tiam la aŭtoro fariĝis estro de la parlamenta aŭditora kaj kontrola organizo. En tiu

posteno li gvidis la institucio-evoluigan programon de la parlamenta aŭditora kaj kontrola organizo por ke Hungario povu aliĝi al la Eŭropa Unio.

En tiu laboro li efike utiligis siajn spertojn kaj lingvosciojn, kiujn li ricevis en la japana universitato. Li ne nur kontrolis la registaron, sed per siaj konsiloj, prelegoj kaj artikoloj publikitaj en fakorganoj li ankaŭ helpis la laboron de diversaj registaraj oficejoj.

La vojaĝraportoj de la aŭtoro jam aperis en diversaj lingvoj, inter aliaj ankaŭ japane kun la titolo 赤い太陽と緑の星, kaj ankaŭ koree kun la titolo 황해를 넘어서. Okaze de la japana kaj korea eldonoj de la libro mi dankas al prof-ro Lee Jungkee kaj s-roj Morita Akira, Ho Song kaj Ahn Jong-soo pro iliaj precizaj tradukoj en japanan kaj korean lingvojn de la resumaj ĉapitroj de la libro. Kaj mi kuraĝigas la japanajn kaj koreajn legantojn, ke ankaŭ ili diligente kaj sindoneme studu la eŭropajn lingvojn por ke ni povu pli fruktodone kontribui al la evoluigo de la sciencaj, kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj inter la orientaziaj popoloj kaj la ankaŭ ural-altajan lingvon parolanta hungara popolo, kiu nun vivas en la centro de malproksima Eŭropo.

Mi kun ĝojo konstatas, ke la libro jam aperas ankaŭ en la internacia lingvo kaj mi esperas, ke legante la libron la diverslandaj esperantistoj de la mondo samopinias, ke la lingvolernado efike helpas la evoluigon de la interhoma kompreno kaj amikeco en la nuna mondo.

En urbo Budapeŝto, la 2-an de Septembro, 2012.



A handwritten signature in black ink, appearing to read 'Imre Boros', written in a cursive style.

Dr. Boros Imre  
membro de la unua Orbán ĉefministra registaro,  
ministro sen portfolio, respondecante por  
la unuiĝo al la Eŭropa Unio,  
komisiita ministro por agrikulturo kaj landa evoluigo

## ANTAŬPAROLO AL LA ORIGINALA ELDONO

En nia lando, Hungario la multlingveco havas miljaran tradicion. Kvankam la plebo ĉiam parolis hungare, la oficiala lingvo de la lando ĝis la mezo de la 19-a jarcento estis la latina. Pro tio, ke la lando dum pluraj jarcentoj estis parto de la Habsburga imperio, ankaŭ la kono kaj la uzo de la germana lingvo estis ĝenerala en la publika vivo, eĉ la naciaj minoritatoj de la lando parolis en siaj lingvoj.

Nialande la instruado, kaj ene de tiu la lingvoinstruado ĉiam havis signifan rolon en la publika vivo, kaj danke al tio, niaj sciencistoj povis havi konstantan kontakton kun la spiritaj metiejoj de la okcidenta mondo. Dankeblas al tio, ke la lando, konsidere ties loĝantaron donis la plej multajn Nobel-premiitojn por la mondo.

Post la dua mondmilito la potencaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis, kaj la rusa lingvo estis devige lernenda. Ankaŭ la aŭtoro la rusan lingvon lernis en la bazlernejo, kaj en la gimnazio estis lernendaj la latina kaj la franca lingvoj, kaj en la universitato la des pli mondlingviĝantan anglan lernis. Poste por li eblis fini ankaŭ postdiplomatan programon en japana universitato, por kiu certigis stipendion japana institucio, kiu ligiĝis al la Esperanta Mondorganizo.

El la vidpunkto de internacia komunikado kompreneble en pli facila situacio estas tiuj homoj, kiuj havas unu el la mondlingvoj, kiel gepatran lingvon. Ekzemple por anglo aŭ franco sufiĉas lerni nur la lingvon de la alia nacio kaj jam tuj kapablas uzi la du plej gravajn laborlingvojn de la Eŭropa Unio. Laŭ mezuro en la membrolandoj de la Eŭropa Unio 38% de la plenkreskuloj kapablas paroli angle, kaj 14% germane aŭ france (almenaŭ la demanditoj respondis tiamaniere). 34% de la britoj diras, ke ili alproprigis alian lingvon. Cetere necesas rimarki, ke la lingvoscio havas multajn gradojn: estas homoj kiuj nur baznivele kapablas uzi lingvon kaj estas aliaj, kiuj en la nivelo de gepatra lingvo kapablas komunikiĝi. Krome, se iu iam ellernis lingvon sed poste ne uzas ĝin, sendube li perdas parton de sia lingvoscio dum kelkaj jaroj.

La nun vivanta junularo havas nekompareble pli multe da eblo vojaĝi eksterlanden por labori aŭ partopreni fakajn kaj sciencajn kunvenojn, ol la membroj de la pli maljunaj generacioj. Tiu fakto mem forte instigas la lingvolernadon eĉ en plenkreskula aĝo.

Ekde 2004 Hungario estas membro de la Eŭropa Unio. La plifortiĝantaj ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj kune kun la multaj aliaj rilatoj en diversaj terenoj vekas la deziron en multaj homoj por lerni fremdajn lingvojn. Sekve de tio pli kaj pli multaj homoj havas la deziron lerni novan lingvon aŭ plulerni jam antaŭe lernitan lingvon. Ankaŭ en la institucioj de la Eŭropa Unio (Konsilantaro, Komisiono, Kortumo, Kortumo de Aŭditoroj, ktp.) oni instigas la tie laborantojn plievoluigi ilian lingvoscion aŭ lerni pli novan lingvon.

Eble ŝajnas esti nekredebla, ke dum la lastaj jaroj oni jam anoncas kursojn por lerni ankaŭ hungaran kaj aliajn malgrandajn lingvojn (momente kun malgranda rezulto). Estas tiel, ĉar nuntempe jam ankaŭ en la centroj de la Unio estas bezonata lingvoscio de aliaj lingvoj krom la angla kaj la franca. La kialo estas, ke oficistoj el la diversaj servoj de la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj tre ofte vojaĝas al la membroŝtatoj kun la celo por prepari decidojn aŭ kontroli kaj aŭditi dokumentojn kaj la plejmulto de tiuj dokumentoj troveblas nur nacilingve (kaj tute ne en la oficialaj laborlingvoj de la Eŭropa Unio).

La aŭtoro de ĉi tiu publikaĵo, Márkus Gábor pro sia studado kaj laboro vojaĝadis en multaj lokoj tra la mondo de Tokio tra la araba mondo ĝis Novjorko (New York) kaj lia lingvoscio grave plifaciligis por li, ke li povu konstrui rektajn interpersonajn kontaktojn kun la homoj vivantaj en la vizititaj lokoj. Pere de tio li povis pli bone kaj pli profunde ekkoni la mondon, en kiu ni vivis je la fino de la dudeka jarcento kaj pri siaj travivaĵoj kaj spertoj li verkis diversajn gazetraportojn, studojn kaj eseojn en diversaj lingvoj.

En tiu ĉi publikaĵo estas kolektitaj kelkaj verkoj de la aŭtoro, en la lingvoj, en kiuj ili originale ekaperis, do: hungare, japane, ĉine, koree, angle, svede kaj esperante. Kuraĝigu tio ĉi la legantojn alproprigi krom la eŭropaj lingvoj ankaŭ la pli ekzotikajn ekstre-



orientajn lingvojn kaj ankaŭ la interpopolan interkompreniĝon antaŭhelpi celitan Esperanton. Laŭ la ĉi tie publikigitaj verkoj ankaŭ tiu ĉi povas esti utila ilo por la evoluigo de la internaciaj sciencaj, kulturaj kaj ekonomiaj interrilatoj.

Ĉiam estas homoj, kiuj ellernas lingvon nur pro la beleco kaj intereseco de la lingvo kaj pro la eblo pli bone kompreni la vivon kaj la pensmanieron de la popoloj, kiuj uzas tiun lingvon kiel gepatran lingvon. Kiam tiuj homoj decidas ellerni novan lingvon, ili tute ne pensas pri la eblo, ke la nova lingvoscio povos alporti ankaŭ profiton por ili. Por ilustrati tiun fenomenon mi rememoras veran dialogon. Mia brita kolego, kiu jam dum longaj jaroj vivis en Luksemburgo, decidis aliĝi al lingvokurso por lerni luksemburgan (Lëtzebuergesch) lingvon. Estas konate, ke tiu lingvo, kiu apartenas al la mosela franka dialekto de la germana lingvo, estiĝis unu el la oficialaj lingvoj de Luksemburgo nur en la jaro 1984. Pro la tro altaj kostoj oni samtempe rezignis deklari tiun lingvon kiel oficialan lingvon de la Eŭropa Unio, kaj estas interese, ke nur malpli, ol tri kvarono de la loĝantaro parolas tiun lingvon, kiuj vivas en la Luksemburga Duklando. Tiuj alilandanoj, kiuj ne intencas vivi dum sia tuta vivo en tiu lando, kutime ne ellernas tiun lingvon eĉ bazgrade. Pro tio mi demandis mian kolegon, kial li tamen decidis lerni la lingvon. Responde li, kiu jam ankaŭ germane kaj france bone parolis, jene diris: Akrigi la intelekton.

En urbo Budapeŝto, la 25-an de Septembro, 2011.



A handwritten signature in black ink, which reads "Halász Gejza Zsolt". The signature is written in a cursive, flowing style.

**Halász Gejza Zsolt**

**la unua hungara membro de la  
Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj**

## ENKONDUKO

En la jaro 1968 Japanio fariĝis la dua plej granda ekonomio de la mondo. Pro tio multaj ekonomistoj vojaĝis al la ekzotika orientazia lando por studi la kialojn de tiu fenomeno, do por kompreni la kialojn de la japana ekonomia miraklo. Ankaŭ la aŭtoro de ĉi tiu libro havis eblon por studi tiun temon en Nanzan Daigaku, internacie konata universitato en mezjapana urbo Nagoya. Li, kiel eŭropa studento vojaĝis al la Lando de le Leviĝanta Suno en 1982, kaj post la fino de sia studprogramo li revojaĝis al Hungario en 1984.

Dum sia studprogramo li bone konatiĝis kun la socia vivo de la orientazia lando. Li vivis en budisma monaĥejo proksime al Kyoto, la malnova japana ĉefurbo, partoprenis sciencajn konferencojn en multaj lokoj, prelegis angle en sociosciencaj konferencoj, japane en la Rotary Club kunvenoj kaj ankaŭ en la internacia lingvo en la kunvenoj de la loka esperantista komunumo.

Pri siaj spertoj kaj travivaĵoj li verkis pli ol 150 librojn kaj artikolojn, kiuj aperis en diversaj lingvoj dum la lastaj jardekoj. La unuaj raportoj pri lia studenta vivo aperis en hungara lingvo jam kvarfoje en diversaj kulturaj, fakaj kaj sindikataj ĵurnaloj kaj en la unua parto de ĉi tiu libro tiuj verketoj legeblas jam ankaŭ en esperanto.

En tiuj verketoj la aŭtoro enkondukas la eŭropajn legantojn al la multkolora japana socia vivo dum la fino de la lasta jarcento. Tiam la vivnivelo en Japanio jam fariĝis tre alta, tamen la maljunuloj ankoraŭ bone rememoris la malriĉecon post la malvenkita milito kaj bone konservis la multcentjarajn kulturajn tradiciojn.

Dum la lastaj tri jardekoj Márkus Gábor efike uzis la spertojn, kiujn li ricevis en sia japana universitato, doktoriĝis en la japana ekonomio kaj prelegis pri tiu temo en multaj landoj de Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Afriko. Lian domon en Budapeŝto ofte vizitis diversnaciaj orientaziaj vojaĝantoj kaj li ofte invitis ilin al sia universitato por prelegi kaj tiamaniere kontribui al la scienca kaj kultura interŝanĝo inter la okcidenta kaj la orienta mondo.

En 2012 li revojaĝis al sia universitata urbo, al Nagoya kaj rigardis, kiel la urbo kaj la universitato ŝanĝiĝis dum la lastaj tridek jaroj. Dum tiu nova orientazia vojaĝo Márkus Gábor vizitis ankaŭ Sudkoreion. Li partoprenis internacian meditadan renkontiĝon en la centro de la ŭonbulisma eklezio en urbo Iksan kaj poste pasigis kelkajn semajnojn ankaŭ en Busan, en la fama korea havenurbo.

La aŭtoro al kutimiĝis al modesta vivo en Eŭropo, ĉar en sia juneco li vivis en vilaĝo en harmonio kun la naturo kaj la medio. Pro tio la moderna, riĉa kaj luksa vivmaniero en Nagoya kaj ankaŭ en Seoul ŝokis lin. La 40-etaĝaj ĉielskrapantaj grandaj konstruaĵoj estis tro strangaj por li.

Li preferis vivi en pli malgrandaj urboj: en Iksan kaj en la Jagalchi distrikto de Busan. Pri siaj pensoj kaj sentoj li prelegis en vilaĝa komunumo de Seoul kaj tiu prelego kune kun la artikolo pri siaj impresoj de la meditada renkontiĝo troveblas en la dua parto de la libro.

Revojaĝante al Japanio post multaj jaroj la redaktoro de *“La Revuo Orienta”* petis, ke li resumu siajn spertojn por la tokia ĵurnalo kaj klarigu, kiel li sukcesis utiligi la rezultojn de sia studprogramo en la japana universitato. Lia ese aperis en la japana ĵurnalo kun la titolo *“Ponto inter homoj kaj popoloj”* kaj tio reaperas ankaŭ en ĉi tiu libro.

Post kiam li vizitis la prezidanton de sia universitato en Nagoya, oni aperigis artikolon pri tiu evento en la Buletino de Nanzan Universitato en japana kaj angla lingvoj. Ankaŭ tiu artikolo reaperas en tiu libro en angla lingvo, ĉiuj aliaj artikoloj estas skribitaj en la internacia lingvo.


La aŭtoro ricevis tre bonajn impresojn kaj spertojn en la ŭonbulisma kultura kaj religia centro kaj pro tio li decidis revojaĝi al Iksan por partopreni ankaŭ la 2013-a-jaran meditadan kunvenon. Tie en mallonga prelego li koncize resumos la fiziologian, moralan, spiritan kaj socian efikojn de la ŭonbulisma meditada metodo. La titolo de tiu prelego estas *“Interna harmonio kaj ekstera paco”*. Tio estas la lasta ĉapitro de tiu ĉi libro.

Ni, la estroj de la pli, ol centjaraĝa Hungaria Esperanto Asocio kun

ĝojo kanstatas, ke D-ro Márkus Gábor efike uzis kaj uzas ankaŭ la internacian lingvon en sia faka kaj profesia agado. Kiam li estis la strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo, same kiam li estis estro de nia parlamenta kontrola kaj aŭditora organizo, li ĉiam serĉis la eblojn por konstrui fortajn kaj viglajn internaciajn rilatojn en sia faktereno.

Per liaj prelegoj kaj artikoloj, kiuj nun estas reaperigitaj, evidentiĝas, ke en la dudekunua jarcento krom la angla, rusa, franca, ĉina, ktp. mondlingvoj ankaŭ la facile lernebla, neutrala internacia lingvo estas bona kaj taŭga lingvo por pligrandigi la internacian kulturen interŝanĝon. Pro tio ni kun ĝojo subtenas la eldonon de tiu ĉi libro.

En urbo Budapeŝto, la 24-an de Septembro, 2012.



Szabó Imre  
prezidanto



Nagy János  
vicprezidanto



# Unua Parto

## STUDENTA VIVO EN JAPANIO



Unryu Biru (Palaco de la Dragono de la Nuboj), kie la aŭtoro vivis dum la unuaj semajnoj de sia studenta vivo en urbo Nagoya

## HELPE DE STIPENDIO “VERDA STELO” EN JAPANA UNIVERSITATO

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi jam sufiĉe bone parolis la anglan lingvon, mi decidis lerni ankaŭ esperanton, la internacian lingvon. Tiam mi ne povis eĉ revii, ke ĝuste helpe de la internacia lingvo mi povos vojaĝi al Japanio, eĉ rilate al mia profesio kiel matematikisto kun tiurilata stipendio.

Tamen okazis tiel, ĉar nuntempe, en la okdekaj jaroj esperanto jam komencas disvastiĝi ankaŭ en la sciencaj rilatoj. Parto de tiu fenomeno estas la fakto, ke nun jam estas ebleco akiri ankaŭ esperantrilatan sciencan stipendion por fakuloj, kiuj parolas la internacian lingvon. Inter tiuj eblecoj estas plej altranga la nuna japana stipendio. Ĝin funkciigas entrepreno Verda Stelo (Ryokusei Kigyo Kabushiki Kaisha) en japana urbo Nagoya. Tiu kultura entrepreno, servanta ankaŭ la celojn de la japana esperanto-movado, pagas la kostojn de studprogramo en japana universitato.

La celo de la stipendio estas duobla. Tio intencas ebligi por junaj fakuloj, ke ili profundigu la konojn en siaj fakoj. Samtempe la stipendio celas helpi la alilandanojn, ke ili konatiĝu kun la japanaj kulturaj valoroj. Tiamaniere oni intencas kontribui al la evoluigo de la kulturaj kaj sciencaj rilatoj de esperantistoj vivantaj en diversaj landoj.



Waseda Yutaka en amikeca rondo kun UEA estraranino



## Letero de Waseda Yutaka

La stipendion ricevi ne estas facile, akiri ĝin necesas sufiĉe longa tempo. Antaŭ ĉio la petantoj devas akiri anticipan permeson de pluraj ministerioj kaj ili devas konformi al la rigoraj akceptaj kondiĉoj de la japanaj universitatoj. Se ĉio ĉi estas en ordo, tiam la japana ministro pri justeco eldonas la vizopermeson. Tial estis granda ĝojo por mi ricevi la leteron laŭ mia kandidatiĝo de sinjoro Waseda Yutaka, en kiu oni informis min pri ricevo de stipendio Verda Stelo por la jaro 1983.

Tiun stipendion ĝis nun ricevis tri personoj. Unue en 1981 israela studento ricevis la subtenon, sed ĉar li ne taŭgis al la rigoraj kondiĉoj de la universitato, sinjoro Waseda ĉesigis la daŭrigon de la subvencio. (Kiel poste klariĝis, la israela studento estis hungardevena judo, lia nomo estas Halász Tamás... Jen kiom malgrandas la mondo.) En jaro 1982 argentina instruisto ricevis la stipendion por duonjara studado. Ĉijare mi ricevis tiun unikan eblon plustudi en japana universitato. Por efike plenumi miajn taskojn en la universitato mi jam preparis min en Hungario. Ankoraŭ en Budapeŝto mi jam komencis studi la tre malfacilan japanan lingvontre entuziasme. Mi pensis, ke eĉ se mi ne ricevos la stipendion, tamen ankaŭ tiukaze la japana lingvokono estos utila en mia vivo.

Mi tre fidis, ke miaj studrezultoj ebligos la daŭrigon de miaj studoj, kvankam studi en japana universitato estas tre malfacila tasko por hungara studento. Por eŭropanoj grandan problemon kaŭzas la lingvaj malfacilaĵoj. Kelkaj studobjektoj estas anglalingvaj en la universitato kaj kelkajn aliajn oni instruas en la japana lingvo. Kvankam en Hungario mi studis la britan anglan lingvon, en Japanio la angla signifas la usonan anglan. Krom tio mi povas partopreni ankaŭ en la agado de la grandtradicia Nagoja Esperanto-Societo, kie mi devas paroli la internacian lingvon. Tio signifas, ke mi devas uzi samtempe tri lingvojn kaj nek unu el ili estas mia gepatra lingvo.

Ĉar laŭ la kondiĉoj la vojaĝkostojn mi mem devas pagi tien kaj reen, mi klopodis elekti la plej malmultekostan vojaĝversion. Laŭ tio mi

ekvojaĝis la 14-an de decembro per trajno Tisza Ekspres al Moskvo kaj de tie per Transsiberia Ekspres mi pluvojaĝis al urbo Habarovsk. Tie mi denove ŝanĝis trajnon kaj per la tria trajno mi pluvojaĝis al urbo Nahodka. Tie mi enŝipiĝis kaj la 26-an de decembro (post preskaŭ dusemajna vojaĝo) mi alvenis al Jokohama, la granda japana havenurbo en pluva posttagmezo. La ŝiplinion funkciigis la Far-Eastern Shipping Company (ruse: Dalnevostoĉnoe Parahodstvo). Tie mi aĉetis lokon en la plej malmultekosta kajuto, en la 6-a klaso. Sed en la ŝipo la kapitano diris, ke tiom malmulte da pasaĝeroj estis en la ŝipo, ke sendepende de la aĉetita bileto, ĉiuj vojaĝantoj okupu lokon en unua-klasa kajuto.

## **Novzelanda kunvojaĝanto – en minijupo**

En la Transiberia Eksprestrajno estis tre interesa miksita societo, plejparte diversnaciaj gejunuloj vojaĝis el Eŭropo al Japanio tiamaniere. Dum la sep tagoj de la vojaĝo ni pasigis la plej multan tempon en la manĝosalono. Tiel ni povis bone konatiĝi unu kun la alia kaj ni baldaŭ bone amikiĝis. Okazis, ke mi vojaĝis en komuna kupeo kun juna brita paro kaj ankaŭ la manĝojn ni havis ĉe la sama tablo. Ni kaŭzis surprizojn unu al la alia reciproke. Ili ekzemple estis surprizitaj, kiam ili eksciis, ke la uzadon de drogoj mi ne trovas bona afero kaj mi neniam volas provi ilin. Poste ankaŭ aliaj aliĝis al la babilado kaj la plimulto opiniis, ke la tielnomatajn fortajn drogojn oni vere devas eviti, sed la molaj drogoj estas bezonataj.

En la kompanio de la kunvojaĝantoj juna novzelanda ĵurnalistino estis interesa kaj bunta fenomeno. Ŝi vojaĝis dum vintro tra Siberio en minijupo kaj ĉiam, kiam la trajno haltis, ŝi elsaltis el la vagono por ĵetadi neĝbulojn. En la najbara kupeo franca fraŭlino sidis, kiu antaŭe provis konatiĝi kun la mistero de Oriento en monaĥejo en Sri-lanko. Sed kiam ŝi eksciis, ke ŝi devus ĉesi la fumadon, ŝi decidis forlasi la monaĥejon. Nun ankaŭ ŝi vojaĝis al Japanio por studi artojn. En Habarovsk usona fraŭlino (el Hawaii) aliĝis al nia societo.

Kiam mi menciis dum babilado, ke mi vojaĝis al unujara studvojaĝo al Mezjapanio helpe de stipendio de esperanto organizo, kelkaj konfesis, ke ili eĉ ne sciis kio Esperanto estas. La plimulto opiniis, ke

ĝi estas ia „eŭropa lingvo”. Mi klarigis, ke esperanto estas lingvo, kies lernintoj estas partoprenantoj de internacia tutmonda movado. La movado celas evoluigi la interpopolan interkompreniĝon kaj intencas helpi la atingon de aliaj similaj noblaj celoj. Mi emfazis, ke tiu movado hodaŭ jam havas efikajn rimedojn por evoluigi la junularan turismon kaj disvastigi ankaŭ la internacian sciencan kaj kulturan rilatojn. Laŭ ilia interesiĝo post mia klarigo kelkaj tuj decidis aliĝi al la movado. (Unue la angla paro) Sed la novzelanda ĵurnalistino diris, ke ŝi parolas flue angle kaj france kaj pro tio por ŝi ne necesas lerni trian lingvon.

### **Jen 30 mil jenoj por vi...**

Intertempe la ŝipo komencis proksimiĝi al la haveno de Jokohama. La oficioj de la Japana Enmigra Oficejo venis en nian ŝipon por kontroli la dokumentojn de la vojaĝantoj. Laŭ mia plej granda surprizo la unua japana oficiro, kiun mi renkontis en la ŝipo demandis: ĉu mi estas s-ro Márkus Gábor.

Kiam mi jesis, tiam li sen pliaj vortoj transdonis al mi koverton. En tiu koverto mi trovis 30 mil enojn kaj leteron de s-ro Waseda Yutaka, direktoro de Entrepreno Verda Stelo. En la letero li salutis min okaze de mia alveno al Japanio. Li skribis, ke se mi volas iri tuj al Nagoya, tiam li akceptas min elkore en tiu urbo. Sed se mi volas resti dum unu nokto en Jokohama, mi povas fari ankaŭ tion. Por tiu kazo li sendis telefonnumeron al mi en la koverto kaj klarigis, ke li jam preparis tranokteblon por mi en Jokohama. Do, se mi telefonas, la japanaj esperantistoj jam scias pri mi kaj ili gastigos min. Vidinte tion miaj kunvojaĝantoj apreze gratulis al mi dirante „That's great!” (Superege!) Ankaŭ tiuj opiniis tiel, kiuj komence dubis pri la praktikaj utiloj de la tutmonda esperanto-movado.

Dum la sama tempo la amerika fraŭlino (el Hawaii) povis senti sin iom malfeliĉa ĉar sur ŝian vizon iu erare ŝtampis la vorton „VOID” (nevalida). Pro tio la enmigra oficejo ne permesis ŝin eliri el la ŝipo en la Jokohama haveno. Ŝi devis pluvojaĝi al Hong-Kong per la sama ŝipo kaj tie dum 1-2 tagoj ŝi devis aranĝi la validigon de sia japana vizo kaj poste per la sama ŝipo ŝi povis reveni al Jokohamo.

Sed tio kostis al ŝi du semajnojn da tempoperdo kaj multe da mono.

Intertempe mi rigardis la albordiĝon de la ŝipo, kiam iu komencis kriadi mian antaŭnomon sur la bordo. Mi ekvidis, ke mia korespond-partnero kaj amiko Naoshi Endo venis al la haveno por akcepti min. Li komencis kribi al mi de la kajo en angla lingvo, ke mi restu ĉe li ĝis la fino de la jaro. Post mia albordiĝo ni parolis kelkajn minutojn en la atendejo, kiam alvenis al mi juna paro kun eta verda flago en la manoj. Ili diris al mi, ke ili estas fondintaj membroj de la Japana Esperantista Komputista Fakgrupo, ili loĝas en Jokohama kaj mi povus loĝi ankaŭ ĉe ili ĝis mia pluvojaĝo al Nagoya.

Miaj kunvojaĝantoj intertempe jam disiĝis kaj nur la novzelanda ĵurnalistino kuradis nerveze de unu telefonbudo al la alia. Klariĝis, ke ŝia angleparolanta konato ne estis hejme kaj neniu el ties familianoj komprenis angle, aŭ france. Fine mi petis miajn esperantistajn komputistajn geamikojn akompani ŝin al la domo de lia amiko kaj mi decidis akcepti la inviton de mia tokia amiko. Tiel mi pasigis kelkajn tagojn en la ĉefurbo.

## **Noktomeze en ŝinto-sanktejo**

Mi alvenis al Nagoya la 31-an de decembro en la tagmezaj horoj per trajno „Hikari” (Lumo) superekspreso kies rapideco estas 220 kilometroj hore. Post mia alveno ni iris tagmanĝi en novan restoracion de la urbocentro kune kun s-ro Waseda kaj fama japana verkisto. Poste la vicprezidanto de la Nagoja Esperanto Centro telefonis al ni. Li diris, ke li aŭdis pri mia alveno al Japanio, kaj ĉar li loĝas en la proksimo, li vizitos min post kelkaj minutoj.

Tiel mi pasigis la lastan vesperon de la jaro kun li, ni rigardis televidon kaj noktomeze laŭ malnova japana kutimo ni vizitis unu el la famaj ŝintoismaj sanktejoj. Tie estis nekredible granda homamaso. Policianoj direktis la fluon de la amaso per laŭtparoliloj kaj koloraj lampoj kaj ili sukcesis certigi la moviĝon nur per 4-5-minutaj kordonoj. Post du tagoj la televido montris la statistikon, laŭ kiu la koncernan sanktejon vizitis 2 360 000 homoj dum la novjaraj festoj kaj en tuta Japanio 80 milionoj vizitis la sanktejojn.

La venontan tagon s-ro Niwa vizitis min. Li estas junece moviĝanta mezaĝa viro, konsilanto de la alia esperanto organizo de la urbo. Tio estas la Nagoja Esperanto Asocio, kiu estas tute sendependa de la Nagoja Esperanto Centro. Mi ne volis kredi, kiam li diris, ke li estis 70-jaraĝa kaj en la esperanto-movado li komencis labori antaŭ 50 jaroj. Mi povis fari kun li pli grandajn ekskursojn dum la venontaj tagoj. Ni vizitis japanan kuracbanejon, kie la homoj banas sin tute nude. Laŭ mia akompananto mi estis la unua kaj la sola eŭropano dum la historio, kiu vizitis tiun lokon. Krom tio ni vizitis ankaŭ alian faman saktejon fonditan en la 8-a jarcento, kiu estas nacia trezoro.

Tiuj estis la unuaj tagoj post mia alveno en la Lando de la Leviĝanta Suno. Pri la daŭrigo mi regule raportos en la venontaj numeroj de la hungarlingva revuo „Világ és nyelv” (Mondo kaj Lingvo). Mi ŝatus prezenti per tiu artikolserio trarigardon pri la ĉiutaga vivo de diligenta popolo de fora lando, pri la kulturaj valoroj kaj tradicioj de la Oriento kaj pri la kutima vivo de studentoj en fama japana universitato, kiu jam estas konata ankaŭ en pluraj landoj. Krome, mi ŝatus skribi ankaŭ pri la agado de la japana esperanto-movado kaj montri la agadon de tiu organizo en la pacmovado kaj en la socia, kultura, scienca kaj religia institucioj. Mi esperas, ke legante la raportserion la valoro, utileco kaj la morala forto de la esperanto Movado bone klariĝos por la legantoj.



# 南山大学

## LA GRANDA LERNEJO DE LA SUDAJ MONTETOJ.

La Nanzan Universitato troviĝas en kvartalo Ĉiela Harmonio (alikoncepte: Perfekta Paco) en la suda parto de la dumiliona urbo Nagoya. La nomo de la universitato estas priskribebla per la kvar ĉinaj ideogramoj en la titolo kaj laŭvorte signifas „Granda Lernejo de la Sudaj Montetoj”. Verdire la tria signo mem signifas „granda”, kaj la kvara „lernejo”, sed tiuj du ideogramoj kune havas alian signifon. Ili kune signifas „universitato”. Tion komprenas kaj la japanoj kaj la ĉinoj, kvankam la prononco de la du nocioj estas tute alia en tiuj lingvoj.

Estas rimarkeble sama profunda logiko en la kazo de la kvara signo. La suba parto de la signo similas al stiligita bebo, aŭ infano. Sed se super la infanon ni desegnas stiligitan tegmenton, tiam la kombinita signo jam havos novan memstaran signifon, nome „lernejo”. Tiu signo estas komprenata ĉie en la Ekstremoriento, kvankam ĝi estas tute aliel prononcata en Ĉinio kaj Japanio. Eĉ ankaŭ ene de Ĉinio estas signifaj diferencoj inter la dialektoj. Tio estas komprenebla fenomeno, ĉar foje-foje estas mil kilometroj inter la diversajn dialektajn parolantaj homoj en tiu granda lando. Tiuj homoj do ne komprenus la fonetikan transskribon simplan por eŭropanoj, sed laŭ la signifo de la signoj ili facile komprenas unu la alian, eĉ se tion ili ne povas perfekte legi.

### **Elektebla taksa sistemo**

La universitato estis fondita en 1949 kaj nun studas tie 5000 studentoj en la filozofia, eksterrilata, ekonomia kaj entreprenodirekta fakultatoj. La Centro por Japanaj Studoj estas integra parto de la universitato establita por eksterlandaj studentoj en 1974. Nun estas



studentoj el 25 landoj de Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Aŭstralio, sed tiu cifero ĉiujare pli altiĝas.

Laŭ la dekretoj de la tokia eduka ministerio plentempaj studentoj povas ricevi 14-18 kreditajn poentojn po semestro. Unuhora studunuo semajne valoras unu krediton se la studento plenumas ĉiujn ekzamendevojn kaj ne forestas sen pruvilo. Kiu ne atingas la minimumajn 14 kreditojn ties studentan vizon la Enmigra Ministerio aŭtomate nuligas.

La studobjektojn – en certaj limigoj – ĉiu studento mem elektas. La plej grava limigo estas por ĉiuj plentempaj studentoj lerni la japanan lingvon kaj estas kelkaj senkreditaj devigaj studobjektoj. (Ekzemple tia estas la ekzerco de la ĉinaj ideogramoj.)

La taksado de kreditaj studobjektoj estas laŭ la anglosaksa pritaksa sistemo. Laŭ elekto ĉiuj studentoj rajtas decidi: ĉu ili elektas la „Pass-Fail” (trapis-malsukcesis), aŭ la „grade” (laŭgrada) sistemon. En la laŭgrada sistemo oni distingas kvin diversajn nivelojn per literoj A, B, C, D, F. En tiu sistemo „A” estas la plej bona, „F” la malsukcesa.



Krom la studado la aŭtoro regule partoprenis ankaŭ diversajn kulturajn programojn. En la foto li parolas en mezjapana televidprogramo.

## Direktita memstara esploro

La instruado komenciĝas ĉiutage je la naŭa, antaŭtagmeze okazas lingvokursoj. En la posttagmezaj horoj okazas prelegoj pri diversaj terenoj rilate al la japana scienca kaj kultura vivo, pri la direktado de ekonomio, artoj, ktp. Krom tio ankaŭ estas eblo studi specialajn problemojn kadre de t.n. direktita memstara esploro sub gvido de profesoro (ekzemple pri la evoluaj tendencoj de komputado). En la klasoj estas kutime malpli ol 10 studentoj. Tiel la instruistoj post unu-du monatoj persone konas kaj daŭre zorge helpas la laboron de ĉiuj studentoj. Rezulte de tio la efikeco kaj la nivelo de la instruado estas tre alta.

La alvenaj motivoj de transoceanaj studentoj estas tre variaj. Unu forta kaŭzo estas la studado de la japanaj metodoj por direktado de la ekonomio. La japana ekonomio evoluis tre dinamike en la lastaj 25-30 jaroj, kaj laŭ certaj opinioj hodiaŭ la estonto de multaj sud-orient-aziaj landoj multe pli dependas de la rilatoj al Japanio ol dependis en la tempo kiam la japanaj militŝipoj de la Flava maro ĝis la indonezaj bordoj regis la tutan grandegan terenon.

La kono de la japana ekonomia evoluo estas utila fona informo por ekonomiistoj de tiuj landoj, kiuj serĉas la eblojn eniri la japanan merkaton, kiuj provas defendi la hejman industrion kontraŭ la kreskanta kvanto de malmultekostaj japanaj varoj kaj fine por tiuj, kiuj intencas venigi pli grandan japanan helpon kaj kapitalon en sian landon. Laŭ tiu celo venis en Japanion por unu jaro samtempe kun mi Krailoes KanvivadhanakuI, tajlanda studento pri ekonomio kiu jam atingis gradon BA en la Universitato de Bangkok (t.e. la unua grado en la anglosaksa universitata sistemo) kaj aktuale li laboras pri sia disertacio por atingi gradon MA.

Roberts Rhonda venis al Nagoya kun alia celo. Ŝi partoprenis kun ni en la japanaj lingvokursoj kaj posttagmeze ŝi instruas jogon en la Oki Jogo Dojo Centro. Instruante tie ŝi samtempe ankaŭ pristudas la laboron de la grandtradicia jogo-trejna centro.

La saman lingvokurson vizitas luksemburga virino edziniĝinta al

japano kaj usonanino, kiu jam akiris plurajn artajn diplomojn en diversaj amerikaj altlernejoj. Kadre de pli altnivela scienca poststudo ŝi nun studas la teknikon de japana liniogvidado en la Nagoja Arta Altlernejo. La gepatroj de tiu ĉi studento estis hungare parolantaj judoj en hungara regiono Subkarpatio. Ili enmigris en Usonon antaŭ la dua mondmilito. La knabino jam naskiĝis en la usona urbo Chicago kaj nek unu vorton ŝi scias hungare. Sed por komplezi al siaj gepatroj ŝi petis min sendi mesaĝon al ili en ilia gepatra lingvo per magnetofona kasedo.

La lernado de la japana lingvo estas tre malfacila malgraŭ ĉiuj klopodoj de niaj tri lingvointrusistinoj: Ichikawa, Ban kaj Akamatsu sensei. En tiu kazo ne estas aplikebla ekzemple la metodo, per kiu oni povas instrui dum kvin minutoj nombri ĝis 1000 esperante. Ĉi tie eĉ post unu kaj duonmonata lernado neniu el ni povas nombri ĝis 10, ĉar en la japana lingvo oni devas uzi aliajn vortojn por libroj, gazetoj aliajn por pomo, piro kaj similaj fruktoj kaj pliajn aliajn por la tagoj de la monato kaj tute aliajn por vivantaĵoj.

En la nuntempa japana lingvo tri diversaj skribsistemoj estas uzataj. Du el ili servas por skribi silabojn kaj la tria la tradiciajn ĉinajn ideogramojn. La malfacilaĵojn pligrandigas la fakto, ke eblas legi ĉiujn ĉinajn ideogramojn en du diversaj manieroj, unu ĉina kaj alia japana. Oni devas lerni ambaŭ, ĉar la prononco de ambaŭ legmanieroj estas bezonata.

La gramatika strukturo de la japana lingvo signife diferencas de la lingvoj uzataj en Eŭropo kaj por mi estis agrabla surprizo vidi, ke la frazkonstruo laŭ certaj vidpunktoj similas plej bone al la hungara lingvo.

La plej signifa simileco videblas en tio, ke nek en la hungara, nek en la japana estas uzataj prepozicioj, nur postpozicioj, sufiksoj, signoj, derivaĵoj kaj ankaŭ la genitivo estas uzata similtiere en ambaŭ lingvoj.

## **Trejnocentro kaj cent diversaj universitataj kluboj**

Tria lingvouza simileco estas la fakto, ke en ambaŭ lingvoj unue la

familia nomo kaj due la antaŭnomo estas uzata. Apud tiuj similaĵoj estas tamen ankaŭ abundaj diferencoj, tial la ellerno de la japana lingvo bezonas grandan forton ankaŭ de hungaraj studentoj.

Krom la studado kompreneble ankaŭ por sporto kaj amuziĝo restas tempo. Bonegaj sportejoj de la universitato ebligas diversajn aktivecojn por la korpa ekzekcado. En la 44 mil kvadratmetra sportejo troviĝas gimnastikejo, klubejo, trejnocentro funkcia dum 24 horoj, 50-metra naĝbaseno, dromoj por atletiko, teniso kaj basbalo.

Agrablaj kaj utilaj libertempejoj estas la universitataj klubejoj. En Nanzan Universitato funkcias pli ol 100 kluboj. Sed mi decidis, ke en la unua semestro mi ne partoprenos en la kluba vivo. Anstataŭ tio mi vizitos la kunvenojn de la du lokaj esperantistaj societoj, kaj ankaŭ kelkajn aranĝojn de la Japana-Orienteŭropa Amika Societo.

La societo klopodas plifortigi la kulturajn kaj amikajn rilatojn de fore loĝantaj popoloj surbaze de internaciistaj principoj, por konatigi la kulturajn rezultojn de eŭropaj popoloj al la loĝantoj de la urbo. Tiuj kulturaj eventoj estas sufiĉe intenzivaj. En marto ekzemple en kinejo de la urbo hungara filmo estis projekciita kaj fine de la monato la Budapeŝta Filharmonio gastrolis ĉi tie. Krom tio, akceptante la inviton de diversaj esperantistaj organizoj mi ankaŭ prelegas en sciencaj kaj kulturaj aranĝoj en diversaj urboj. Sed pri tio mi rakontos pli detale en alia artikolo.



La aŭturo kun siaj samklasanoj studas la japanajn kaligrafiojn en la Centro por Japanaj Studoj



La Sankta Petro kaj Paulo katedralo en urbo Nagoya

# **BAMBUDANCO KAJ DRAMOJ EN LA SANKTEJO**

La printempa ferio en la universitato okazis inter la 19-a de marto kaj la 10-a de aprilo, kaj dum la tago antaŭ ĝia komenco estis la dua skriba ekzameno el la japana lingvo. La studado de la japana lingvo estas devo por ĉiuj alilandaj studentoj. Malgraŭ la grava afero multe da studentoj kolektiĝis posttagmeze antaŭ la ekzameno en la salono de Mainichi Building Kokusai, vid al vide al la ĉefstacidomo, kie tiam okazis la unua Mondfestivalo en Nagoya. Krom la diversaj amuzaj programoj ĉiuj partoprenantoj senpage ricevis sandviĉon kaj rajtis telefoni dum tri minutoj (tra telekomunika sistemo per artefarita satelito) en iu ajn landon de la mondo.

## **La falsa komuniko de artefarita satelito**

Iĝis gaje, kiam franco volis telefoni al sia familio en Parizo, sed pro falsa komuniko angle parolanta virino respondis el Aŭstralio. Sed mi el distanco de 12 mil kilometroj pli facile povis paroli kun mia hungara ĉefo kiel el mia hejmo, en strato Garay, kiu troviĝas kelkajn kilometrojn fore de mia laborejo kaj tamen la voĉo apenaŭ aŭdeblas.

Fine de la programo la entreprenemaj amantoj de la movokulturo povis provi sian kapablon en bambudanco. Tio signifas, ke oni devas danci laŭ rapidritma muziko, orienta melodio inter du bambustangoj, kiuj estas batitaj unu kontraŭ la alia kvarfoje dum unu minuto. La festivalo ebligis kompreneble havigi ankaŭ amikajn, sciencajn, fakajn kaj komercajn rilatojn. Sed mi ne havis tro da emon por tio, ĉar ĵuste antaŭe mi ricevis leteron de la redakcio de iu hungara science faka revuo, en kiu mi estis petata sendi artikolon pri komputotekniko.

Pro tio mi volis foriri pli frue, sed ĉe la elirejo mezaĝa japana viro demandis, kial mi rapidis. Mi rakontis, ke mi devis skribi artikolon pri la rezultoj de la japana komputotekniko. Li prezentis sin kaj sciigis al mi, ke li laboris en la komputoteknika fabriko National kiel inĝeniero kaj feliĉe li havis ĉe si kelkajn katalogojn pri la evoluigaj



rezultoj de la fabriko. Li aldonis, se tio ne sufiĉus, mi vizitu la fabrikon, kie mi povos havi personajn spertojn. Tiel la unua Mondfestivalo en Nagoya iĝis pli fruktodona ol mi tion esperis.

Sed ne estis tiel sukcesa mia ekzameno la sekvan tagon, kie anstataŭ la maksimumaj 100 punktoj mi atingis nur 96. Kvankam tio sufiĉis por la kvalifiko “elstara”, mi tute ne estis kontenta. Post la ekzameno mi tuj entrainiĝis, pli precize per la ekspresa longdistanca aŭtobuso apartenanta al Japanaj Ŝtataj Fervojoj, mi vojaĝis al Kameoka, transbusiĝante en Kyoto.

## **En la ŝintoa religia kultura organizo**

Tiu ĉi urbo estas la centro de la ŝintoa religia kultura organizo Oomoto. Ĉi tie okazis inter la 19-a kaj la 21-a de marto la tritaga kultura kunveno, organizita de la Esperanto Propaganda Asocio (EPA), la “Printempa Kunloĝado”. Kameoka, same kiel Yokohama je mia alveno, akceptis min per pluvo. Sed apenaŭ kelkajn metrojn mi malproksimiĝis de la stacidomo, kiam iu (tute nekonata homo) pasis apud min kaj tenis pluvombreton super mian kapon.

Tiel ni duope iris sub la komuna pluvombrelo kaj ekbabilis. Kiam li eksciis, ke mi iras en la Oomoto centron, prenis mian brakon kaj invitis min en sian aŭton, starante en la proksimeco. Tiel eĉ la 8-10 minutan vojon mi ne devis fari perpiede. Kvankam en la Oomoto centro ne estis Agou Takashi, la ĝenerala sekretario, kiu invitis min – en la sekcio de la internaciaj rilatoj oni sciis pri mia alveno kaj kondukis min en la salonon, kie okazis instruado de Esperanto.

Trinkante tason da teo, oni petis min instrui per rekta metodo iun el la knabinoj, kiu komencis lerni la lingvon antaŭ unu aŭ du horoj. Ne sciante kio estas rekta metodo, mi decidis tiel, ke mi provos instrui ŝin pri la plej gravaj esprimoj de la ĉiutaga vivo, pri salutado, prezentado kaj pri la nomoj de objektoj troviĝantaj en la ĉambro. Sed post duonhoro mi embarasiĝis.

Ĝuste pro tio, ĉar dum apenaŭ unu horo, ni atingis, ke ne ekzistis objekto en la ĉambro kies nomon la knabino ne sciis. Vidu, kia estas la vivo! Mi instruis pli ol dek jarojn en diversaj lernejoj, kelkajn

jarojn ankaŭ en unu el la universitatoj en Budapeŝto, tamen mi devis veni en Japanion por renkonti la plej talentan lernanton de mia vivo.

La alian tagon matene Ito Eizo, la prezidanto de EPA inaŭguris la printempan kunvenon. Li rakontis, ke li lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj, kaj nun en sia 80-a jaraĝo li povas diri, ke lia vivo ne estintus kompleta sen Esperanto. Kaj ĵuste pro tio, ĉar pere de Esperanto malfermiĝis por li la mondo, li povis konatiĝi kaj havigi amikajn rilatojn kun simile pensantaj homoj el diversaj landoj kaj kontinentoj.

Li aldonis, ke ankaŭ sen Oomoto estintus lia vivo ne kompleta. Ĉar Oomoto donas moralan valorsistemon al la homoj, ĝi instruas, ke samtempe oni devas kulturi la tradician japanan arton kaj estimi la kulturajn tradiciojn de aliaj popoloj. Mem la nomo Oomoto signifas: “Granda Fonto de la Komunumo de la Amo kaj Virto”.

## **“Unu mondo – unu interlingvo”**

Laŭ la doktrino de la organizaĵo la homoj en la diversaj religioj adoras ne diversajn diojn, sed la saman en ĉiuj religioj. Nur la nomo kaj la ceremonioj alias laŭ la lokaj kutimoj kompreneble laŭ teritorioj kaj epokoj. Dum la Oomoto diservoj la nomo “Oomoto Sumeomikami” estas uzata, kiu signifas: Granda Dio de la Universo, Fonto de Ĉio Ekzistanta. Sed ili komprenas, ke laŭ la budhista ceremonio ĝi estas nomata “Amidha Budha”, do Heleco de la Lumo, en la juda religio Jehova, dume la kristanoj kaj aliaj anoj de okcidentaj religioj nomas lin alie.

La fondinto kaj la spirita gvidanto de la organizaĵo estis kampanarino, ŝia nomo estas Nao Deguchi. En 1892, en sia 56 jaraĝo ŝi sentis en si la ĉeeston de Dio kaj travivis dian rivelon. Kvankam ŝi estis analfabeto, ŝi tamen povis skribi la doktrinon de la organizaĵo, malgraŭ tio, ke ŝi ne povis legi ĝin. El tio ni citas:

*“...Nur unu Dio ekzistas, kiu estas la Origina Fonto de la Universo. Li estas pli granda ol Ameterasu Omikami, la Granda Sundio, de kiu deveniĝas sin la japana imperiestra familio. Ĉiu homo estas lia infano kaj ĉiuj enhavas lian esencon. Sekve de tio, ĉiu homo estas egala kaj ĉiu diskriminacio laŭ raso, ideologio, nacieco kaj socia*

*pozicio estas senbaza kaj maljusta. Por realigi tion ni devas ŝanĝi la mondon, fondi la Ĉielan imperion ĉi tie sur la Tero, la Landon de la Budho (Lumo) de la Pasinteco kaj de la Estonto.”*

Tiel unuigis analfabeta kampanarino la primitivan mondkoncepton enkorpigantan la naturajn fortojn kaj fenomenojn kun kredo en pluraj dioj al speciala kredo en unu Dio, kiu enhavas la tutan homaron. Kaj ŝi transdonis la respondecon al la homaro por fondi justan, meritan kaj harmonian socion. Tiu ĉi pensado klarigas la veran enhavon de tiu baza principo kiu estas gravite en roko en la parko Oomoto: “*Unu Dio – Unu Mondo – Unu Interlingvo*”.

Tiu interlingvo laŭ Oomoto devas esti lingvo facile lernebla, do por ĉiuj alirebla, neutrala kiel Esperanto. Tion rekonis iu posta spirita gvidanto de la organizaĵo, kiu antaŭ 60 jaroj, en 1923 jam forte proponis, ke la movadanoj komencu studi kaj plue uzi la internacian lingvon. Ankaŭ Ito Eizo pro tiu influo komencis lerni Esperanton en 1923, kaj lerninte la lingvon jam en la sama jaro li mem gvidis Esperanto kursojn.



David Macgill, Agou Takashi kaj Amri Wandel en amikeca rondo

## Per dinamito kontraŭ Oomoto

Post tri jaroj li dungiĝis ĉe Oomoto kaj pli poste li iĝis la sekretario de la organizaĵo kaj la prezidanto de EPA. Sed la vojo ĝis tie ne estis sen obstakloj. Okazis, ke la naciisma, militisma japana registaro antaŭ la dua mondmilito rigardis Oomoton kiel malamiko pro ĝia pacifismo, internaciismo, kaj pro tio oni ordonis malkonstrui la sanktejojn apartenantajn al la organizaĵo. En 1935 la centro de la organizaĵo estis eksplodigita per dinamito kaj la gvidantoj estis sendataj en malliberejon. Mem Ito Eizo iris trifoje en malliberejon.

Post la dua mondmilito la atmosfero ŝanĝiĝis. Japanio iĝis pli malfermita por la mondo, kaj la kulturaj, religiaj kaj aliaj organizaĵoj, malpermesitaj dum la periodo de naciismo, povis daŭrigi sian funkciadon. Tiel ekde 1959 Oomoto funkcias laŭleĝe denove. Ĝiaj gvidantoj apogas la pacifisman movadon, ili provas konservi kaj pluevoluigi la tradiciajn japanajn artojn per diversaj metodoj. Ili aperigas regule revuojn japane, angle kaj esperante. En la centra sanktejo en Kameoka estas prezentataj klasikaj japanaj No-dramoj, somere diversaj Esperanto-kursoj estas organizataj por transmaraj studentoj kie eblas konatiĝi kun la tradiciaj japanaj artoj, kaligrafio, teceremonio kaj kun arto de floraranĝo (ikebana en japana lingvo).

Ili klopodas evoluigi siajn rilatojn kaj kunlaboron kun aliaj religiaj movadoj en la spirito de komprenemo kaj reciproka respekto de la valoroj unu de la alia. Tiun procezon pravas la fakto, ke la gvidanto de Oomoto estis bonvenigata en Vatikano per la Papo Paŭlo la Sesa, krome ankaŭ la dektria Lamao de Dala vizitis la centron de la movado en Kameoka.

En 1977. la organizaĵo organizis grandsukcesan artan ekspozici-serion en muzeoj kaj ekspoziciejoj de diversaj eŭropaj kaj amerikaj urboj; kaj ĝi celebris diservon laŭ siaj ritoj en la Katedralo Canterbury kaj en la Baziliko Sankta Petro. Tio estis la unua okazo, kiam en grandfama kristana preĝejo okazis diservo laŭ ŝintoa ceremonio. Dum la lastaj jaroj en la centro en Kameoka diversaj ceremonioj estis celebrataj kune kun kristanaj pastroj.

La „Printempa kunloĝado” pasis en varma etoso. Kaj antaŭtagmeze kaj posttagmeze okazis lingvolernado. Mi instruis unu el la progresigaj kursoj, krome prelegis pri la hungara kultura vivo enkadre de la vespera kultura programo. Krom mi ankaŭ alia eŭropano partoprenis la kunvenon. Li nomiĝas Geoffrey Sutton. Li estas anglo kaj en la pasintaj jaroj li laboris en la redakcio de la pekina revuo „El popola Ĉinio” de la Ĉina Esperanto Asocio. Tiel li parolis pri siaj spertoj en Ĉinio.



## La ideogramoj de Amiko

Dum la tria tago de la kunveno mi estus devinta vojaĝi al Nagoya, sed mi decidis resti ankoraŭ unu tagon en Kameoka. Tio estis grava, ĉar en tiu ĉi urbo okazos en aŭgusto la 70-a Tutlanda Esperanto-Kongreso. En la kadro de la antaŭpreparo la urbestro, Taniguchi Joshihisa akceptis min, Geoffrey Sutton kaj tiun gvidanton de Oomoto, kiu okupiĝas pri la internaciaj aferoj. La urban akcepton ĉeestis ankaŭ kelkaj ĵurnalistoj. Estis kortuŝe vidi tiel fore de Eŭropo la hungaran, anglan kaj japanan standardojn unu apud la alia sur la muro de la konsilantejo. La etoso de la konversacio plivarmiĝis kiam mi rakontis la historion pri la pluvumbrello post mia alveno, kiel ekzemplon por la gastamo de la loĝantoj de la urbo.

Post la vizito ĉe la urbestro ni iris rekte al la stacidomo kaj post ĉirkaŭ duonhora vojaĝo per la loka fervojo ni eltrajniĝis en Nigo. Tio estas unu el la eksteraj distriktoj de Kyoto. Tie atendis nin malnova konatulino, Tahira Masako kaj sia filino Amiko. Mi renkontiĝis kun ili antaŭ du jaroj, en majo de 1981 dum mia unua japana vojaĝo. Ekde tiam Amiko iĝis granda knabino, jam havas pli ol 6 jaroj, kaj scipovas skribi kelkajn esperanto vortojn. Nu, kompreneble ne per latinaj literoj, sed nur per japanaj katakana signoj, sed ankaŭ tio estas grava afero. Estas konate, ke la nomo Amiko havas duoblan signifon. Ĝi estas japana virina baptonomo kaj la vorto havas signifon ankaŭ en esperanto.

La Esperanto-Centro en Kyoto troviĝas en la mezo de la urbo sur la unua etaĝo de moderna, nova domo. En tiu ĉi urbo la esperantan movadon ekigis budhista monaĥo Nishida Ryoya. Li rigardis la lingvon kiel utila ilo en la disvolviĝo de la kompreno kaj de la amikeco inter la homoj. Kvankam Nishida mortis antaŭ nelonge kaj poste lia domo, la „Pavilono de Silento” malplenas, la movado ekigita far li, ne velkis. Aliaj homoj prenas lian lokon, kiuj por la samaj noblaj celoj provas ion fari. Se mi rigardas la desegnojn de la sesjara Amiko, kiam ŝi kunmetas la vorton „knabino” el la japanaj silabo-signoj, mi fidus, ke tio eĉ en la estonto ne malfortiĝos.





Laŭ japana artpentristo Tsuji tiel aspektis la aŭtoro en 1983.

# RIGARDO MALANTAŬ LA „ĈIELAN HARMONION”

En la unuaj semajnoj post mia alveno al Japanio mi havis specialajn interesajn problemojn. Mi ne sciis, kion mi diru, kiam oni demandis min en oficialaj lokoj pri mia naskiĝdato, abitura ekzameno, ktp. En tiu kazoj mi ĉiam hezitis. La afero ne estas simpla, ĉar en Japanio la eŭropa kalendaro ne estas uzata. Ĉi tie ĉe la ekrego de imperiestroj estas nomata la oficiala nomo de la regoperiodo kaj konforme al tio la tempo rekalkuliĝas ĉe ĉiu ekrego de nova imperiestro.

Kiam Hirohito, la nuna imperiestro surtroniĝis antaŭ 58 jaroj, tiam li nomis sian epokon „Showa” (Ĉiela Harmonio). Pro tio mi devis lerni ke mi naskiĝis en jaro 23. de epoko Ĉiela Harmonio kaj mi faris abituran ekzamenon en 41. kaj mi komencis miajn studojn en la Nanzan Universitato en urbo Nagoya en la 58-a jaro de la sama epoko.

## **Kontraŭdiroj en la lando de rideto**

Kiel studento de la universitato mi vivas en la japana socio. Tial mi havas pli multajn eblojn ekkoni la japanan pensmanieron, ol la eŭropaj kaj amerikaj oficistoj kaj turistoj kiuj pasigas iom da tempo en la insulolando. Tial nun mi provas prezenti la japanan socion kun siaj kontraŭdiroj, kiel mi vidas ĉi tie la ĉiutagan vivon. Tiamaniere mi eble sukcesos prezenti multe pli realan bildon pri Japanio, ol mi havis antaŭ mia alveno laŭ legitaj vojaĝlibroj kaj turismaj informoj.

Unu el miaj agrablaj spertoj ĉi tie estis la konstanta rideto kaj ekstrema afableco de homoj. Tiu fenomeno surprizas ĉiujn okcidentajn vizitantojn en la unuaj tagoj de iliaj restadoj en Japanio. Konatoj ĉe renkonto kliniĝas profunde unu antaŭ la alia kaj estas preskaŭ maleble findiri du-tri frazojn sen interrompo de la partneroj. Ili de tempo al tempo aldonas, ke ili povas sekvi la diritaĵojn kaj tute konsentas kun ĉio.

Post kelkmonata lingvolernado ni jam atingis rekoni la plej gravajn vortojn uzatajn en la ĉiutaga komunikado, sed aktive uzi tiujn vortojn

en la praktiko tute ne estas facila. Por tio estus bezonata koni ankaŭ la japanan pensmanieron, kiu ŝajnas esti senlogika por eŭropano en multaj kazoj. Por montri ekzemplon nun mi citas kelkajn frazojn el nia japana konversacia libro japane kaj esperante laŭvorte kaj fine mi skribos la veran signifon de la frazo. Temas pri vizito al kolego, aŭ konatulo:

„...Post la bonvenigo de la gasto fare de la gastiganto:”

- *Ođama simasz.*

- *Mi estos en via vojo. (Mi ĝenos vin.)*

- *Dankon pro la invito.*

- *Ĉotto matte kudasai, oĉao iremas kara.*

- *Momenton, mi preparos teon.*

- *Momenton, mi preparos teon.*

- *Dozo okamai naku, sugu ŝicuree ŝimas kara.*

- *Ne ĝenu vin, mi faros baldaŭ aĉan aferon.*

- *Ne penu, baldaŭ mi foriros.*

...Ĉe la fino de la vizito:

- *Oĝama ŝimas. Ima ŝicuree ŝimas.*

- *Mi estis en via vojo. Mi faros baldaŭ aĉan aferon.*

- *Do, nun mi foriros. Ĝis revido.*

- *Sajōnara.*

- *Se devas esti tiel, do ni akceptu tion bedaŭrinde.*

- *Ĝis revido...*”

## Adiaŭo kiel „aĉa konduto”

La japana esprimo ĉe adiaŭo „*sicuree ŝimas*” signifas, ke oni ĝuis la ĉeeston de la partnero, oni ŝatus esti kun li plu, sed nun oni tamen adiaŭas, do tio estas aĉa konduto. Sed tion mi tute ne sukcesas kompreni, se la gasto opinias, ke li ĝenas la gastigantojn, tiam kial li trovas malĝentila la rapidan foriron, eĉ aĉa. Por kompreni tion mi pensas, ke oni devas naskiĝi japano.

Kiel mi jam skribis en la antaŭa parto de mia raporto en la universitato estas tre amikeca etoso, la profesoroj kaj la prelegantoj estas tre afablaj kaj ĉiu uzas la ĵus menciitan ĝentilan formon de konversacio. En ŝtataj oficejoj la situacio estas preskaŭ la sama, kaj ankaŭ surstrate kiam konatuloj renkontiĝas. Ankaŭ mi spertas tiun fenomenon ĉiutage, sed por fari la bildon kompleta, mi devas aldoni, ke mi spertas foje ankaŭ ion alian.

Estas kelkaj homoj en mia proksimo, kiuj neniam parolas ĝentile, ili tamen atendus – aŭ almenaŭ trovus natura – ke mi kliniĝu antaŭ ili konstante. Estas fakto, ke tiaj homoj estas en malplimulto, sed apartenas al la vero, ke ankaŭ en Japanio ne ĉiu ridetas.

Antaŭ kelkaj tagoj en Marto matene mi alvenis al la universitato kaj mi legis angle la jenan frazon sur la tabulo en nia klasĉambro: „*Iu ajn pruntis mian ombrelon, mi estus tre feliĉa se li tuj remetus ĝin, aŭ se eblas pli frue*”. El tiu anglalingva mesaĝo estis evidente, ke la ombrelo de eksterlanda studento estis ŝtelita.

Ĉar mi havis ankoraŭ duonhoron ĝis la komenco de la kurso, mi pensis promeni en la parko de la universitato. Post kelkaj minutoj mi ekvidis japanan studenton kiu antaŭe kelkfoje venis al mi babili por progresigi sian anglan lingvokonon. Ankaŭ nun ni parolis angle promenante en la parko. Alvenante al la enirejo de la universitato ni vidis en ujo 8-10 neposedatajn ombrelojn.

Tiam mi ankoraŭ ne povis parolis japane tre bone, do mi petis tiun studenton demandi la pordistojn, ĉu estas tie trovita ombrelo de la nekonata eksterlanda studento. Laŭ mia plej granda surprizo li diris, ke li ne demandas, ĉar li ne volas montri al la personaro, ke li emas

helpi al eksterlandano. Tiun fenomenon kaj la kialon mi tute ne povas kompreni.

## **Fascina evoluo kaj rostitaj lokustoj**

Kvankam tia konduto ne estas ĝenerala, la fenomeno ekzistas sendube. Diversgradaj ŝtataj oficejoj kaj diversaj sociaj organizoj multe klopodas progresigi la internaciisman pensmanieron kaj la flegadon de amikaj rilatoj kun aliaj popoloj, ŝajne en tiu kampo estas ankoraŭ farenaĵoj.

Oni ne devas forgesi, ke Japanio estis tute fermita de la ekstera mondo dum multaj jarcentoj. Por eksterlandanoj estis malpermesite paŝi sur la insuloj kaj same por japanoj forlasi la landon. Sed en la unua parto de la 20-a jarcento la japana imperiismo venkis kaj koloniigis Koreion, Manĉurion, Tajvanon kaj dum la dua mondmilito eĉ parton de Indonezio. Tiam la naciisma propagando forte influis la pensmanieron de multaj homoj.

Laŭ la historia evoluo tiuj landoj poste ricevis siajn sendependecojn kaj ankaŭ Japanio ekiris al la evoluo de parlamenta demokratio. Se oni konsideras, ke antaŭ 40 jaroj ankoraŭ japanaj soldatoj regis grandegajn terenojn de Sudorientazio, tiam oni devas konkludi, ke en la publika pensado okazis forta pozitiva progreso en la lastaj jardekoj. Sed laŭ miaj personaj spertoj la rezervoj kontraŭ eksterlandanoj ankoraŭ hodiaŭ ekzistas.

Laŭ multaj ekspertoj dum la plurmiljara historio de Japanio la lando atingis sian plej furoran evoluon post la dua mondmilito. La MEP (Malneta Enlanda Produkto, angle: GDP) inter 1948 kaj 1982 kreskis nominale al 100-oblo. Por sociologoj estus ŝatata temo esplori kiel reagis homoj al subita riĉeco, kiuj mem havis personajn spertojn pri malriĉeco kaj mizero.

La nuntempa japana vivnovelo estas surprize alta. Mi rimarkas tion ĉiutage. Funkciantan uzitan aŭton eblas aĉeti por ĉ. dumonata salajro, telekomunikadaj aparatoj estas ĉi tie la plej malmultekostaj en la mondo, sed nek manĝaĵoj kostas multe. Krome la sortimento estas tre granda, aĉetebblas ankaŭ raraĵoj – ili iom pli kostas.

La ĉiutagaj varoj estas tre malmultekostaj kompare al la salajroj. Post mia alveno al Nagoya mi vidis ĉe vendejo stakon da kestoj plene de mandarinoj, sur ĝi skribite prezo: 400 jenoj. Tio estas ne multe pli alta, ol la prezo de unu kilogramo da mandarino en Hungario. Mi pagis la 400 enojn kaj laŭ mia surprizo oni donis al mi la tutan keston (ĉ. 15 kilogramojn), ĉar 400 enoj kostis la tuta kesto.

Atingis min ankaŭ alia surprizo. Antaŭ kelkaj tagoj en granda vendejo Jusco rostitaj lokustoj estis vendataj en 80-gramaj skatoloj kaj la prezo estis 450 enoj. Tio estas tre multekosta, sed bonŝance en mia hejmo en Hungario la rostitaj lokustoj ne apartenas al la frandaĵoj. Pro tio en miaj elspezoj pri manĝaĵoj tio ne havas grandan rolon.

## **La „ne-plu-dia” imperiestro kaj la nova generacio**

Antaŭ la dua mondmilito en Japanio ankoraŭ ekzistis diversaj karakterizaĵoj de la feŭdisma socio. Ankoraŭ vivas homoj kiuj lernis en la lernejoj, ke la imperiestro devenas rekte de la Sundio kaj ankoraŭ vivas la imperiestro, kiu en sia junaĝo eble eĉ li mem kredis tion. Estas fakto, ke li deklaris nur en 1946, ke li mem ne estas dio. Ankoraŭ vivas homoj, kiuj kredis en la naciisma raviĝo pri rega rolo de Japanio en Sudorienta Azio. Kaj la samaj homoj devis travivi la atomajn bombojn, la humiligon de malvenka milito kaj la okupadon post la milito.

La imperiestro antaŭe adorita de la subuloj fariĝis la unua el la japanaj regintoj, kiu „*suferis la nesufereblajn*”, kiel li diris en sia alvoko al la nacio post la milito. Tiam la invadinta usona armeo estis la ĉiopova potenco en la lando kaj ties ĉefo generalo MacArthur instalas sian ĉefstabejon en unu el la plej altaj domoj de Tokio. Li ordonis la imperiestron viziti lin tie de tempo al tempo. La imperiestro estinte malalta homo rigardis ĉiam supren al MacArthur, kio estis tre humiliga. Estas stranga historia paradokso, ke ĉio ĉi, kaj ties antaŭhistorio okazis en la erao de la t.n. Ĉiela Harmonio...

De tiam kreskis nova generacio, kiuj konas la historiajn okazaĵojn nur el historiaj libroj kaj jam ne havas personan sperton pri malriĉeco kaj mizero. Por ili estas jam ĉiutagaĵoj la telefonoj, la modernaj

elektronikaj instrumentoj kaj horloĝoj, la koloraj televidiloj kaj muzik-centro-turoj. Multaj el ili idealigas la usonan vivostilon, vestas ĝinzon kaj kondutas multe pli senĝene, ol la pli aĝaj generacioj. Mi sentas min bonŝanca, ke mi povas viziti universitaton en Japanio en tiu ĉi epoko, ĉar en la 58-a jaro de Showa mi ankoraŭ povas sperti iom de la tradicia japana vivostilo kaj pensmaniero, kiu certe tute malaperos post kelkaj jardekoj el la konscio de homoj. Sed samtempe jam videble elformiĝas la konturoj de evoluita, altvivnivela moderna industria socio, kiun la epoko „Ĉiela Harmonio” alportis al la japanoj kune kun sia terura disharmonio.

La venontaj alilandaj studentoj kiuj havos eblon vivi en la japana socio same, kiel mi, tiun fenomenon povos sperti persone. Sed la vizitantoj, kiuj gastigas ĉi-tie pere de la esperanto-movado spertas nur la gastamon de esperantisoj kaj spertas malpli da negatifaĵoj. Partoprenantoj de grupaj vojaĝoj pagas multajn monojn por la organizataj programoj de diversaj vojaĝoficejoj, verŝajne ili vidas pli da afabla rideto, sed preskaŭ neniom da negatifaĵoj. Mi opinias, ke la membroj de tiuj lastaj du grupoj povas ekkoni malpli da vera japana vivo.



La domo en Hitotsuyama, kie la aŭtoro vivis dum sia studenta tempo

# SEMAJNFINAJ INVITOJ KAJ TRALANDAJ VOJAĜADOJ

Post la paso de tempo kaj en la universitato kaj ekster ĝi mi devis plenumi pli kaj pli da taskoj, tial la eventoj ĉirkaŭ mi plirapidigis. Danke al miaj duonjaraj finitaj ekzamenoj kaj danke al mia pliboniĝanta japana lingvoscio mi povas partopreni multajn kulturajn eventojn. Kiel mi jam skribis, la gvidantaro de la universitato forte subtenas, ke la eksterlandaj studentoj studu ne nur la lingvon, ekonomion, komputilan teknikon kaj aliaj fakajn sciencojn dum sia restado en Japanio, sed ili enprofundiĝu en la pensmaniero de japanoj, konatiĝu pri artoj kaj ĝenerale pri la japana kulturo. Tial ĉijare en la unua semestro ni vizitis etan vilaĝon Obara, kie ni studis la teknologion de la tradicia japana paperfarado. Tio estis tasko postulante aktivecon: dum la vizito ĉiu studento devis fari mem unu pecon da arta kaligrafio.

## **Kion esploras malaja historiisto?**

Post la komenco de la nova semestro venis al nia klaso malajzia historiisto Stephen Leong Mun Yoon. Li venis al Japanio kun sia amerika edzino (el Hawaio) kaj du filinoj. Antaŭe li instruis historion en Kuala Lumpur en la „University of Malaya” kaj helpe de kunlabora scienca programo inter la du universitatoj nuntempe li studas la cirkonstancojn de la japana milita invado en 1941-45. Li ricevis japanan stipendion de tiucela fondaĵo por kovri la kostojn de sia esplorkonata. Ĉar li aliĝis al la semestro nur unu kaj duono monatojn post la komenco, li havis iom da malavantaĝo. Sed tiun malavantaĝon li rapide regajnis, ĉar estante ĉino li konas jam grandan parton de la japanaj signoj. Pro tio la laciga ekzercado de tiu komplika skribmaniero por li ne bezonis multe da tempo.

Malgraŭ la altaj postuloj de la instruplano dum la semajnfinoj mi partoprenas krom sciencaj aranĝoj ankaŭ en sociaj kaj kulturaj programoj. Inter tiuj la plej signifa estas nuntempe la kultura renkontiĝo organizata en urbo Yaizu (ĉefurbo de gubernio Shizuoka). Ĝin organizas la Tokia Esperanto-Domo kaj la evento nomiĝas Yaizu



kunloĝado. Kadre de esperantlingva prelego mi parolis tie dum unu horo pri la reformklopodoj en la hungara ekonomio-direktado. La angla Geoffry Sutton – kiu pasigis pli ol unu kaj duono jarojn en Azio por antaŭenigi la esperanto-movadon en la Ekstremoriento – faris detalan trarigardon pri la instruado de fremdaj lingvoj. La sekvan semajnon post la Yaizu kunloĝado li finis sian longdaŭran vojaĝplanon en Azio kaj reveturis al Britio.

## **Elitklubo de ĉefaj negocistoj**

En la tria tago de la renkontiĝo estis aranĝita scienca konferenco pri sociaj kaj ekonomiaj rilatoj de la lingva malegaleco sub la prezido de Kikushima Kazuko, estro de Tokia Esperanto-Domo. La enkondukan prelegon faris la direktoro de la Japana Esperanto-Instituto, kiu poste uzis la spertojn de la diskuto en sia prelego en la budapeŝta Universala Kongreso de Esperanto. En la diskuto mi atentigis, ke ankaŭ por malgranda lando kiel Hungario signifas grandan ekonomian ŝarĝon la 10-jara lernado de du fremdaj lingvoj de plurcent mil lernantoj. Sed en la landoj, kie oni parolas la t.n. mondlingvojn, tie oni bezonas elspezi multe malpli da lernoforto kaj mono por tiu celo.

Geoffry Sutton, kiu studis pli frue finnougran lingvistikon en Svedio, raportis pri la rezulto de interesa esploro. En Svedio en la lasta jardeko eldonitaj libroj la plej ofte el la angla lingvo estis tradukitaj al la sveda. Tio okazas tiel malgraŭ la fakto, ke en la mondo la anglalingvaj publikaĵoj estas multe malpli, ol 50%. Ankaŭ tiu fakto montras kiom malfacile estas konatigi la kulturajn atingojn de la malgrandaj popoloj por la ekstera mondo.

Cetere en tiu renkontiĝo krom la lingvaj programoj en posttagmezoj estis ebloj konatiĝi ankaŭ kun multaj diversaj fakultativaj fakaj programoj.

La venontan semajnfinojn speciale malfacia tasko estis por mi, ĉar mi estis invitita al la tagmanĝo de la Ichinomiya Rotary Klubo. Tiu tasko estis malfacila por mi, ĉar tie mi devis prelegi japane kaj tio estis mia unua japanlingva publika elpaŝo. Antaŭ la aranĝo Banno Kunio, prezidanto de la Banno Muzikinstrua Centro kaj Muzikilkomerca

Entepreno venis al la universitato por preparoli la detalojn. La organizo intencas konstrui vastajn internaciajn rilatojn kaj pro tio ili invitas alilandajn studentojn por komuna tagmanĝo. En ĉi tiu jaro mi partoprenis tiun eventon kun Krailoes Hanvivadhanakul, mia thajlanda amiko kune kun alia sveda studento kaj ni vojaĝis kvarope al Ichinomiya en la aŭto de sinjoro Banno. En ĉi tiu jaro li estas la sekretario de la Rotary Klubo. Cetere la Rotary Klubo estas eminenta organizo de altrangaj negocistoj kaj estas tre malfacile membriĝi en tiu organizo. Nur unu persono rajtas membriĝi el ĉiuj fakterenoj kaj por akcepti novan membron la konsento de ĉiuj membroj estas bezonata.

La slogano de la organizo estas „*Estas nur unu homaro, do oni devas konstrui ponton inter la diversaj homoj.*” Tio tre similas al la celoj de la esperanto-movado kaj laŭ tiu bazo estus imagebla iu kunlaboro inter la esperanto movado kaj la internacia reto de la Rotary Klubo. Tion mi eksplikis en mia prelego, en kiu mi konigis la eblojn de la esperanto-movado por plifortigi la pacon inter la popoloj. La prelego ŝajne estis sukcesa, ĉar ĉe la fino de la tagmanĝo la sekretario petis de mi la tekston por publikigi ĝin en postaj eldonaĵoj.

## **La sorto de duonmiliono deportitaj koreoj**

La venontan semajnfino post la Rotary Klubkunveno mi denove iris prelegi. Ĉifoje mi veturis al Tokyo por partopreni la Kamakuran Esperanto-Seminarion, kies ĉeftemo estis la internaciismo de japanoj. Lige al tio mi parolis pri miaj personaj spertoj, do kiel eksterlanda studento, kiel mi vidas la problemon.

Mi atentigis, ke kompare al la izoliga politiko antaŭ la jaro 1867-68 la evoluo estas giganta en la publika pensado, sed ankoraŭ restis fendaĵoj abunde. Estas konate, ke en tiuj jaroj okazis nefinita burĝa revolucio en Japanio. Mi menciis konkretajn ekzemplojn, ke laŭ la enmigraj leĝoj studentoj, negocistoj, gastprofesoroj devas registri sin en la distrikta urbodoma oficejo, kie la unua paŝo estas preni fingrospuron de ĉiuj eksterlandanoj. Ĉar en aliaj landoj oni faras tion nur de gangsteroj katalogante ilin, tiu praktiko ŝajnigas kvazaŭ ĉiu eksterlandano estus supozata krimulo.

Pri alia malavantaĝo de nacieca distingo parolis dudekelkjara koredevena partoprenanto. Li rakontis, ke siaj gepatroj (kun aliaj miliono kaj duono civitanoj) estis devigitaj transloĝiĝi al Japanio fare de la japanaj militaj instancoj invadintaj Koreion antaŭ la dua mondmilito. Tiun homamason la japanoj uzis kiel malmultekostan laborforton. Li mem naskiĝis jam en Japanio, li vizitis lernejon en Japanio, li estis neniame en Koerio, eĉ ne parolas la korean lingvon, tamen li estas registrita kiel servanto de eksterlandaj interesoj. Konforme al tio li ne ricevas la samajn rajtojn kiel la aliaj japanaj civitanoj. En sia maljuna aĝo ekzemple li ne rajtos ricevi pension post 30-40 jara laboro, ĉar tion rajtas ricevi nur japanaj nacieculoj, malgraŭ ke ankaŭ li devas pagi la pensian kotizon.

## **Monaĥa vivmaniero kaj samuraja vespermanĝo**

Dum la revojaĝo de la kamaruka seminario al Nagoya mi interrompis mian vojon por tri tagoj en urbo Mishima ĉe monto Fuĝi laŭ afabla invito de la loka esperanto organizo. La duan tagon de mia restado en Mishima ni iris aŭte al la montaro Fuĝi ĝis alteco 2400 metroj en akompano de pluraj lokaj esperantistoj. (La monto nomiĝas japane Fuĝi-san, kie „san” signifas „monto” legite ĉine la respondan signon. La alia legmaniero estas „jama”, sed tion neniu diras en Japanio Fuĝijama, malkiel oni supozas tion ekzemple en Hungario.) Sub tiu alteco ni vidis plaĉaspektan arbaran pejzaĝon kaj densan vegetaĵaron, sed super tio nur vulkana lafo kaj cindro videblis.

Reveninte de la monto Fuĝi ni vespermanĝis agrable. Miaj gastigantoj volis certigi, ke mi ne malsatmortu, pro tio ili mendis du porciojn da manĝaĵoj por mi. La unua estis ege bongusta blank-karna mara krabo kun miksitaj saladoj kaj la alia estis hinda karea rizo. Post la vespermanĝo ni adiaŭis unu la alian ĉar alia gvidanto de la loka esperanto organizo jam atendis min antaŭ la restoracio. Ankaŭ li invitis min vespermanĝi, mi pensas pro iu organiza eraro. Ĉifoje ni iris al ĉina restoracio kie ni manĝis laŭ kutimo de ĉinaj nobelaj kortoj pompan 15-pladan vespermanĝon de antaŭmanĝo ĝis ananaso. Tiel kvankam dum mia restado en Japanio mi vivis kutime kiel monaĥo, tamen en Mishima mi vivis kiel samurajo.

La sekvajn du semajnfinojn post mia reveno al Nagoya mi ŝanĝis la direkton al sudo kaj veturis al Osaka. De tie mi pluvojaĝis al la proksima urbo Ikeda, kie mi partoprenis la Kansai Esperanto Kongreson kune kun aliaj invititaj prelegantoj. Ili estis aŭstralia, amerika, novzelanda kaj okcidentgermana esperantistoj. Tie mi renkontis denove David MacGill, la faman orientistan scienciston. Mi ekkonis lin dum mia unua vojaĝo al Japanio, kaj tiam li donis al mi la unuajn impulsojn por lerni esperanton. En la kongreso mi fine povis konatiĝi persone kun miaj tri samideanoj el Wakayama kun kiuj mi jam korespondis antaŭe. Post la kongreso laŭ iliaj invitoj ni veturis kune al ilia loĝurbo. Ĉi tie en Wakayama mi informiĝis, ke mi estis la dua hungara vizitanto en la urbo.

## **La unua hungara vizitanto de Sud-Japanio**

La unua vizitanto estis Fedorcsák Demeter, kiu gastiĝis ĉe hejmo de junulo antaŭ 50 jaroj. La iama gastiganto intertempe estas jam pli ol 70-jara, kaj li ankoraŭ laboras diligente en sia eta familia librovendejo. (Fedorcsák Demeter estas verŝajne la sama homo, kiun d-rino Szabó Felső Flóra, la ĝenerala sekretario de UEA mencias en sia artikolo en la revuo *Világ és Nyelv* numero: 1982/1). Laŭ rememoroj de sinjoro Tanaka Fedorcsák vivis ĉ. 20 jarojn en Ĉinio antaŭ sia vojaĝo al Wakayama. Li forlasis Hungarion en sia 17-a aĝo kaj poste li vojaĝis al Ĉinio okupiĝante pri instruado de la franca lingvo. Mi sukcesis ekscii pri li, ke post sia vizito al Wakayama li vojaĝis plu al Nagoya. Poste li sendis poŝtkarton de insulo Bali en Indonezio kaj poste lia spuro estis perdita.

En Wakayama mi loĝis ĉe loka esperantisto malkiel en Mischima, kie esperantistoj rezervis por mi multekostegan ĉambron en Grand Hotel. Tial ĉi tie mi havis eblon sperti ankaŭ la hejmecan etoson de japanaj familiaj hejmoj dum mia restado en la urbo. Miaj tagoj ankaŭ tie estis plenŝtopitaj per oficialaj turismaj programoj. Eluzante la favoran eblon mi vizitis la faman pilgrimejon Koyasan, kie Kóbó Taichi, fama budhista majstro estas entombigita. Li mortis antaŭ 1150 jaroj. Ĉirkaŭ la sanktejo staras multege da plurcentjaraj cedro-arboj, la plej malnova estas 750-jara.

Post mia reveno el Wakayama mi jam trovis invitilon en mia poŝtkesto por vojaĝi post tri tagoj al Okazaki al la 32-a kongreso de la Tokia Esperanto-Ligo. Post tri tagoj mi do denove ekveturis por ekkoni novajn homojn kaj novajn amikojn kaj intertempe ekkonante ankaŭ la landon kaj popolon kies gasto mi estas jam la okan monaton. Tiuj vojaĝoj estas tre interesaj, sed ankaŭ lacigaj. Mi tamen plenumas ilin kun granda ĝojo, ĉar per ili mi povas iom kontribui al la evoluigo de la internaciaj kulturaj rilatoj inter la eŭropaj kaj aziaj popoloj.



La kvinstela pagodo de la Kosho-ji templo troveblas en distrikto Yagoto, proksime al la universitato de la aŭtoro

## **SENLABORECO KAJ KURIOZA PSIKOTERAPIO**

Komence de la trimonata instrua paŭzo en la universitato mi devis serĉi rapide laboron, ĉar pro la konfliktoj kaŭzitaj de mia japana kunloĝanto ŝajne mi devos ŝanĝi loĝejon. Baldaŭ mi spertis, ke en Japanio nek por japanoj nek por eksterlandanoj estas facile trovi laboron. Por eksterlandanoj tio estas praktike neebla. Sperti tion estis iom surprize por mi, ĉar hejme en Hungario tute ne estas senlaboreco. Miaj konatoj donis 1-2 adresojn por provi demandi pri laborebleco, sed ĉiuj provoj montriĝis nesukcesaj. Nun mi ekkomprenis la veran gravecon de tiu socia fenomeno vidante kiom da laborokapablaj junuloj vagadas nenifarante ĉe la stacidomo esperante ricevi porokazan laboron. Kelkaj el ili ne havante loĝejojn nokte dormis en strataj subirejoj volvite per gazetpapiroj.

### **Dialektoj – kun miskomprenoj**

En unu-du lokoj mi eble povintus ricevi laboron, sed kiam la oficisto eksciis, ke mi venis el orient-eŭropa lando, tiam li faris malridan mienon. Vidante lian vizaĝon mi pensis, ke li gustumis citronon. En la universitato mi ne volis kritiki la japanajn cirkonstancojn dum longa tempo, sed post tiu okazo mi tamen menciis tion al unu el miaj japanaj instruistinoj. Mi klarigis al ŝi, ke en la orienteŭropaj landoj ni tute ne konas la problemojn pri senlaboreco.

Post kelkaj minutoj mi estis serĉata de la dekanejo, ĉar la vicprezidanto de la Chubu Teknika Universitato interesiĝis pri mi per telefono. Do, mi iris al la dekana oficejo kaj uzante la telefonon, mi baldaŭ ekaŭdis la voĉon de profesoro Katsumori Hiroshi, estro de Katedro pri Teoria Atomfiziko de la fama mezjapana teknika universitato. Mi ekkonis lin antaŭ nelonge en la Tokia Esperanto Kongreso. Mi sidis hazarde apud li en la honora vespermanĝo post la kongreso.

Li diris al mi, ke li ŝatus renkonti min, ĉar ili ŝatus, ke mi prelegu en la universitato. Li aldonis, ke ili povas pagi 30 mil enojn po prelego. Tiu sumo estas ĉ. la kvindekoblo de averaĝa pohora salajro atingebla por studentoj. Aŭdinte tiun oferton mi fariĝis pli optimisma kaj

serena kaj informiĝinte pri tio mi pli gaje veturis al Kameoka por partopreni la 70-an kongreson de japanaj esperantistoj.

Tiuj kongresoj havas ĉiam ankaŭ iom da festan karakteron, ĉar tie fore loĝantaj samideanoj povas renkontiĝi. Krom tiuj eventoj ili havus ne multajn eblojn babili persone. En la kongresoj interesaj fenomenoj kaŭzis al mi problemojn. En urbo Nagoya mi uzas la mezjapanan dialekton sed multaj kongresanoj parolas laŭ aliaj dialektoj. Pro tio mi tre facile komprenas ĉion, kiam ni parolas en la internacia lingvo, sed kiam la japanoj parolas laŭ diversaj dialektoj, tiam mi apenaŭ komprenas pri kio temas.

Poste klariĝis, ke tio estas problemo ne nur por mi. Maljuna partoprenanto de la kongreso alveninta el nordjapana insulo Hokkaido rakontis, ke li vojaĝinte en Usono renkontis samlandanojn antaŭ kelkaj jaroj. Ili tre ĝojis unu al la alia pro renkontiĝo tiom for de la patrujo kaj iris kune tagmanĝi. Sed dum babilado ili spertis, ke ili apenaŭ komprenis unu la alian, ĉar unu el ili estis de Hokkaido, la alia de Okinawa kie la loĝantaro de la izolitaj insuloj uzis aliajn dialektojn. Bonŝance baldaŭ klariĝis, ke ambaŭ estis esperantistoj kaj tiel daŭriginte la konversacion tuj solviĝis ilia komunika malfacilaĵo.

### **„Japano parolis al mi hungare..”**

La kongreson ni partoprenis 500-ope. Estis tie ankaŭ multnombraj eksterlandanoj el dek landoj. El tiuj ni kvarope prelegis. I. Gung Gi, ĝenerala sekretario de Korea Esperanto Asocio parolis pri la komunaj movadaj taskoj de la du landoj, brazila profesoro rakontis, kiel sia vojo pasis de la okcidenta spiritismo al Oomoto. (Pri religia organizo Oomoto mi skribis detale en tiu ĉi raportserio en ĉapitro „Bambudanco kaj dramoj en sanktejo”.) Mi parolis iom kritike kaj iom memkritike, ke mi, eksterlandano vivanta en Japanio kiel mi vidas la japanan vivon. Bulgara esperantista gvidantino prelegis pri sia patrujo kun lumbildoj.

Post la fino de la prelegoj kaj konsultadoj ni partoprenis bankedon. Tie por mia surprizo maljuna japano parolis al mi hungare. Li diris, ke li nomiĝas Tamaguchi Takashi, li loĝas en Osaka kaj li decidis

antaŭ pli ol 40 jaroj kun tri amikoj lerni la lingvon de nia fora malgranda lando. Ni interkonsentis, ke ekde nun ni kontaktos unu la alian letere. Kaj vere post kelkaj tagoj mi ricecis leteron el Osaka kiu komenciĝis jene „Mia frato sinjoro Márkus Gábor”

En la letero sinjoro Tanaguchi skribis, ke li devis ĉesi la studentan vivon en 1940, kiam la milito pliserioziĝis ĉe la Pacifiko. Tiam li devis ekmilitservi kaj lia sorto kaj vivo fariĝis malcertaj. Li cerbumis multe, kion li povus fari memorendan en tiu situacio. Foje vaginte surstrate li ekvidis afiŝon varbintan al lingvokursoj. Pri lingvoj de la landoj, kiuj estis amikaj al la tiama Japanio, do la germana, itala kaj la hungara.

Li tuj aliĝis al la hungara. Nur kvar studentoj kuraĝis fari same kaj ĉiu lernis diligente konforme laŭ sia celo. Ilia instruisto estis juna muzikisto antaŭe studinte en Budapeŝto. Post du monatoj la instruisto estis rekrutita en la armeon. La kvar studentoj decidis kuraĝe daŭrigi memstare la lernadon de la hungara lingvo helpe de germanaj kaj anglaj lernolibroj. Post la fino de la milito Tanaguchi eksciis, ke el la kvaropo du mortis kaj la tria malaperis. Do, nur li restis sole daŭrigi la konstruadon de la amikaj rilatoj kun Hungario.

Dum tridek jaroj da korespondado li kolektis tri valizojn da bildkaroj, pentraĵoj, popolartaj objektoj, ktp., el kiuj li faris ekspozicion en la Sanwa Banko. Ĉe la enirejo li skribis la jenan tekston: „*Mi ŝatus inviti vin al Hungario per tiu ĉi eta prezento. Mi ŝatus nur montri, ke ankaŭ en eta, fora, nekonata lando la vivo estas malfacila, sed troviĝas ankaŭ guto da ĝojo kaj feliĉo.*”

La ekspozicio estis sukcesa, ĉar oni devis plilongigi ĝin unu monaton. Tiutempe vizitis Japanion juna hungara kuracisto, kiu vidinte la ekspozicion ege kortuŝite dankis pro la flegado de amikaj rilatoj inter la du popoloj. (Verŝajne temas pri d-ro Denke Péter, hejma kuracisto en hungara urbo Törökbálint, kiu estas same esperantisto kaj mondvojaĝanto.)

Post la fino de la kameoka esperanto-kongreso mi havis eblon viziti la Kameoka Matsuri festivalon. Tio okazis antaŭ la stacidomo, kaj en malfrua vespero mi vidis ankaŭ belegajn artfajraĵojn. La venontan



tagon mi partoprenis en la jubilea festo de la Oomoto Esperanto Propaganda Societo. Tiu societo estis fondita antaŭ 60 jaroj kaj ĝenerala sekretario Agou Takashi petis min aparte, ke mi partoprenu ankaŭ la ŝintoistan festan diservon. Poste nia societo iris al boat-ekskurso sur rapidfluan montan riveron. Post tio mi reveturis al Nagoja, sed mi restis en mia universitata urbo nur por kelkaj tagoj. Poste mi veturis al la kunveno de la jamagiŝista movado al kiu ankaŭ mi estis invitita.

## **Kunpensado – kun ŝanĝantaj kuntranoktontoj**

La vorto „*tokko*” estas mallongigo de japanaj vortoj „*Tokubetsu Kōsu Kensan Kaj*” kaj ĝi signifas oktagan specialan intensivan kunpensadon. En la evento la partoprenantoj kune loĝas en la sama ĉambro, eĉ kune manĝas kaj kune laboras dum la tuta tempo. La rezulto de la kunveno estas tre granda kaj mirinda. Dum la kunpensado la partoprenantoj reprite sian ĝistiaman vivmanieron kaj agadon kaj farante tion ekklariĝas, ke la okazinta kolero en la ĝistiaman vivo kaj malbonvolo al aliaj homoj estis senbazaj. La celo estas ŝanĝi la personecon de la partoprenantoj al pozitiva direkto per racia rekono kaj per diversaj grupa-psikoterapiaj rimedoj.

La membroj de la movado konstatas, ke dum plurmil jaroj oni ne sukcesis solvi la problemojn de la homaro (ekzemple krimojn, malbonvolon, militojn, ktp.) per la ĝisnunaj sociaj institucio-sistemoj. Tial ili opinias, ke la radikala solvo de la problemo povas okazi nur per apliko de amo, pacienco kaj komprenema pardonemo. La vivocele de la aliĝintoj al la movado estas la ĝojo pro la laboro por aliaj homoj, tial la membroj ne havas propran posedaĵojn.

La sekvantoj de tiu ideologio, kelkmil homoj, loĝas en specialaj komunumoj, en t.n. jamagiŝistaj vilaĝoj. Ili okupiĝas grandparte pri kokimbredado kaj memprizorga agrikultura produktado kaj manĝas kune kiel tutvilaĝa familio. Ĉe la eniro oni forprenis de mi ĉiun monon, fotilon, ktp., dirante ke mi ricevos ĉion ĉe la fino de la tokko.

Al la tokko venis proksimume sepdek personoj, grandparte junaj fraŭlinoj kaj virinoj. Por plifortigi la komunuman senton ni ĉiuj

dormis en komuna granda ĉambro tiel, ke ĉiu ricevis duonon da futono (la futono estas speciala japana kuŝloko sur tero, aŭ tatamio) kaj ĉiunokte ĉiu ŝanĝis la kundormanton. Manĝado estis dufoje tage kaj la cetero de la tago pasis per komuna laboro kaj ekzercoj memorigintaj pri grupa psikoterapio.

Vekiĝo okazis je la sesa matene kaj poste - escepte la du manĝotempojn - daŭra memesploro kaj problemopripensado okazis ĝis nokto-mezo, foje ĝis la 2-3a frumatene. La etoso estis brila, jam post kelk-hora kunestado ni sciis pli pri unu la alia, ol alikaze eble dum jaroj, kaj multaj vere ekamis unu la alian. Ĉiu homo sincere interesiĝis pri la problemoj de la aliaj kaj se povis, oni klopodis helpi.

## **Memesploro – kun komuna „konfeso”**

Unu el la profesoroj ekzemple suferis pro la malbonvolo de sia ĉefo. Iu ĉ. dudekjara junulo estis en prizono jam tri fojojn kaj en frenezulejon, ĉar li kreskis sen gepatroj kaj li estis amata de neniu. La kunveno memorigis min al institucio de konfeso, aŭ lastatempe en Usono aplikata moda grupa psikoterapio.

La gridantoj de tokko aplikis la t.n. „*kensen*” metodon, nome ili neniam diris opinion aŭ valorklasifikon, prefere ili klopodis instigi la pensojn de la partoprenantoj per demandoj. Kiam la ĉ. dudekjara junulo rakontis sian vivcirkonstancojn, multaj ekkompatis lin kaj kelkaj junulinoj karesis lian kapon komplete. Antaŭ la unua kunsido ĉiu ricevis libron pri la esenco de jamagiŝismo. La libro havis kuriozan subtitolon: „*Kiel ni faru mondrevolucion?*”

Ĝis nun partoprenis similajn kursojn ĉ. 80-100 mil homoj. Sur la muro estis skribite, ke finintoj de tiu kurso ne plu konos koleron kaj malamon en la tuta vivo. Kaj tre multaj el ni vere alvenis en tiun staton. La trian tagon ekzemple ankaŭ la menciita ĉ. dudekjara junulo deklaris, ke li jam sentas, ke en sia koro ne plu estas malamo. Ankaŭ mi konvinkiĝis, ke oni plejofte koleras pro bagatelajo kaj ĝenerale kolero ne povas esti la solvo de problemoj.

En la kvara tago la tasko de nia grupo estis la lavado de la manĝilaroj post la manĝoj. (La 70 partoprenantoj estis dividitaj en 5

malpli grandajn grupojn.) Post la komuna laboro laŭ kutimo ĉiu diris siajn sentojn rilate al la aktuala „temo”. Mi trovis iom amuze fraŭlinon, kiu prenis tabulon en siaj manoj. Ŝi skribis la venontajn vortojn sur la tabulon kiel temo: „*Telerlavado estas puriĝo, puriĝo estas renaskiĝo*”. La komuna laboro cetere pasis en bona etoso.

Post la laboro la tokko daŭris per plia memesploro ligite al la unua ĉeftemo, t.e. „*kiu kial koleras*”. Tiam la trifoje enprizonigita kaj enfrenzulejigita junulo subite eksaltis kaj komencis bategi iun el la gvidantoj tiel forte, ke kvin homoj apenaŭ sukcesis haltigi lin. Intertempe li kriaĉadis: „*Ĉu vi ne koleras nun, kiam mi batas vin?*”

La atakita gvidanto diris nenion kaj ne rebatis. Post la sceno estis frosta silento en la salono por kelkaj minutoj kaj poste ĉiu daŭrigis la meditadon, se kiel okazintus nenio. Post iom da tempo la junulo diris, ke ĝis nun li fartis kiel kokino fermita en bestejo, sed nun li jam ne plu havas tiun senton. Aŭdinte tion la ĉeestantoj malpeziĝante ekspiris. Escepte min. Ĉar mi deklaris, ke mi ne plu volas resti ĉi tie, sed mi tuj reiros al Nagoya.

Mi diris tion, ĉar post la atako neniu telefonis al policejo aŭ al ambulancejo por peti medicinan urĝan helpon. Kaj mi aldonis, ke tio povos ripetiĝi ankaŭ nokte, kiam ĉiu dormas kaj tiam ni eĉ ne povas defendi nin. Pro tio la meditado tuj finiĝis. La gvidanto invitis min en apartan ĉambron kaj petis min resti almenaŭ unu tagon. Laŭ li tiamaniere mi povus savi la junulon, kiu ja ĝuste nun diris, ke li ne plu koleras al iu ajn.

Li aludis al gravaj homoj, eĉ al Jesuo, kiu mem konscie akceptis danĝeron. Fine li ofertis al mi apartan ĉambron por la nokto. Sed por mi jam sufiĉis la malbona etoso pro la agresiveco, tial mi tuj repetis miajn aĵojn por tuj foriri. La gvidantoj kaj pluraj homoj inter la partoprenantoj provis retenigi min. Sed vidinte mian persistecon foriri eĉ nudpiede se necesus, fine ili redonis al mi mian monon, ŝuojn, kaj ili portis min aŭte al la stacidomo. La adiaŭo estis malgaja, multaj ploris. Ankaŭ mi estis malgaja, sed mi revenis al Nagoya konvinkinte pli forte, ke tielmaniere oni ne facile povas „*finfari la mondrevolucion*”.



La televidturo en Sakae, en la centro de Nagoya troviĝas en bela parko kaj estas simbolo de la urbo.

## INDIANOJ DE LA EKSTREMORIENTO

Dum la somera universitata paŭzo mi sukcesis trovi kelkhoran laboron po semajno ĉe biblioteko en Nagoya helpe de ĝia hungardevena direktoro, profesoro Ábri Gyula. Li uzis la nomon Julius Aburi en Japanio. Posttagmeze mi laboris en la Internacia Komunika Salono (speciala anglalingva kafejo) kiel „*English speaking host*” (anglalingva akceptejisto kaj kunbabilisto de gastoj).

Eksterlandaj studentoj plenumis tiun taskon kutime, ĉiu laboris unufoje semajne. Tiu laboro signifas por mi ne nur laboron, sed ankaŭ eblon por pli bone ekkoni la pensmanieron de japanoj babilantaj en la salono. Miaspecaj gasto-kunbabilistoj estis plejparte usonanoj. Krom ili unu studento el Israelo kaj mi el Hungario laboris por tiu kafejo.

### **Mia kazo kun kantistino el Honolulu...**

Mia unua labortago jam preskaŭ finiĝis kiam vespere ĉirkaŭ je la 9-a horo japana junulo enpaŝis en la salonon. Kiel poste mi eksciis, li estis milionulido, parta posedanto de eta entrepreno, kaj samtempe ankaŭ unu el la gvidantoj de la entrepreno. Li diris, ke li havis hodiaŭ sian 24-an naskiĝtagon kaj li intencis festi tion en internacia kompanio. Tial li petis min post la fermo de la kafejo iri kun li al eleganta restoracio kie jam atendis nin sveda junulo kun sia japana amikino kaj hawaja kantistino.

La japana fraŭlino vizitis la saman universitaton en Nagoya kiun mi kaj tiel ni havis multajn komunajn temojn. Post la intensiĝo de la etoso la milionulido ebriiĝis kaj ronkante ekdormis. Tial mi devis akompani la honolulan kantistinon al sia hotelo. Tial mi venis hejmen nur je la kvina matene, kiam la unuaj sunbriloj de la leviĝanta suno komencis prilumi la ĉirkaŭajn montojn. Mi ne havis multe da tempo por dormi, ĉar je la naŭa mi jam devis denove komenci mian laboron en la biblioteko. Tiel post kelksemajna neniofarado fine jam en la unua labortago mi devis ankaŭ „kromlabori” iomete.

Intertempe mi ricevis oficialan inviton de la Mezjapana Teknika Universitato por fari du prelegojn por la Universitata Konsilio pri la

hungara universitata sistemo kaj pri mia propra faktereno. Temas pri miaj spertoj rilate al la operaciesploraj metodoj. Ĉar la honorario de la invititaj prelegantoj en japanaj universitatoj estas tre favora, ankaŭ ĝi kontribuis al la plistabiligo de mia financa bazo. Ĉar mi sukcesis fini la ununan semestron en la universitato kun rezulto „eminenta”, pro tio en la dua semestro mi gajnis ankaŭ socian stipendion de „Nanzan Tomonokai”. Ĉio ĉi ebligis iom plilongigi miajn studojn, kiuj estis origine planitaj por unu jaro.

En la dua semestro ŝanĝoj estis en la instruistaro. La prezidanto de la universitato, germandevena profesoro pri ekonomio Johannes Hirschmeier subite mortis. Li akiris gravan sciencan gradon en Harvard Universitato kaj per siaj fakaj libroj li signifece kontribuis al la elformigo de modernaj direktadoj de japanaj entreprenoj kaj al la evoluigo de la entreprenodirektaj sistemoj. La nova prezidanto fariĝis la usona profesoro Robert Riemer, kiu antaŭe laboris, kiel direktoro de la Logos Center. La dekanato de instruaj aferoj estiĝis japana profesoro pri lingvistiko, kiu revenis el Usono antaŭ kelkaj tagoj, kie li prelegis en diversaj universitatoj (Michigan, Columbia, ktp.) pli ol dudek jarojn.

En sia malferma salutparolo li klarigis, ke la famaj universitatoj de la mondo (Harvard, Oxford, Sorbonne, kaj aliaj) akiris siajn rangojn per selektado inter la studentoj. Li diris, ke ankaŭ nia universitato devas klopodi al tio. Tial kiu ne plenumas la kondiĉojn, tiu devas foriri antaŭ la planita fino. Tio ne estis granda instigo por la nova semestro. Tamen malgraŭ la pli altaj instruaj postuloj granda parto de la japanaj kaj la eksterlandaj studentoj sukcese plenumis la postulojn. Nian laboron multe plifaciligis la antaŭnelonge malfermita lingva laboratorio, en kiu ni povis uzi la plej monderajn magnetofonojn kaj kolorajn videomagnetofonojn.

## **Meditado en lotusa sido – kun dorsobatado**

Krom la japana lingvo kaj ekonomio mi studis ankaŭ komputil-teknikon kadre de la t.n. „direktita memstara esploro” sub gvido de profesoro Muramoto Masao. Krom tio mi ofte partoprenis en vizitado de entreprenoj por studi la japanajn direktadajn metodojn de

entreprenoj surloke. Inter tiuj vizitoj la plej memorinda estis mia vizito al la centro de aŭtofabriko Toyota en urbo Toyota. Antaŭ la enirejo granda anonctabulo sciigis, ke en tiu tago 4000 vizitantoj estis registritaj, ekde la jarkomenco 300 mil kaj ekde la fondo de la entrepreno ses milionoj.

Nanzan Universitato konscie klopodas, ke la tie studentaj eksterlandanoj studu ne nur la fakajn studobjektojn, sed konatiĝu ankaŭ kun la tradicia japana vivmaniero kaj diversaj branĉoj de kulturo. Tiucele estas organizataj specialaj studvizitoj.

En la dua semestro ni vizitis la faman budhistan monahejon Ejhejĝi por konatiĝi kun speciala tereno de la japana kulturo. Tielmaniere ni havis eblon aktive partopreni en la Zen-ekzercoj, kiujn oni instruis por estontaj monaĥoj kaj bonzoj. Dum nia restado tie ni devis respekti la regulojn de la trejnado kaj ni rajtis iri nur nudpiede en la domo. Antaŭ eniro al necesejo kaj banejo ni ĉiam devis kliniĝi. La trejnado estis mallonga, sed ĉiu okcidenta studento trovis ĝin malfacila.

Dum nia restado en Ejhejĝi ĉiuminute ni devis konscii, ke ni venis tien ne kiel turisto, aŭ kiel observanto, sed plentempa partoprenanto. Ĉe la vekiĝo je la 3.40 frumatene estis malvarme kaj ĉirkaŭ Ejhejĝi estis mistika mallumo en la montaro. Post sinlavado kaj konvena saluto al Budho ni estis pretaj al Zen-meditado. Ni iris frost-tremante al la meditejo, kie ni eksidis sur etajn kusenojn vid-al-vide al granda pentraĵo de la fama monto Fuĝi.

Antaŭ ni sur podio flave vestita bonzo montris la lotusan sidmanieron, havante la dekstran instepon sur maldekstra gambo kaj la maldekstran instepon sur la dekstra gambo. En la praktiko tio estas sufiĉe dolora kaj preskaŭ neeltenebla pozicio por okcidentano. Dum la meditado ni devis klopodi kontroli niajn pensojn. Por instigi tion junaj monaĥoj ofertis specialan servon. Rimarkinte foren pensantan partoprenanton, ili batis sur la dorson de la koncernanto per dufingrojn dika kaj 1.5-metrojn longa bastono. Laŭ plurjarcentaj spertoj oni povas diri, ke tiamaniere eblas efike teni la forvagantajn revojn. Kiam tiu servo estis aplikita, tiam la servoricevanto dankis la servon per kuntenitaj manoj kaj profunda kliniĝo.

## **Petolaj junulinoj en la monaĥejo**

Ni ĉiuj malpeziĝis, kiam fine de la ceremonio la vortoj „*Asa no zazen wa owarimas*” (t.e. la matena Zen-meditado finiĝis) estis aŭdeblaj. La dumtagaj programoj estis pli facilaj, kvankam ankaŭ tiam ni devis apliki la severajn regulojn de la monaĥejo. Sed kiam dum la nokto venis suben al ni tra la fenestroj la usonaj junulinoj loĝantaj en la supra etaĝo, tiam la leĝoj ŝajnis esti tamen ne tiom severaj.

Krom la ekskursoj organizitaj de la universitato mi havis eblojn vojaĝi ankaŭ pere de la esperanto-movado. Inter tiuj la unua estis mia vojaĝo al Sapporo, kiam mi partoprenis la Hokkajdo Esperanto-Kongreson. D-ro Yamaga, bonkora esperantista okulkuracisto sendis al mi 30 mil enojn por la vojaĝkostoj. Mi veturis per nokta ekspresa buso kaj poste per aviadilo al Hokkajdo, la plej bela insulo de Japanio. En la flughaveno de Ĉitose sinjoro Kodama atendis min kun du aliaj esperantistoj kaj post kelkhora urborigardo ni kune iris al la kongresejo.

Survoje en la aŭto laŭte bruis la muziko. Dekmil kilometrojn for de Hungario ni aŭskultis hungarlingvajn kantojn „*Akácok út*” kaj „*Hopp, de Zsiga*”. Kiel mi eksciis poste, tiujn kasedojn sinjoro Kodama ricevis de sia korespondamiko el Hungario kaj li volis komplezi al mi per ili. En la kongreso d-ro Yamaga raportis pri siaj spertoj en la budapeŝta Universala Kongreso kaj mi, kiel studento vivanta en Japanio mi denove traktis la temon: kiel mi vidas la japanan vivon.

Inter la partoprenantoj estis ankaŭ Aizaua Harue, kiu jam partoprenis ankaŭ en la unua Hokkajdo Esperanto-Kongreso antaŭ kvindek jaroj. Li rakontis al mia demando, ke la esperanto-movado komenciĝis en 1912 en tiu norda insulo, kiam Mita Noritaka, studento en Hokkajdo trovis esperanto-libron kaj lernis la lingvon. Poste fondiĝis diversaj esperanto organizaĵoj unu post la alia.

## **„Unuaklasa” civilizacio – kun duaklasaj indiĝenoj**

Krom la oficialaj programoj mi povis havi tempon ankaŭ por viziti la Hokkajdo Historian Muzeon. Tie mi rigardis filmon, kies titolo estis



„Ni konstruu novan Hokkajdon!” Mi vidis sur la unuaj bildoj, ke la indeĝenaj ajnuoj vivis pace en la insulo ĝis la komenco de la 19-a jarcento harmonie kun la naturo. Ili ne havis skribsistemon. Ili vivis fiŝkaptante, ĉasante, kolektante fruktojn kaj fungojn en la arbaroj ĝis la mezo de la jarcento. Laŭ ilia mondkoncepto ili respektis arbojn, ursojn, ŝtonojn kaj ankaŭ aliajn naturajn fenomenojn. Ĉirkaŭ antaŭ cent kvindek jaroj japanoj konkeris la insulon kaj ekde tiam la ajnuoj fariĝis duarangaj civitanoj en ilia patrujo.

Ilia sorto pluraspekte similas al la sorto de la amerikaj indianoj. Se ili volas promociiĝi, tiam ili ne povas uzi ilian gepatran lingvon, sed devas paroli japane kaj devas suferi pro la malavantajoj de la japana distinga politiko. (En unu el miaj antaŭaj artikoloj mi jam menciis similan distingon kontraŭ koreoj.) Gazeto Japan Times jam raportis pri kazo, kiam tokia turista grupo faris demandojn al maljuna ajnuo:

- *Ĉu vi vere ĉasas ankoraŭ ursojn per venenaj sagoj? En kiom profunda truo vi loĝas? Ĉu vi eble parolas ankaŭ japane?*

La maljuna ajnuo jam al kutimiĝante al la tiutipaj demandoj ne ofendiĝis, nur respondis mallaŭte:

- *Kiam mi aŭdas tiajn demandojn, tiam mi ofte pensas, ke mi ne komprenas japane.*

Poste en la Historia Muzeo vidinte la finajn bildojn pri konkero de la insulo fare de japanoj, aperis la rezultoj de la pioniraj laboroj. Novaj urboj, kanaloj kaj aŭtovojoj aperis baldaŭ sur la lokoj de la elhakitaj arbaroj kaj fine ankaŭ la flughavenoj, kiel la novaj fieraĵoj de la nova Hokkajdo. Vidinte tiujn bildojn mi ekpripensis, kion vere signifas la civilizacio en tiu norda insulo. Tio signifas sendube altvivnivelan industrian socion, sed ties prezo estis la pereigo de la ajnua civilizacio. Multaj ajnuoj japanigas ilian nomon kaj klopodas kaŝi ilian devenon, kvazaŭ tio estus hontinda.

Nuntempe oni multe parolas pri la lingva imperialismo. Laŭ iuj opinioj ne ekzistas lingva imperiismo, ĉar la lingvo ne povas esti imperiisma. Jes, ĝi certe ne povas esti, sed la posedantoj de certaj lingvoj vere povas esti imperiismaj. Laŭ la ekzemplo de Hokkajdo

kaj multaj aliaj ŝajnas al mi, ke nuntempe la lingva imperiismo estas integra parto de la multaspeca ĝenerala imperiisma politiko.

Nuntempe okazas jam tre malofte, ke tutaj popoloj estus fizike ekstermataj, kiel ekzemple la romianoj ekstermis la popolon en Karthago, kie „ne restis ŝtono sur ŝtono”. Tamen ankaŭ nuntempe antaŭ niaj okuloj malaperas popoloj, naciecoj kaj kulturoj, ĉar la uzon de ilia gepatra lingvo iuj pli grandaj kaj pli fortaj popoloj ne permesas, aŭ limigas. Kaj tion povis forgesigi nek en Hokkajdo, nek en aliaj lokoj de la mondo la novaj nuboskrapantaj domegoj, la aŭtomatigitaj industriaj konstruaĵoj kaj la aliaj teknikaj mirakloj de niaj modernaj socioj.



Abundas belaj statuoj en urbo Nagoya

# FLEKSIĜEMO DE LA BAMBUO KAJ LA TAO-FILIZOFIO

La bambuokanoj estas la simboloj de la japana kliniĝo. Ĉiujare ŝtormoj marŝas super ili, sed ili travivas ankaŭ la plej fortan tajfunon pro ilia klineblo kaj vivas 70-80 jarojn. En mia universitato en Nagoya ankaŭ inter la eksterlandaj studentoj trairis ŝtormoj en la pasinta jaro. En nia klaso, kie antaŭ unu jaro ni komencis lerni la japanan lingvon tiom fervore, nur mi restis en la universitato – atingante la diplomon.

Sed ankaŭ por mi ne estis senproblema tiu ĉi jaro. Ne estis facile konformi al la severaj kondiĉoj de la japanaj universitatoj. Ne estis facile elteni la stufan varmon de la frusomera pluva vetero, kiam mi fartis dum la tuta tago kiel en vaporbanejo. Estis iom malagrabla ankaŭ la kutima nehejtado en la japanaj loĝejoj, dum la tuta vintro mi devis sidadi apud mallongpieda tablo nomita „kotatsu” por iom varmiĝi per elektra lampo sub la tablo.

## Postvivo de kolonia serĝento

Sed miaj ĉefaj malagrablaĵoj venis ne el la menciitaj cirkonstancoj, sed pro speciala loĝejkondiĉo. En la unua semestro mi devis vivi kun malafabla japana maljunulo, kiu malpermesis al mi longe uzi la lampon kaj se iu serĉis min telefone, li diris, ke mi ne loĝis tie.

Kiel mi poste eksciis, li estis serĝento de la japana kolonia armeo en la okupita Manĉurio dum la dua mondmilito. Verŝajne li ankoraŭ kvardek jarojn post la fino de la milito volis paroli kun eksterlandanoj en tiu tono, kiel li kutimis kiel serĝento en Nordorienta Ĉinio. Miaj esperantistaj konatoj rakontis, ke estis similaj konfliktoj en multaj japanaj familioj kaj laŭ la socia ordo en tiuj kazoj ĉiam la pli junaj kaj socie malpli altaj homoj devas retiriĝi kaj cedi.

- *Kial vi ne prenas la ekzemplon de la bambuokano?* - demandis mia japana amiko. – *Vi vivas jam longan tempon inter ni, vi vivas nian ĉiutagan vivon, vi komprenas nian lingvon, sed la pensmanieron de japanoj vi ankoraŭ ne sufiĉe konas. Ĉu vi scias,*

*kion sginifas taoismo? - li demandis.*

- *Iu ĉina filozofia skolo – mi respondis.*
- *Ĝia origino estas vere ĉina – respondis mia kunparolanto – sed ĝia efiko estas sentebla ankaŭ en la japana pensmaniero. Ĝia esenco estas, ke ni devas esti tiaj, kiel spegulo, kiu ĉiam rebrilastion, kio estas antaŭ ĝi. Aŭ uzante alian ekzemplon: la ideala homo estas kiel akvo, kiu havas ĉiam la formon de la ujo, en kiu ĝi estas verŝita. Se vi konsiderustion, vi havus mapli da konfliktoj en via vivo – li aldonis.*

Nun, kiam mi jam finis miajn ĉiujn ekzamenojn en la universitato kaj sukcese plenumis la sciencajn kaj kulturajn programojn de mia japana studvojaĝo, mi devas konfesi, ke mi ankoraŭ bezonas lerni de la bambuokano.

Proksimiĝinte al la finekzamenoj mi havis malpli da tempo por privata vivo, sed poste preskaŭ ĉiutage mi ricevis invitojn, kiujn mi volis nepre akcepti. Miaj nagoyaj amikoj volis adiaŭi min ĉiuj aparte. Ekzemple la kunlaborantoj de la spickomerca entrepreno Ajinomoto aranĝis por mi grandskalan akcepton pro mia vojaĝo hejmen, ĉar mi instruis la anglan lingvon al ili en la vesperoj. Tiam ni devis gustumi almenaŭ dudek diversajn manĝospecialaĵojn. Mi havis poste stomakperturbon, unue dum mia pli ol unujara restado en Japanio. Post kelkaj tagoj ankaŭ la grand-prestiĝa Japana-Orienteŭropa Amika Societo invitis min al akcepto.

## **Vespermanĝo ĉe la atomfizikisto**

Ĉar mi ricevis la vizon por unu jaro, mi devis aranĝi ankaŭ la oficialajn aferojn pro la plilongigo. Tiu lasta tasko ne estis facila. Kelkaj studentoj ĝuste pro vizoproblemoj devis forlasi Japanion antaŭ la planita tempo. Unue oni postulis ankaŭ de mi diversajn garantiajn leterojn, aviadilbiletojn kaj similajn dokumentojn, kiujn mi ne povis montri, ĉar la reirbileton mi ne ricevis al mia mano ĝis la tago de mia reveturo.

Mi havis pli grandan sukceson la duan fojon, kiam mi volis aranĝi la aferon de mia vizo. La oficisto de la Enmigra Oficejo komunikis kun

mi nur japane kaj demandinte kiom da mono mi havis, subite mi konfuzis la ciferojn. Mi respondis, ke mi havis ĉ. unu milionon da enoj (ĉar en Japanio la mongrupo-nomoj ŝanĝiĝas ne po mil, sed po dek mil). Aŭdinte tion la oficisto rigardis min kun surprizo kaj li pensadis, ĉu aspektas tiel la milionuloj, kiel mi. Fine li diris nenion, nur ŝtampis la plilongigon de la vizo en mian pasporton senvorte.

Intertempe mi finis miajn prelegojn ankaŭ en la Mezjapana Teknika Universitato (japane: Chubu Daigaku). Post la lasta prelego la vicprezidanto de la universitato invitis min al vespermanĝo al sia loĝejo. Tie ni parolis pri tre seriozaj problemoj post la rostita bovaĵo kovrita per ananaso. Profesoro Katsumori estas la gvidanto de la Atomfizika Katedro, tial la ebloj de eventuala atommilito forte malpacienigas lin. Laŭ lia tezo nuntempe eblas provizi unu rakedon per dek eksplodaj kartoĉoj kaj unu el tiuj kartoĉoj estas dumiloble pli forta, ol la atombombo ĵetita al Hiroŝimo. Li aludis al atomfizikisto Carl Sagan, profesoro de Universitato Cornell, laŭ kiu 20 procentoj de la tuta deponita nuklea povo sufiĉus tute neniigi la vivkondiĉojn en la terglobo.

## **Unika kolektaĵo de la legenda Yamada**

Profesoro Katsumori vidas eliron el la nuntempa danĝera monda situacio nur per radikala ŝanĝo de internaciaj politika kaj socia strukturoj. Li diris, ke li apartenas al la „*Mondfederista movado*”. La celo de la movado estas, ke ĉiu lando rezignu pri milita solvo de politikaj problemoj kaj konforme al tio samtempe oni devus realigi la kompletan militan malarmadon en ĉiu lando – kun internacia kontrolo...

Mi akceptis honorigan inviton de la 82-jara Yamada Tempu, granda veterano de la japana esperanto-movado. Yamada lernis la internacian lingvon jam en la tria klaso de la mezlernejo de fama japana esperantisto, Isimure Yosimi. Poste li transprenis la kimonovendejon de siaj gepartroj kaj krom tio li aktive partoprenis ankaŭ en la multflanka agado de la esperanto-movado. En 1924-25 ekzemple li redaktis la posemajnan esperanto-rubrikon en la taggazeto de gubernio Aichi.

En la lastaj jaroj li jam ne povas partopreni en la movadaj eventoj pro sia aĝo, sed li fondis premion Yamada por helpi la movadon tiamaniere. Tiu esperantisto ricevas la premion, kiu la plej multe partoprenis la pasintjarajn kunvenojn. Sinjoro Yamada skribis en sia invitletero al mi, ke li pere de la gazetaro jam unu jaron sekvas mian „sanktan agadon” por la antaŭenigo de la japana esperanto-movado, tial li forte deziras renkonti min persone. Mi embarasiĝis, ĉar mi jam delonge atendis tiun renkonton. Mi bone konis la profunde pensigantajn esperantlingvajn poemokolektojn de Yamada kaj mi sciis, ke lia persono estas legenda en la medioj de la esperanto-movado.

Kiam mia vizito okazis, tiam mi povis observi lian faman praŝtonan kolektaĵon, pri kio jam ankaŭ la televido faris filmon antaŭe. Kelkaj pecoj de la kolektaĵo estas en pli bona stato, ol similaj objektoj en la Nacia Muzeo, aŭ en la Tokia Universitato. Esplorante la praŝtonojn en la kolektaĵo aperas antaŭ ni la spuroj de la plurcent milionjara evoluohistorio de la vivo en la Tero. Pro tio la pensoj de profesoro Katsumori en la vespermanĝo ricevis alian nivelon: kvankam la vivokondiĉojn eblas neniigi en la Tero en kelkaj minutoj, por ĝia evoluo plurcent milionoj da jaroj estis bezonataj.

## **„Sajōnara Japan”**

Fine (post la lastaj invitoj kaj adiaŭvizitoj) la 8-an de januaro alvenis la tago de mia hejmenveturo. Post pli ol unu jaro mi adiaŭis al la Lando de Leviĝanta Suno. En la minutoj de le ekiro viciĝis antaŭ miaj okuloj miaj novaj amikoj kaj konatoj: la veteranaj kaj junaj esperantistoj, profesoroj de diversaj japanaj universitatoj kaj la kunstudentoj venintaj el kvin kontinentoj. Mi plenumis la planitan celon, tiel post paso de ĉio nek miaj malfacilaĵoj ŝajnis esti neelte-neblaj.

Dum la pasintaj tempoj ankaŭ mi iom japaniĝis. Mi al kutimiĝis al la bluaj kaheloj sur la domtegmentoj kaj mi lernis, ke rostitan viandon kaj raguon oni devas manĝi kun dolĉa saŭco kaj la akvomelonon salite. Simile al la aliaj vojaĝantoj ankaŭ mi kriis emocie kaj kortuŝe el la ŝipo en la haveno de Jokohama: „Sajōnara Japan”. Tio signifas: „*Se estas tiel, ni devas akcepti tion*”.

En la ŝipo mi renkontis du hungarajn kunvojaĝantojn. Marista oficiro konatigis nin kaj tiel ni komencis paroli unu al la alia. La ĝis tiam nekonata kunvojaĝanto prezentis sin kaj poste li donis al mi artikolserion pri Japanio. Li menciis, ke por prepari sian studvojaĝon al Japanio, li uzis tiujn verketojn hejme kaj ankaŭ en Japanio. Por tio li kopiis la artikolojn kaj kunportis ilin dum sia vojaĝo en la Ekstremoriento.

Li rakontis, ke li estis invitita de la japana eduka ministerio. Li laboris, kiel universitata intruisto kaj tiamaniere li ricevis eblon fari fakan rondvojaĝon kaj studvojaĝon en la Ekstremoriento. Dum sia studvojaĝo li vizitis lingvoinstruajn katedrojn en diversaj japanaj universitatoj. Mi eksciis, ke mia kunvojaĝanto estis Bakonyi István, universitata docento kaj unu el la gvidantoj de la fremdlingvaj katedroj en la Ekonomika Universitato en Budapeŝto. Do klariĝis, ke li proponis al mi legi mian raportserion verkitan por Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo), kies lasta ĉapitro estas nun legata de la estimata leganto...

Post tritaga ŝipveturo mi veturis plu per trajno. La transsiberia ekspresa trajno kutime alvenas laŭ minuta precizeco al stacioj, kvankam la distanco inter ili estas plurcent kilometroj. Mi spertis tiun precizecon ankaŭ en la japanaj fervojoj. (Pri tio miaj amikoj rakontis al mi, ke iam antaŭ dek jaroj japana trajno tamen malfruis 15 minutojn kaj iu tutlanda taggazeto traktis tiun temon en titolpaĝa kolumno.)

Post ŝanĝo de la trajno en Moskvo mi daŭrigis la vojon per Tisza-eksprestrajno al Hungario. Ankaŭ tiu trajno alvenis ekzakte laŭhorare al Záhony, la hungara-sovetia landlimo, eĉ ĝis urbeto Szajol. Tie ĝi haltis ĉe ruĝa signalilo por kelkaj minutoj kaj ĉe Kőbánya ĝi tute haltis. Por la lasta okkilometra vojo ĝi bezonis unu kaj duonan horon. Venontan tagon mi trafolumis la budapeŝtajn tagajn gazetojn kaj mi trovis nenie artikolon menciintan kial Tisza-ekspres malfruis la 20-an de januaro en 1984. Do mi alvenis hejmen.

## Dua parto

# EVENTOJ EN EŬROPO



Post sia revojaĝo al Eŭropo la aŭtoro konstruis tre viglajn internaciajn rilatojn inter la orientaziaj landoj kaj Hungario. Li invitis japanajn, ĉinajn kaj koreajn profesorojn por prelegi en la budapeŝtaj universitatoj kaj ankaŭ multaj turistaj kaj esperantistaj grupoj vizitis sian domon en la hungara ĉefurbo. Li montris al Ho Song, korea artpentristo urbon Szentendre, la loĝlokon kaj laborlokon de multaj hungaraj artpentristoj. Vizitante la ekspoziciojn tie ankaŭ Ho Song pentris la szentendran pejzaĝon kun la aŭtoro promenantante sur la stratoj de tiu fama mezepokstila hungara urbeto.



## STULTETA ĴURNALISTO KAJ AZENA AMO

Okazis dum la dua mondmilito en naciista koncentrejo en urbo Mauthausen, ke Szenes Imre, 15-jaraĝa hungara juda knabo babiladis kun samaĝa hungaro. Ĉirkaŭ ili oni mortigis centojn aŭ milojn da homoj ĉiutage kaj la estonto ŝajnis esti senespera. Tamen la juna Imre estis naive tro optimisma, esperis, ke li sukcesos travivi la militon. Li diris al sia amiko tro naive, ke post la fino de la milito li volos fariĝi ĵurnalisto.

La alia knabo pensadis pli reale kaj li opiniis, ke tute ne estos ŝanco por ili travivi la militon. Dum tiu tempo en Hungario oni uzis specialajn vortojn por esprimi nerealajn kaj malficele kredeblajn aferojn. Ekzemple kiam malriĉulo diris, ke li gajnos la plej grandan sumon en la loterio kaj fariĝos milionulo baldaŭ, oni respondis jene:

- *Vi fariĝos milionulo, kiam mi estos ambasadoro en Turklando.*

Ankaŭ la alia knabo diris la samajn vortojn al Imre:

- *Vi fariĝos ĵurnalisto, kiam mi estos ambasadoro en Turklando.*

Poste monatoj pasis post monatoj, la koncentrejo liberiĝis, la milito finiĝis, kaj bonŝance ambaŭ junaj knaboj travivis. Ili do hejmenvojaĝis, membriĝis en la Komunista partio kaj entuziasme komencis labori por konstrui novan socion post la terura milito. La partio sendis Imre por studi en kelkmonata kurso kaj post la fino de la kurso li komencis labori en la redakcejo de komunista ĵurnalo, kiel komencanta ĵurnalisto.

Je la komenco lia tasko estis viziti la tribunalon kaj raporti pri interesaj krimaferoj. Li laboris diligente kaj verkis raportojn regule por sia tagĵurnalo. Li pensis, ke se la legantoj legas interesajn artikolojn en la komunista ĵurnalo, tiam ili abonos la ĵurnalon kaj ne plu legos organojn de aliaj politikaj partioj kaj movadoj.

Sed foje-foje okazis, ke tute ne estis interesaj krimaferoj en la tribunalo. Okazis ankaŭ, ke la traktado de la aferoj estis en fermaj ĉambroj, do la aferoj ne estis publikaj. Tiam li povis raporti nenion. En tiuj kazoj li diligente vizitis la juĝistojn kaj persiste petis ke ili

informu lin pri interesaj aferoj por sia ĵurnalo. Post kiam li petis maljunan juĝiston multfoje paroli pri interesaj krimaferoj en la tribunalo, la juĝisto diris al li:

*- Rigardu, juna homo. La afero ne estas publika, tamen, se vi volas informi viajn legantojn pri tio, mi informas vin pri la afero. Antaŭ tagoj okazis, ke farmbienulo kaj du kamparanoj havis seriozan disputon kaj ili ne povis solvi la problemon amike. Do ili petis, ke la tribunalo decidu.*

*La unua kamparano havis azenon kaj la dua havis azeninon. La azeno kaj la azenino promenis unu apud la alia kaj okazis ke ili komencis seksumi en la kampoj. Dum la seksumado ili detruis la kampon kaj la farmbienulo ordonis, ke la bestposedantoj kompensu la damaĝon.*

*La kamparanoj ne konsentis kiu el ili pagu la pagendan sumon. La posedanto de la azenino diris, ke la azeno komencis la seksumadon, do li kaŭzis la damaĝon. Sekve de tio la posedanto de la azeno devas pagi.*

*La posedanto de la azino diris, ke la azenino kaŭzis la aferon ĉar ŝi estis tro flirtema kaj koketis kun la azeno. Ili disputis kaj neniu volis pagi. Pro tio la farmbienulo raportis la aferon al la juĝejo kaj petis ke juĝisto decidu.*

*La juĝisto ne estis fakulo en agrikultura faktereno, do ordonis, ke zoologo klarigu kiel azenoj seksumas. La zoologo klarigis ke dum la seksumado la azenino staras sur kvar piedoj kaj la azeno staras sur du piedoj. Liaj aliaj du piedoj estas sur la dorso de la azenino.*

*Laŭ tio la juĝisto konkludis ke ambaŭ bestoj detruis la kampon per ses piedoj. La azenino detruis la kampon per siaj kvar piedoj kaj la azeno faris la samon per siaj du piedoj. Do ili kune kaŭzis la damaĝon kaj pro tio ambaŭ bestposedantoj devas pagi monon por rekompensi la damaĝon. La posedanto de la azenino devas pagi kvar sesonojn de la damaĝo kaj la posedanto de la azeno du sesonojn.*

La juna ĵurnalisto dankis la informojn kaj tuj raportis la aferon en sia ĵurnalo. Kvankam la afero ŝajnis esti stranga, tamen okazis vere, ke

la raporto aperis en la venonta numero de la komunista tagĵurnalo.

La verketo aperis kaj baldaŭ fariĝis granda skandalo. En alia ĵurnalo oni aperigis artikolon pri la afero kaj en tiu artikolo oni mokis la ĵurnaliston de la komunista tagĵurnalo. La titolo de tiu artikolo estis „*Stulteta ĵurnalisto kaj azena amo*”. (Tiu artikolo vere aperis kaj la originala hungarlingva titolo de la verketo estis „*A csacska újságíró esete a csacsi szerelemmel*”.) En tiu artikolo oni klarigis, ke tiu afero neniam okazis. Tio estis nur populara anekdoto en la jura universitato

La redaktoro de la komunista ĵurnalo koleregis. Li diris al Szenes Imre, ke li detruis la reputacion de la komunista ĵurnalo kaj pro tio minacis ke li maldungos la entuziesman junan ĵurnaliston. Sed poste oni decidis ne puni lin tre serioze kaj tiel Szenes Imre havis eblon fari signifecan karieron kiel ĵurnalisto.

Poste li fariĝis parlamenta ĵurnalisto. Lia tasko estis raporti pri eventoj en la hungara parlamentejo. En la kvindekaj jaroj okazis, ke multaj altrangaj ŝtatoficistoj, registaraj estroj kaj diplomatoj renkontiĝis en la hungara parlamentejo kaj Szenes Imre faris intervjuojn kun la partoprenantoj. En la amaso li vidis ankaŭ sian malnovan amikon kun kiu ili kune pasigis la terurajn tagojn en la naciista koncentrejo dum la milito en Mauthausen.

Ankaŭ tiu homo rekonis sian amikon, kiun li ne vidis dum multaj jaroj post la milito. Li iris al Szenes Imre kaj demandis kion li faris en la parlamentejo. Szenes Imre kun ĝojo diris ke li fariĝis ĵurnalisto kaj li verkis artikolojn pri parlamentaj aferoj por ĵurnaloj. La malnova amiko demandis:

- *Ĉu vi rememoras, kion mi diris al vi en la koncentrejo, kiam vi parolis pri via plano, ke vi volos fariĝi ĵurnalisto? Mi diris al vi, ke vi fariĝos ĵurnalisto, kiam mi estos ambasadoro en Turklando.*

Szenes Imre redemandis:

- *Kio nun vi estas?*

- *Mi estas la ambasadoro de Hungario en Turklando.*

## MIA AGADO DUM LA KOMUNISMO

Dum la sepdekaj kaj la okdekaj jaroj la Hungaria Esperanto Asocio estis forta socia movado en Hungario. La organizo ricevis ŝtatan financon subtenon, dungis kelkajn oficistojn kaj eldonis multajn librojn kaj en Esperanto kaj en hungara lingvo. La ŝtato aprezis, ke la asocio popularigis la hungaran kulturon eksterlande.

Dum tiu tempo Szenes Imre estiĝis la redaktoro de la revuo „Mondo kaj Lingvo” (en hungara lingvo: „Világ és Nyelv”). Krom tiu posteno li laboris, kiel ĵurnalisto ankaŭ por la hungara tutlanda sindikata ĵurnalo. Li estis tre entuziasma, same kiel en sia juneco dum la kvindekaj jaroj.

Kiam li informiĝis, ke mi ricevis stipendion de japana entrepreno Verda Stelo, li petis, ke mi regule raportu pri miaj travivaĵoj en la ekzotika orientazia lando. Mi faris tion kaj tiamaniere okazis, ke dum unu jaro kaj duono miaj artikoloj pri mia studenta vivo en Japanio regule aperis hungarlingve en tiu organo. Tiam nur malmultaj hungaroj havis eblon studi en japana universitato kaj pro tio multaj legantoj informiĝis pri la japana socia kaj ekonomia vivo per miaj verketoj.

Legante miajn raportojn ankaŭ multaj aliaj organoj petis ke mi verku artikolojn por ili pri la rezultoj de la japana mikro-elektronika industrio, pri la orientazia ekonomia evoluo, pri la japana lingvo kaj kulturo, kaj ankaŭ pri multaj aliaj temoj. La hungarlingvajn verketojn, kiuj originale aperis en la „Mondo kaj Lingvo”, oni reaperigis en la organo „Geofizikaj Novaĵoj”, en la ĵurnalo de la Minista Sindikato kaj ankaŭ en la revuo de la tutlanda Petrola Korporacio.

Tiamaniere mia nomo jam fariĝis konata en Hungario, kiam mi finis mian studadon en la mezjapana urbo Nagoya. Post la fino de mia japana studprogramo mi hejmenvojaĝis al Hungario, kaj laŭ la rezultoj de mia esplorkonata en Nanzan Universitato, mi doktoriĝis en la Budapeŝta Ekonomikosciencia Universitato. Tiam nur malmulte da hungaroj povis havi ŝancon studi en okcidenteŭropaj, amerikaj aŭ

japanaj universitatoj. Pro tio ankaŭ la profesoroj de mia universitato interesiĝis pri miaj sciencaj kaj fakaj spertoj.

Vidante la sukceson de la japana ekonomio tiam estis granda interesiĝo kaj en Hungario kaj en Orienta Eŭropo kiel la japana ekonomio funkciis, kiel la japana komputila industrio estiĝis tiel sukcesa kaj kiel Japanio povis fariĝi la dua plej granda ekonomia povo de la mondo en la jaro 1968. Alivorte, multaj sociosciencistoj analizis la japanan ekonomian evoluon kaj intencis kompreni la kialon de la japana ekonomia miraklo.

En la okdekaj jaroj la japana komputila industrio estis mondscale fama kaj sukcesa kaj pro tio ankaŭ la redaktoro de la tutlanda periodaĵo „Komputtekniko” petis, ke mi verku por tiu organo. La eldonanto de tiu monatĵurnalo komprenis kian grandan kaj gravan rolon la malproksim-orientaj landoj havis kaj povos havi en la evoluo de tiu industrio kaj pro tio petis ke mi fariĝu kunredaktoro de la periodaĵo.

Sed ne nur en Hungario oni interesiĝis pri tiu temo. Oni organizis konferencojn en multaj eŭropaj landoj pri tio kaj inter aliaj, ankaŭ la Pola Akademio de Sciencoj invitis min al Pollando por prelegi pri niaj rezultoj en Hungario, kiel ni intencis evoluigi nian ekonomion per la adapto de la japanaj ekonomiodirektaj metodoj. Dumtempe la hungara registaro, por la unua fojo en la orienteŭropa komunista mondo akceptis novajn regulojn kaj permesis, ke oni fondu privatajn entreprenojn en la lando.

Por informi skandinaviajn entrepreno-posedantojn kaj kuraĝigi ilin investi monon en Hungario mi vojaĝis al Svedio kaj prelegis pri tiu nova situacio en multaj universitatoj, urbodomoj, bibliotekoj, ktp. En la kadro de tiu rondvojaĝo oni petis, ke mi prelegu pli detale pri miaj spertoj en la Karlskoga Popolaltlernejo. Pri tio oni publikigis unupaĝan raporton en la ĵurnalo „Karlskoga Tidning” en sveda lingvo. Bonŝance ankaŭ konkretan rezulton oni sukcesis atingi tie, la estroj de iu mezsveda industria korporacio petis, ke mi helpu fondi novan svedo-hungaran komunan entreprenon kaj petis, ke ankaŭ mi estu direktoro kaj posedanto de la nova entrepreno. Per tiu entrepreno

ni povis importi bonkvalitajn skandinaviajn industiajn produktaĵojn al Hungario.

Dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj estis speciala reformprogramo en la hungara agrikulturo. Tiam estis ĝenerala regulo en la komunista mondo, ke funkciado de privataj entreprenoj estis aŭ malpermesita aŭ malfaciligita. Sed en Hungario la registaro permesis, eĉ kuraĝigis la parttempan funkciadon de privataj entreprenoj en agrikulturo kaj la rezulto estis tre bona. La tutlanda agrikultura produktaĵo fariĝis tre alta, verŝajne la plej alta en la komunisma mondo laŭ la rezulto de tiu reformprogramo.

Multaj komunismaj landoj, inter aliaj ankaŭ Ĉinio interesiĝis pri la hungaraj spertoj. Tiam la Ĉina Sociosciencia Akademio organizis konferencon en Pekino kaj oni petis, ke ankaŭ mi partoprenu kaj prelegu pri niaj spertoj kaj konkludoj. Mi raportis niajn rezultojn en la konferenco kaj proponis, ke ankaŭ en Ĉinio oni kuraĝigu la evoluon de privataj entreprenoj en la nacia ekonomio. La partoprenantoj ŝatis la ideon kaj je la fermo de la konferenco oni petis, ke mi koncize resumu la spertojn de la konferenco, kaj la Ĉina Sociosciencia Akademio publikigis miajn prelegojn ambaŭ en Esperanto kaj en ĉina lingvoj.

Post la konferenco profesorino de kantona Jinan Universitato petis, ke mi vojaĝu al Suda Ĉinio kaj prelegu pri la temo ankaŭ en la kantona universitato. Tie oni ankaŭ konsentis kun miaj konkludoj kaj proponoj kaj informis min, ke estis speciala ekonomia zono ĉe la hongkonga landlimo, kie oni jam permesis fondi komunajn privatajn entreprenojn. Do oni proponis, ke mi vojaĝu ankaŭ al urbo Shenchen, la speciala ekonomia zono, kie la ĝenerala direktoro petis, ke mi informu niajn eŭropajn entreprenojn pri tiu nova ebleco de investo en la ĉinan ekonomion.

Mi faris tion per kelkaj prelegoj kaj artikoloj en diversaj publikaĵoj kaj kun granda ĝojo rigardis kiel sukcese tiuj komunaj entreprenoj funkciis dum la lastaj du jardekoj. En la kantona universitato en mia prelego proponis al Ĉinio ke ili permesu la funkciadon de privataj entreprenoj en la ĉina ekonomio ne nur en la specialaj ekonomiaj

zonoj sed en la tuta lando. Tiam la partoprenantoj de mia prelego ridete diris al mi, ke mia propono ne estas aktuala.

Sed post kelkaj jaroj tio fariĝis esti aktuala kaj laŭ la decido, ke la ĉina ŝtato permesis, eĉ kuraĝigis la funkciadon de privataj entreprenoj en la tuta lando, la ĉina ekonomia evoluo fariĝis nekredeble alta, kaj evidentiĝis, ke Ĉinio fariĝas pli kaj pli riĉa. Baldaŭ Ĉinio eble havos la plej grandan kaj gravan ekonomion en la tuta mondo.



La statuo de d-ro Sun Yat Sen, fondinto de la moderna Ĉinio

## POST LA POLITIKAJ ŜANĜOJ

Post la politikaj ŝanĝoj en Orienteŭropo oni reprivatigis la ŝtatajn entreprenojn en Hungario kaj ankaŭ la Hungara Petrola kaj Gasa Korporacio fariĝis privata entrepreno. Tiam ĝi estis la plej granda industria organizo en Hungario kaj antaŭe estis tempo, kiam pli ol kvindek mil personoj laboris por tiu entrepreno. Post la politikaj ŝanĝoj oni elektis min esti strategia manaĝero de la korporacio. Mia tasko estis analizi la kostojn kaj la profiteblecojn de diversaj investoj en Eŭropo, Azio kaj en Afriko.

Multaj amerikaj institucioj aĉetis akciojn de tiu entrepreno kaj pro tio oni decidis, ke ni enkonduku la samajn entrepreno-gvidantajn metodojn, kiuj estas kutime uzitaj en Ameriko. Pro tio oni sendis min al Usono (al urbo Boston en ŝtato Massachussets) por partopreni studprogramon. Dum la jaroj, kiam mi laboris por tiu korporacio, mi devis multe vojaĝi. Ni havis projekton en Tunizio (Norda Afriko) kaj ankaŭ en Kazahstano kaj Ruslando (Azio), do mi regule devis viziti tiujn lokojn. Krome, ni ankaŭ intencis trovi novajn investeblojn en aliaj lokoj, do mi vojaĝis ankaŭ al Turklando, Turkmenistano, Irano, Saud-Arabio, Kuvajto, Dubajo, Pakistano kaj al la Arabaj Emiratoj, ktp., kaj kompreneble ankaŭ al preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj.

Mi devis al kutimiĝi al diversegaj vivkondiĉoj. Foje okazis, ke mi devis tranokti en dezerto, foje en luksa hotelo. Estis granda honoro por mi konatiĝi kun multaj famaj sciencistoj kaj politikistoj kaj industriaj investuloj en la mondo kaj estis speciala honoro por mi kune havi tagmanĝon kun multaj reĝoj aŭ ŝtatprezidantoj. Speciala okazaĵo estis por mi kune tagmanĝi kun la kuvajta emiro, kiam la reprezentantoj de mia lando vizitis tiun regionon de la mondo por la unua fojo por malfermi eblojn por novaj rektaj komercaj interrilatoj post la kvardekjara komunista izolita ekzisto.

En la naŭdekaj jaroj jam estis forta socia movado en Hungario, kiu intencis helpi la landon por ke ni povu pli rapide kaj pli facile aliĝi al la Eŭropa Komunumo. Tiam jam la politiko de la Eŭropa Unio estis la sama, do ankaŭ ili intencis helpi la realigon de tiu celo kaj la



Eŭropa Komisiono finance subtenis tiun preparlaboron. Tiam mi decidis labori, kiel financa kontroloficulo kun la tasko analizi la uzadon de la EU subvencio kaj raportoj ĉu oni laŭ reguloj uzis la monon de la EU budĝeto aŭ ne.

Poste mi fariĝis estro en nia parlamenta kontrolo kaj aŭditora oficejo. Je la komenco mi respondecis pri kontrolo kaj aŭditorado de la hungara Ĉefministra Oficejo kaj diversaj ministrejoj kaj departamentoj de la hungara registaro. En la naŭdekaj jaroj estis celo de multaj orienteŭropaj landoj aliĝi al la Eŭropa Unio. Tiam ankaŭ multaj okcidenteŭropaj landoj, inter aliaj ekz. Danlando havis la ideon helpi la realigon de tiucelaj projektoj de la orienteŭropaj landoj. Oni intencis helpi la landojn de la iama komunista mondo, por ke ili pli facile povu enkonduki demokratian politikan sistemon kaj por ke ili pli facile povu aliĝi al la jam ekzistanta demokratia Eŭropa Komunumo.

Ne estas konate, ke la dana registaro kaj ankaŭ la dana Esperantomovado efike partoprenis en tiu laboro kaj la dana Ministrejo por Eksteraj Rilatoj finance subtenis tiun projekton. Konkrete, la Eŭropa Instituto en Kopenhago invitis 20-25 ŝtatoficistojn el ĉiuj komunistaj aŭ ekskomunistaj orienteŭropaj landoj al Danlando kaj senpage gastigis ilin en la dana ĉefurbo kaj ofertis specialan studprogramon por informi ilin pri la funkciado de la tuteŭropaj institucioj (Eŭropa Parlamentejo, Eŭropa Komisiono, Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj, ktp.)

En Hungario nia Ministrejo por Eksteraj Rilatoj organizis tiun projekton kaj inter aliaj ministrejoj oficistoj oni ankaŭ min elektis sendi al Kopenhago por partopreni la studprogramon. Tiam mi jam estis kompetenta estro en la hungara parlamenta kontrol-organizo kiu respondecis pri aferoj rilate al la membriĝo de Hungario al la Eŭropa Unio. Tiel okazis, ke tiamaniere mi povis rekte konatiĝi kun la dana vivmaniero kaj pensmaniero en Kopenhago je la komenco de la naŭdekaj jaroj en la lasta jarcento.

Krom la kopenhaga Eŭropa Instituto estis ankaŭ aliaj institucioj en Danlando, kiuj provis helpi la reunuigon de Eŭropo por konstrui pli

efike funkciadan, pace kaj harmonie evoluantan grandan komunumon en la malnova kontinento. Inter ili la plej grava estis la Esperanto-Forumo (en dana lingvo: Esperanto Forum). La prezidanto de tiu institucio estis iama oficisto en la Eŭropa Komisiono en Bruselo kaj post emeritiĝo li havis la ideon fondi Esperanto-Forumon por helpi la orienteŭropajn landojn por ke ili pli facile povu aliĝi al la Eŭropa Unio.

Mi sukcesis partopreni tiun projekton dufoje. Ankaŭ la projektoj de Esperanto Forum estis finance subtenitaj pere de la dana Ministrejo por Eksteraj Rilatoj, do ankaŭ tiu programo estis senpaga por la partoprenantoj de ĉiuj orienteŭropaj landoj. En tiu programo oni uzis tri laborlingvojn: anglan, rusan kaj Esperanton. En la unua projekto mi estis ordinara partoprenanto kaj en la dua oni jam petis min fariĝi prelegisto. La diverslandaj partoprenantoj de la programoj aŭskultis teoriajn prelegojn pri la funkciado de la Eŭropaj institucioj kaj estis ebleco ankaŭ konatiĝi kun la praktika funkciado de la Eŭropa Unio.

La partoprenantoj de la studprogramo stimulis diskutojn same kiel diskutoj okazas regule en la Eŭropa Parlamentejo, aŭ en la Eŭropa Komisiono. Je la fino de la projekto la partoprenantoj voĉdonis kaj elektis la plej bonan prelegiston de la projekto kaj la prezidanto de la Dana Supera Tribunalo fariĝis la plej populara prelegisto. Estis granda ĝojo kaj honoro por mi, ke oni elektis min esti la dua plej populara.

Je la fino de la studprogramo la partoprenantoj de la kurso, ŝtatoficistoj el diversaj ekskomunistaj landoj havis specialan eblecon observi la realan elekton de membroj de Eŭropa Parlamentejo. Tio okazis dum la sama tago en ĉiuj landoj de la Eŭropa Unio. Tiam ni havis specialan eblecon rekte sperti la kutiman danan amikecan kaj senformalecan atmosferon en la skandinavia socia vivo.

Post la studprogramoj mi preparis projekton por konstrui rektan interinstitucian kunlaboron (en angla lingvo: twinning cooperation) inter nia hungara parlamenta kontrolorganizo kaj la dana simila institucio (en dana lingvo: Riksrevisionen). La Eŭropa Unio akceptis mian projekton kaj ni ricevis centojn da milionoj da forintoj por kovri

la kostojn. Tiamaniere la budĝeto de la Eŭropa Unio financis nian kunlaboron.

Pro tio ni povis aĉeti cent novajn komputilojn en nia oficejo, kaj povis sendi grupojn de niaj oficistoj al Kopenhago por studi la praktikon, kiel la dana publika administra sistemo funkcias. Dum tiuj jaroj mi havis similajn eblojn kunlabori kun similaj oficejoj ankaŭ en Svedio, Britio, Germanio kaj Portugalio. Tiel mi, kune kun miaj kolegoj ricevis bonajn lecionojn pri la demokratiaj tradicioj de la skandinaviaj landoj kaj povis viziti ankaŭ multajn aliajn okcidenteŭropajn landojn. Ni surloke povis studi kiel en Skandinavio oni sukcesis atingi, ke tie estu la plej malalta koruptado en la mondo.

Pri la pozitivaj spertoj de nia kunlaboro mi verkis kelkajn artikolojn por la revuoj de nia hungara Ĉefministra Oficejo (“Eŭropa Spegulo”, hungare “Európai Tükör”), por la periodaĵoj de nia Financa Ministrejo (“Financa Revuo”, hungare “Pénzügyi Szemle”), ktp. Tiamaniere nun jam estas iomete konata en la hungara socio, ke Danlando, kaj ankaŭ la dana Esperanto-movado grave helpis por ke ni efike povu prepari nin al la membreco de la Eŭropa Unio. Mi pensas, ke ankaŭ tiu preparlaboro helpis nin por ke ni sukcese povu plenumi la taskon de prezidado de Eŭropa Unio dum la unua duono de la jaro 2012.



Skandinavia pejzaĝo

## KANONIZA CEREMONIO EN URBO ROMA

En la unua parto de ĉi tiu libro mi rakontis, kiel mi ricevis eblon por studi en Nanzan Universitato kaj mi klarigis, ke mi regule partoprenis ankaŭ la socian vivon en la japana Esperanto-movado. Mi preskaŭ ĉiusemajnfine vojaĝis al diversaj urboj kaj vilaĝoj inter Hokkajdo, la norda insulo kaj Shikoku, en la sudo, kaj prelegis pri miaj spertoj en scienco kaj kulturo.

La japana universitata vivo estis tre vigla kaj multkolora. Dum mia studado en universitatoj de la komunista mondo ĉiuj politikaj kaj religiaj agadoj estis serioze malpermesitaj. Por mi, kiu studis antaŭe en tiaj cirkonstancoj estis nekredbla sperto vidi la liberecon en la japana universitato. Tie okazis gajaj, kaj malofte ankaŭ malgajaj okazaĵoj.

Malgaja okazaĵo estis, ke unu el la studentoj serioze malsaniĝis. Li suferis pro malbontipa leŭkemio kaj la kuracistoj proponis, ke rekta familiano donu al li medolon el sia spino per organtransplanto. La frato de tiu studento tiam studis en amerika universitato kaj li entreprenis vojaĝi al urbo Nagoya por oferti sian medolon por organtransplanto. Sed kiam li alvenis al Japanio, la stato de sia frato jam ŝajnis esti senespera kaj pro tio la kuracistoj en la Ruĝa Kruco Hospitalo ne entreprenis fari transplanton.

Tiam grupo de studentoj preĝis dum la tuta nokto por ilia kunstudento, kiu faris la samon en la hospitalo. Tiuj studentoj metis kandelojn en la fenestrojn de la turo de la universitata kapelo kaj tio bone videblis ankaŭ en la Ruĝa Kruco Hospitalo kie la malsana studento kuŝis.

Dum la deknaŭa jarcento laboris alte respektita katolika misiisto en la malproksima oriento, ĉefe en Ĉinio, kiu efike helpis la malproksimorientajn popolojn. Li protektis la ordinarajn ĉinojn kontraŭ eŭropaj militistoj, instruis kaj kuracis ilin, li vestis sin same, kiel ordinaraj ĉinoj, manĝis la saman simplan manĝaĵon kion ĉinoj manĝis, kaj diris, ke li ankaŭ en la Ĉiela Mondo volus esti ĉino. Li alvenis al tiu parto de la mondo el la Austria-Hungara Monarĥio kaj lia nomo estis

Jozef Freinademetz. Ĉar li estis alte respektita kaj estimita persono en la socia vivo, grupo de studentoj preĝis al li por peti helpon resanigi la kunstudenton. Post kelkaj tagoj la studento en la hospitalo neatendite resaniĝis, sed neniu komprenis la kialon kaj neniu sciis ĉu la sana stato restos dum longa aŭ nur mallonga tempo. Poste dum multaj jaroj mi ricevis nenan informon pri tiu studento.

Multajn jarojn post mia hejmenvojaĝo el Japanio mi informiĝis, ke la Nagoya episkopo komencis esplori kio okazis kun la iama studento de Nanzan Universitato. Temas pri la studento, kiu resaniĝis en nekredablaj cirkonstancoj kiam liaj kunstudentoj preĝis al la iama misiisto por li en la universitata preĝejo. La episkopo volis scii, ĉu la studento ankoraŭ vivis aŭ ne.

Oni informis lin, ke la studento komplete resaniĝis, poste finis sian studprogramon en la universitato, kaj tiam jam laboris kiel profesoro, aŭ instruisto en iu sudjapana universitato. La episkopo kolektis la dokumentojn el la Nagoja Ruĝa Kruco Hospitalo kaj komisiono de kuracistoj raportis ke laŭ dokumentoj la resaniĝo estis rapida, kompleta, longdaŭra kaj science neklarigebla.

La episkopo sendis ĉiujn dokumentojn al urbo Roma, kaj raportis, ke ŝajnis okazi miraklo en la urbo. La Vatikano komencis analizi la aferon kaj teologia komisiono konkludis, ke la dokumentoj de la kuracista komisiono estis validaj. La vicrespondeculo (latine: postulator) de tiu procedo estis profesoro Robert Riemer, kiu dum mia studado estis la prezidanto de la universitato.

Sekve de tio, pro la konkludoj kaj raportoj de diversaj komisionoj finfine Johano Paulo II, la papo deklaris, ke la katolika mondeklezio rigardas patron Jozef Freinademetz, la iaman ĉinan misiiston, kiel sanktulon. La oficiala kanoniza ceremonio okazis en la Sankta Petro placo, en urbo Roma, kaj multaj kompetentuloj, inter aliaj la prezidanto de mia iama universitato invitis min partopreni la okazaĵon. Kelkdek mil homoj partoprenis la eventon kaj post la oficiala ceremonio la Sankta Patro, spirita estro de unu miliardo da homoj en la mondo invitis nin por la venonta tago por partopreni specialan aŭdiencion. Tiel okazis, ke mi povis persone vidi la papon,

pri kiu oni opinias, ke baldaŭ ankaŭ li mem fariĝos unu el la pli novaj sanktuloj de la katolika mondeklezio.



La Nanzan Universitato apartenas al la Societo de Dia Verbo. La fondinto kaj la unua misiisto de la Societo: Arnold Janssen kaj Josef Freinademetz (supre) estas respektive, kiel sanktuloj en la katolika eklezio. Tiun decidon deklaris la papo: Johano Paulo II (malsupre)





Kanoniza ceremonio en urbo Roma kun dekmiloj da partoprenantoj (supre). La filo de la aŭtoro inter la ĉeestantoj (malsupre).





## VIZITO DE AZIAJ VOJAĜANTOJ EN EŬROPO

Dum la lastaj tridek jaroj multaj aziaj vojaĝantoj vizitis min kaj mian universitaton en Eŭropo. Tio estis tre utila por ambaŭ partoj ĉar tiamaniere ni povis konstrui longdaŭrajn amikajn kaj fakajn rilatojn. Kiam profesoro Shen Chenru vizitis Hungarion, ni kune pasigis la tempon kaj kune preparis por la internacia scienca kaj teknika konferenco kiun prof-ro Shen organizis en la ĉina ĉefurbo, en Pekino. Post kelkaj semajnoj mi vizitis lin en Pekino kaj tie ni sukcesis komenci longdaŭran kaj fruktodonan sciencan kunlaboron.

Estis granda evento en nia komunumo, kiam d-ro So Gilsu, profesoro de Seokyeong Universitato en Seulo venis prelegi pri la fontoj de la korea ekonomia evoluo. Multegaj homoj miras en la tuta mondo kiel Koreio povis fariĝi la dua plej alte evoluita industria lando en Azio. Kvankam lia prelego en la Budapeŝta Ekonomika Universitato okazis jam antaŭ multaj jaroj, ankaŭ nuntempe multaj aŭskultantoj rememoras la vortojn de la korea profesoro. Laŭ li la plej grava elemento de la rapida ekonomia evoluo estis la diligenta kaj permanenta lernado kaj studado.

Multaj homoj povas pensi, ke la koreoj konstruis kaj pliriĉigis ilian landon per la fortoj de la bubaloj. Oni vidis multajn filmojn pri tio. En tiuj filmoj bone videblas, kiel diligente laboras la koreaj kamparanoj kaj kiel fruktodone kultivas la teron per siaj bestoj. Sed prof-ro So Gilsu klarigis, ke la fonto de la rapida evoluo ne estis la laboro de la bubaloj.

La vera fonto estis la lernado kaj la studado. La kamparanoj vendis la babulojn por buĉi kaj poste ili faris la laboron de la babuloj anstataŭ la bestoj. Tiel la kamparanoj ricevis monon por la bestoj kaj per tiu mono ili sendis iliajn gefilojn al la plej bonaj amerikaj universitatoj. Do oni povas diri, ke la koreoj tiamaniere per la babuloj financis la studkostojn. Tiel multaj membroj de la nuna generacio fariĝis alte edukitaj kaj ili jam sukcese povas atingi mondscale signifecajn sciencajn, ekonomiajn kaj komercajn rezultojn en iliaj fakterenoj. Mi aŭdis similajn historiojn ankaŭ en Japanio. Tie mi havis amikinojn,



kies avino vendis sian festan vestaĵon (en japana lingvo: kimono) por ricevi monon kaj per tiu mono sendi la nepinon al bona universitato.

Kiam prof-ro So Gilsu pensiuliĝis, lia universitato eldonis memorlibron pri lia vivo kun la titolo “La homoj en Pura Lando”. Krom multaj aliaj homoj ankaŭ mi verkis artikolon por tiu libro. La titolo de mia verketo estas “Dankmesaĝo al korea profesoro” kaj tio legeblas koree en la venontaj paĝoj.

Dum mia studenta tempo en Japanio prof-ro Akashi Yoji estis la dekanon kaj la direktoro de la Centro por Japanaj Studoj en Nanzan Universitato. Li konstruis tre amikajn rilatojn kun siaj studentoj. Kiam li vizitis la tajlandan ĉefurbon, siaj tajlandaj studentoj en Bangkok metis ruĝan tapiŝon sur la tero por saluti lin multajn jarojn post la fino de siaj studprogramoj. Kiam li prelegis en scienca konferenco en Amsterdam, li venis ankaŭ al Budapeŝto por vidi min kaj ni kune vizitis kelkajn malnovajn hungarajn universitatojn.

Kiam prof-ro Mizuno Yoshiaki fariĝis sesdekjaraĝa, li ricevis monon de sia universitato en Tokyo por ke li travojaĝu la mondon. Li faris tion kaj pri siaj spertoj li verkis du librojn. Ankaŭ kun li mi promenadis dum longa tempo en Hungario kaj ni kune vizitis kelkajn famajn universitatojn por konstrui internaciajn sciencajn kunlaborojn.

Ankaŭ s-ro Kara An el Seulo travojaĝis la mondon dum pli ol duonjaro kaj estis granda honoro por mi havi la eblon gastigi lin kun lia edzino kaj paroli pri la nuntempaj sociaj problemoj de la okcidenta kaj la orienta mondo. Li estas redaktoro de interreta ĵurnalo „Solidareco” kaj estas tre bone informita pri la politika, kultura kaj ekonomia situacio de la nuntempa mondo.

S-ro Ho Song estas fama korea artpentristo kaj antaŭ nelonge li havis ekspozicion en Rumanio, Francio kaj Hungario. La membraro de nia komunumo kun ĝojo havis la eblon konatiĝi kun liaj pentraĵoj en la Centra Klubo kaj la Centra Oficejo de la Hungaria Esperanto Asocio same kiel en la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en la hungara Ĉefurbo.

Per la oftaj vizitoj de la famaj orientaziaj fakuloj kaj profesoroj ni povas kolorigi la kulturan kaj la sciencan vivon en Eŭropo kaj samtempe helpas, ke ankaŭ la azianoj povu pli reale konatiĝi kun la eŭropa kulturo.



La aŭtoro denove en Eŭropo post multaj longdaŭraj kaj lacigaj vojaĝoj en Azio kaj Ameriko

## PONTO INTER POPOLOJ KAJ KULTUROJ

Jam pasis tri jardekoj post Showa 58 kiam mi studis en Nanzan Universitato en mezjapana urbo Nagoja. Mi ricevis stipendion de Verda Stelo Entrepreno kaj pro tio mi regule partoprenis ankaŭ la socian vivon en la japana Esperanto-movado. Tiel okazis, ke mi fariĝis esperantisto en Japanio. Mi preskaŭ ĉiusemajnfine vojaĝis al diversaj urboj kaj vilaĝoj inter Hokkajdo, la norda insulo kaj Ŝikoku, en la sudo, kaj prelegis pri miaj spertoj en scienco kaj kulturo.

Post la fino de mia japana studprogramo mi hejmenvojaĝis al Hungario, kaj laŭ la rezultoj de mia esplorkonferenco en Nanzan Universitato, mi doktoriĝis en la Budapeŝta Ekonomikoscienca Universitato. Tiam nur malmultaj hungaroj povis havi ŝancon studi en Japanio. Sekve de tio estis granda interesiĝo kaj en Hungario kaj en aliaj landoj kiel la japana ekonomio funkciis, kiel la japana komputila industrio estiĝis tiel sukcesa kaj kiel Japanio povis fariĝi la dua plej granda ekonomia povo de la mondo en la jaro 1968.

Multaj eŭropaj kaj aziaj ĵurnaloj, revuoj kaj aliaj periodaĵoj petis, ke mi verku artikolojn pri miaj spertoj. Mi verkis multnombrajn librojn kaj artikolojn, kiuj aperis en diversaj naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto. Per Esperanto mi povis kolekti pli detalajn informojn ol la aliaj fakuloj ĉar mi rekte povis diskuti la temojn kun la esperantistaj fakuloj de la tuta mondo. Vidante, ke mi efike uzas Esperanton en mia laboro, mi ricevis pli ol unu miliono da enoj kiel kromsalajro de miaj laborejoj (de la Hungara Nacia Petrola Korporacio kaj la Parlamenta Kontrola kaj Aŭditorada Oficejo.)

Dum la pasintaj tridek jaroj oni organizis multajn sciencajn konferencojn en diversaj eŭropaj kaj aziaj landoj pri tiuj temoj kaj inter aliaj, la Ĉina Socioscienca Akademio kaj ankaŭ la Pola Akademio de Sciencoj invitis min prelegi pri niaj rezultoj en Esperanto, kiel ni intencas evoluigi nian ekonomion per la adapto de la japanaj ekonomiodirektaj metodoj.

Dumtempe la Hungara registaro, por la unua fojo en la Orient-Eropa Komunisma Mondo akceptis novajn regulojn kaj permesis, ke oni

fondu privatajn entreprenojn en la lando. Por informi skandinaviajn entrepreno-posedantojn kaj kuraĝigi ilin investi monon en Hungario mi vojaĝis al Svedio kaj prelegis pri tiu nova situacio en multaj universitatoj, urbodomoj, bibliotekoj, ktp. en la internacia lingvo. Tiel okazis, ke ankaŭ konkretan rezulton mi sukcesis atingi tie, la estroj de iu mezsveda industria korporacio petis, ke mi helpu fondi novan svedo-hungaran komunan entreprenon kaj petis, ke ankaŭ mi estu direktoro kaj posedanto de la nova entrepreno.

Tiel mi povas konkludi, ke kvankam mi studis rusan, anglan, francan, japanan kaj germanan lingvojn, tamen Esperanto riĉigis mian vivon la plej efike kaj per Esperanto mi povis konstrui pontojn la plej efike inter popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj kaj kontinentoj.



Moderna konstruaĵo de Teknika Muzeo en Nagoya



## **Tria parto**

### **POST TRIDEK JAROJ**



Urbo Nagoya rapide evoluis dum la lastaj jardekoj. En ĉi tiu loko normala satcido funkcias dum la studenta tempo de la aŭtoro, kie videblis multaj trajnoj kaj tiam tute ne estis ĉielskrapantaj konstruaĵoj

## TAGMANĜOJ KUN EMIROJ KAJ SULTANOJ

Mi naskiĝis post la dua mondmilito, kiam estis malriĉeco en multaj orienteŭropaj landoj. En la hungara ĉefurbo ĉiuj pontoj super la rivero Danubo estis detruitaj, same kiel multaj fabrikoj kaj loĝejoj. Mankis krudmaterialoj, mankis energio, mankis loĝejoj kaj mankis manĝaĵoj. Por ebligi la vivon la ŝtato enkondukis specialan kuponsistemon. Tio signifis, ke la registaro kontrolis la kvanton de pano, viando, cukero, ktp., kion la homoj rajtis aĉeti. En la panvendejoj por mono oni povis aĉeti nenion, la vendistoj petis ankaŭ la kuponojn.

Dum mia juneco mi vivis en la orienta parto de Hungario en vilaĝoj kaj urbetoj sur la bordo de rivero Tisza. Tie estis multaj bestoj en la ĝardenoj, do kokoj kaj kokinoj, anasoj, porkoj, bovoj, ŝafoj kaj kaproj. En tiuj vilaĝoj jam 8-10 jaraĝaj infanoj havis taskon en la farmoj. Kiel infano, mi kolektis vespere la ovojn, mi manĝigis la bestojn kaj mi gardis la ŝafojn kaj la kaprojn en la kampoj. Mi tre ŝatis ludi kun la hundoj kaj la katoj kaj mi ĝuis kunesti kun la bestoj. Mi alkutimiĝis al modesta vivo, sed tiu vivo estis bela, ĉar en tiuj vilaĝoj ni vivis en harmonio kun la naturo.

Kiam mi gardis la ŝafojn kaj la kaprojn en la kampoj, mi tre ofte legis librojn. Dum tiu tempo mi ricevis tre interesan libron kies titolo estis “Fabeloj de 1001 noktoj”. En tiu libro mi legis pri ekzotika kaj mistika orienta mondo, kie riĉaj sultanoj kaj reĝoj vivis. Ili havis multegajn bongustajn manĝaĵojn ĉiutage, vivis en monumentaj kaj luksaj palacoj kaj belegaj fraulinoj dancis por emuzi kaj distri ilin en la palaco. Mi miris kia riĉa la vivo en la oriento estis kaj mi pensis, ke mi neniam havos eblon por viziti tiun parton de la mondo.

Sed kiam mi estis 18 jaraĝa, mi vojaĝis al Budapeŝt, la hungara ĉefurbo por studi matematikon en la ekonomika universitato. En tiu granda urbo la vivo estis malsama. Oni povas diri, ke en la vilaĝoj la rilato inter la homoj estis pli amikeca, ol en la urboj. En la vilaĝoj preskaŭ ĉiuj homoj konis unu la alian kaj ĉiam salutis unu la alian en la stratoj eĉ se oni ne konis la alian homon persone. En Budapeŝt tio

neniam okazis. Kvankam la vivo en tiu granda urbo estis pli riĉa ol en mia vilaĝo, tamen mi preferis vivi en pli modestaj cirkonstancoj, ĉar mi al kutimiĝis al tio.

Post la fino de la universitato mi ricevis loĝejon en Budapeŝto, do mi devis vivi tie en la centro de la ĉefurbo. Tiam okazis, ke mi ricevis stipendion de japana entrepreno Ryokusei Kogyo Kabushiki Kaisha por studi en Nanzan Universitato en Nagoya. Pri tio mi verkis vojaĝraportojn, kiuj troveblas en la unua parto de ĉi tiu libro.

Post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo mi fariĝis strategia manaĝero de la Hungara Petrola Korporacio, la plej granda industria organizo de la lando. Kiam Hungario decidis aliĝi al la Eŭropa Unio, tiam mi fariĝis estro de la parlamenta kontrolo kaj aŭditora oficejo. En tiuj postenoj mi devis vojaĝi multe, kaj okazis, ke mi vizitis ankaŭ la ekzotikajn orientajn landojn, pri kio mi legis la interesajn fabelojn en mia juneco.

Kiam mi estis en Kuvajto, la emiro, estro de la riĉa araba ŝtato invitis min por tagmanĝi. Mi estis tre feliĉa, tio estis granda honoro por mi. Mi rememoris la fabelojn kiujn mi legis en mia juneco kaj preparis min por riĉa tagmanĝo en luksa palaco. Por rezervi lokon en mia stomako por la multaj bongustaj ekzotikaj manĝaĵoj mi matenmanĝis nenion.

Je la 12-a horo eleganta aŭto venis al mia hotelo kaj transportis min al la loko de la tagmanĝo. Kvankam mi legis en la fabellibro ke la reĝoj kaj sultanoj tagmanĝis en monumentaj luksaj palacoj, la loko de nia tagmanĝo estis tute alia. Tio estis grandega okcidentstila moderna konstruaĵo, similaj konstruaĵoj abundas en la centro de ĉiuj eŭropaj kaj amerikaj urboj. Sur la pinto de la konstruaĵo estis restoracio kaj la emiro renkontis min kun miaj kolegoj en tiu restoracio.

Mi rememoris, ke en la fabellibro mi legis ke dum reĝaj tagmanĝoj belegaj fraŭlinoj dancis kaj kantis por amuzi la ĉeestantojn. Tamen en tiu restoracio neniu dancis kaj neniu kantis. Anstataŭ tio, rigoraj korpogardistoj ĉirkaŭis la ŝtatestron kaj pro tio la atmosfero ne estis tiel intima, kiel mi tion naŭve pensis. Nek la tagmanĝo estis ekzotika. La emiro ofertis al ni okcidentstilan tagmanĝon en okcidentstila

restoracio. La organizantoj de la evento pensis, ke por okcidentaj vizitantoj estus dece oferti kutimajn okcidentstilajn manĝaĵojn.

Do, tiam en Kuvajto mi ne sukcesis gustumi la ekzotikajn arabajn manĝaĵojn, sed dum alia vizito al alia lando mi sukcesis fari ankaŭ tion. Kiam mi vizitis la Unuiĝintajn Arabajn Emirlandojn, tiam la oficistoj de la registaro informis min, ke oni traktis min, kiel personan gaston de la monarko, la reganta emiro (kies nomo estis Sultan). Tio signifis, ke mi povis tranokti en luksa kvinstela hotelo, povis manĝi kaj trinki en elegantaj restoracioj laŭ miaj elektoj, sed mi neniam bezonis pagi. Mi nur subskribis la fakturojn kaj poste la emira kortego pagis.

Tie en la Emirlandoj, same kiel en Kuvajto la vivnivelo estis nekredible alta, estis multegaj bonaj restoracioj en la urboj. Tie estas la loko, kie oni konstruis la solan sepstelan luksan hotelon de la mondo. Kiel persona gasto de la emiro mi elektis tre bonajn restoraciojn por vespermanĝi. Okazis, ke mi vizitis luksan subakvan restoracion, kie ĉirkaŭ la restoracio diversaj fiŝoj naĝis en separita parto de la maro. La gastoj de la restoracio povis rigardi tiujn fiŝojn tra la fenestroj de la subtera restoracio. Mi, kiel gasto de la restoracio povis elekti la naĝantajn fiŝojn, montri ilin al la kelneroj kaj peti, ke la kuiristoj kuiru ilin por mi por vespermanĝo. Do, tiamaniere oni povis esti certa, ke la fiŝo estis freŝa.

Dum mia vivo mi havis la eblon kune manĝi kun kvin ŝtatestroj, ŝtatprezidantoj kaj monarkoj. Mi vizitis kaj luksajn palacojn kaj mizerajn malriĉajn dometojn dum miaj vojaĝoj en kvar kontinentoj. Mi miris, kia nia mondo estis. Mi ĝuis la multkoloran vivon en la arabaj bazaroj, mi kolektis energion en la trankvilaj budismaj monaĥejoj en la japanaj montaroj kaj komencis kompreni la esencon kaj la celon de la homa vivo en la centro de la ŭonbulisma religio en Koreio. Por mi tio estis tre interesa, ĉar mi vivis mian vivon en Eŭropo, kie la juda-kristana tradicio formis la pensmanieron dum multaj jarcentoj. Mi vivis en luksaj cirkonstancoj tre ofte, tamen mi neniam povis alkitimiĝi al tio. Por mi la simpla modesta vivmaniero estas natura, kie oni vivas en harmonio kun la naturo kaj la medio.



## ANSERA HEPATAĴO POST ANSERA HEPATAĴO

Dum mia profesia kariero mi tre ofte devis vojaĝi al diversaj landoj pro laboro sed post mia pensiuliĝo mi jam havas pli da libertempo por vojaĝi ankaŭ privatcele. Tiel mi decidis revojaĝi al Orienta Azio por rigardi kiel la vivo ŝanĝiĝis post mia studenta vivo en Japanio. Dum mia studenta tempo oni jam invitis min vojaĝi al Koreio (Sudkoreio), sed tiam Hungario apartenis ankoraŭ al la komunisma mondo. Tiam ne estis diplomataj rilatoj inter mia lando kaj la Korea Respubliko kaj pro tio tiam mi ne povis vojaĝi tien.

Sed post mia pensiuliĝo la situacio jam ŝanĝiĝis kaj mi jam libere povas vojaĝi ie ajn. Do, mi decidis viziti ambaŭ Koreion kaj Japanion dum mia nova orientazia vojaĝo. Inter Hungario kaj Orienta Azio estas multaj vojoj por vojaĝi kaj mi elektis flugi inter Budapeŝt kaj Seoul, la korea Cefurbo per Qatar Airways, la kvinstela aerkompanio. Unue mi vojaĝis inter Budapeŝt kaj Doha, la ĉefurbo de Qatar.

Ni ekflugis el Budapeŝt posttagmeze kaj estis malhela nokto kiam ni alvenis al la Araba (Persa) Golfo. Tra la fenestro bone videblis la lumoj de Kuvajto kaj mi rememoris la tagon, kiam mi kune tagmaĝis kun la emiro. Poste ni flugis super la tero de Saud-Arabio kaj Bahreino. Antaŭe mi jam vizitis ambaŭ landojn, akompanante la delegitojn de nia registaro, kiel strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo. La bahreinaj gvardistoj fiere montris al ni la rezulton de ilia granda kaj grandioza laboro, ili konstruis ponton super la maro por konekti la insulon de Bahreino kun la sankta lando de Saud-Arabio. Tiel la loĝantoj de la insuloŝtato rekte povis vojaĝi en iliaj aŭtoj al Mekka, la plej sankta loko de la islama komunumo.

En Qatar mi ŝanĝis aviadilon kaj vojaĝis el Doha al Koreio per alia aviadilo. En la flughaveno de Doha mi embarasiĝis iomete, kiam mi ne trovis mian aviadilon en la flughavena informilo. Mi aĉetis bileton al Seoul sed nenie estis skribita tiu urbonomo. Post kelkaj minutoj la situacio klariĝis, kiam mi komprenis, ke en la korea ĉefurbo ne estas flughaveno. Pro tio la aviadiloj flugas al alia urbo, kies nomo estas

Incheon. Do, evidentiĝis, ke mia aviadilo funkcias, sed mi devas serĉi la nomon de Incheon en la flughavena informilo.

Mi vojaĝis en januaro kaj dum tiu monato estas tre malvarma en Eŭropo. Pro tio mi surpriziĝis ke en la flughaveno de Doha ĉiuj vojaĝantoj havis malpezan someran vestaĵon, la plejmulto de la vojaĝantoj eĉ ŝtrumpetojn ne havis. La temperature dum noktmezo estis 17 C gradoj. Multkoloraj vojaĝantoj el Hindio, Orientazio, Afriko, Eŭropo kaj el la araba mondo babiladis en la flughavena atendejo en multkoloraj vestaĵoj. Klare videblis, ke en Doha ni estis en la ĉefurbo de riĉa araba lando. En la flughavenaj vendejoj abundis oro kaj diamanto. Estis surskribita en la muro, ke Doha bonvenigas la vizitantojn en 2012 (1433 post Hiĵra laŭ la islama kalendaro), en la jaro de la Dragono.

Inter Budapeŝt kaj Doha estas 2 hora tempodiferenco kaj inter Doha kaj Incheon alia 6 hora. Pro tio mi timis, ke en Koreio estos malfacila por mi alkutimiĝi al la loka tempo. Kiam estas la 10-a horo vespere en Budapeŝt, tiam jam estas la 6-a horo matene de la venonta tago en Koreio.

En la aviadilo la vojaĝantoj ricevis altnivelan servon. La A320 modela aviadilo estis nova kaj moderna kaj la vojaĝantoj ricevis senpage multegajn revuojn kaj ĵurnalojn, inter aliaj Gulf Times, The Qatar Tribune, The Peninsula, International Herald Tribune, The Egyptian Gazette, kaj multajn aliajn en araba lingvo. Dum la vojaĝo ni ricevis riĉan vespermanĝon kaj matenmanĝon. La menuo enhavis bulkon kun butero, kokinaĵon kun kokoso kaj citrono, molan fromaĝon, kuiritajn pizojn kun tomato kaj kremo, kukaĵon kun acidaj ĉerizoj, biskvitojn kaj molan karamelan kremon. Ankaŭ la elekteblaj trinkaĵoj estis multegaj kaj senpagaj. Krom la senalakoholaj trinkaĵoj la vojaĝantoj rajtis gustumi bieron, vinon, viskion, kaj multajn aliajn trinkaĵojn multfoje dum la tuta vojaĝo. Mi trinkis sudamerikan vivon (cabernet saugvinon) importitan el Ĉilio.

En la aviadilo al ĉiuj seĝoj apartenis komputila ekrano kaj la vojaĝantoj povis elekti ĉu ili volis rigardi filmojn, aŭdi muzikon, ludi perkomputilajn ludojn, informiĝi pri la kulturaj kaj politikaj novaĵoj

de la mondo, aŭ informiĝi pri la geografia pozicio de la aviadilo.n la komputilo troveblis 800 diversaj amuzaj eblecoj.

La komputilo permanente montris en la mapo kie la aviadilo estis, do la distancon al Doha kaj al Incheon, la altecon, la rapidecon, la lokan tempon en Koreio, la temperaturon de la aero, la distancon inter la aviadilo kaj la plej proksima urbo, la distancon inter la aviadilo kaj Mekka, la islama sankta urbo, la bezonatan vojaĝtempon ĝis la celo kaj la direkton al Mekka.

La vojaĝtempo inter Doha kaj Incheon estas 8 horoj kaj 10 minutoj. Mi sidis apud la danĝerelirejo, kie la loko por la piedoj estas double pli granda ol en aliaj lokoj. Ĉi tie nur angle parolantaj vojaĝantoj rajtas sidi, kiuj en danĝera situacio povas kompreni kion necesas fari proksime al la danĝerelirejo. En la aviadilo altkvalita telekomunikada servo funkciis, la vojaĝantoj facile povis komunikiĝi per telefono kun la kunvojaĝantoj kaj ankaŭ kun aliaj homoj en la malsupra mondo.



La aviadilo alvenis al la flughaveno de Incheon vespere kaj mi tuj kaptis aŭtobuson por vojaĝi al Seoul. Tie vivas mia malnova amiko Kara An. Li jam vizitis min en Hungario kun sia edzino Roza, kiam ili travojaĝis la tutan mondon antaŭ du jaroj. Nun ili invitis min tranokti en ilia loĝejo kaj detale skribis kiun aŭtobuson mi kaptu en Incheon kaj petis, ke mi elbusiĝu en Inchon. Tio estas nomo de distrikto en la korea ĉefurbo. La oficejo de Kara An estas antaŭ la stacidomo en Inchon proksime al fama kinejo kaj li promesis al mi atendi min en la oficejo.

Mi faris, kion ili proponis, do aĉetis bileton por la aŭtobuso antaŭ la flughaveno. Tie oni akceptis mian eŭropan kreditkarton, do ne estis necesa por mi ŝanĝi monon en la flughaveno. La vojaĝado en la aŭtobuso estis tre komforta, la buso estis pura kaj moderna. Dum vojaĝado la ŝoforo demandis min ĉu mi volas elbusiĝi je la unua aŭ je la dua haltejo en Inchon. Mi povis respondi nenion ĉar Kara An ne menciis, ke estis du haltejoj en Inchon.

Mi ne sciis, kion mi faru, do mi elbusiĝis je la unua haltejo. La buso foriris kaj mi trovis kinejon nenie. Do mi konkludis, ke la oficejo de Kara An povas esti antaŭ la dua haltejo de la aŭtobuso. En Koreio, same kiel en Japanio la stratoj ne havas nomon, kaj la domoj ne havas numeron. Pro tio ne eblas demandi homojn en la stratoj pri adresoj. Ĉar en Orienta Azio ne estas adresoj. Mi pensadis kion mi faru en nekonata loko sen loka mono. Tie mi eĉ aŭtobusbileton ne povis aĉeti sen korea mono.

Mi pensis, ke en tiu situacio la plej bona afero estas serĉi bankon por ŝanĝi monon kaj serĉi hotelon por tranokti. Bonŝance mi trovis multajn hotelojn en la najbaraj stratoj kaj tuj rezervis ĉambron por 50.000 won. La oficisto en la akceptejo de la hotelo akceptis mian kreditkarton, do ne estis necesa ŝanĝi monon por pagi la ĉambron.

En la hotelo mi trovis komputilon kaj sendis elektronikan mesaĝon al Kara An. Mi klarigis mian situacion kaj mi diris, ke ĉio estis en ordo, ĉar mi jam estis en hotelo. Li tuj telefonis al la hotelo kaj informis min ke li ne sciis, ke la aŭtobuso haltis en du lokoj en Inchon. Li petis, ke mi ne tranoktu en la hotelo. Ĉar lia edzino jam preparis

vespermanĝon por mi kaj li proponis, ke ni kune vespermanĝu.

Mi sincere dankis tion kaj respondis, ke mi jam pagis la hotelĉambron kaj mi ricevis multegajn manĝaĵojn en la aviadilo. Do mi ŝatus resti en la hotelo kaj mi ne povus denove manĝi post la riĉa vespermanĝo en la aviadilo. Tamen post kelkaj minutoj li vizitis min en la hotelo. Ni babiladis iomete kaj li denove proponis, ke ni havu vespermanĝon kune en najbara restoracio. Tiel mi vespermanĝis dufoje, kiel la iama hungaro, kiu vizitis sian fraton en Ameriko.

Laŭ anekdoto okazis dum la komunisma periodo en Hungario, ke hungaro vizitis sian fraton, kiu vivis en Ameriko. Dum tiu tempo la plej valorajn varojn la ŝtato eksportis al la okcidenta mondo por gajni fremdan monon. Valoraj manĝaĵoj, ekzemple anseraj hepatoj ne troveblis en la merkatoj. Tamen la hungaro sukcesis ricevi anseran hepaton por multega da mono en la nigra merkato kaj li decidis friti ĝin kaj kunporti ĝin al Ameriko. Li volis donaci al sia frato nefacile atingeblan, valoran manĝaĵon.

Kiam li alvenis al la flughaveno de New York, la amerika doganoficisto kontrolis la valizojn. Li trovis la anserajn hepataĵojn kaj diris, ke oni ne rajtas kunporti manĝaĵon al Ameriko. La hungaro ne volis, ke la doganoficisto konfisku la altvaloran manĝaĵon, do li tuj manĝis la tuton en la flughaveno. (Laŭ regulo la vojaĝantoj rajtas kunporti manĝaĵon en ilia stomako.) Sed la hepataĵo esti tro granda kaj li estiĝis tro sata. Li sentis, ke poste dum unu tago li povos manĝi nenion kaj li tute ne emos menĝi anseran hepataĵon dum multaj monatoj.

Poste li kaptis aŭtobuson kaj vojaĝis al la domo de sia frato. Ili feliĉe salutis unu la alian, kaj la amerika frato demandis:

*- Ĉu vi bone vojaĝis? Ĉu vi estas malsata? Ĉu vi scias, kian manĝaĵon ni preparis por vi? Ni bone scias, ke en Hungario oni ne povas aĉeti anseran hepaton. Pro tio ni aĉetis tion matene kaj preparis nekutiman vespermanĝon por vi. La fritita ansera hepataĵo jam estas en la bakujo kaj post kvin minutoj ni povos kune vespermanĝi.*

## ELEKTO KAJ EREKTO

Post mia alveno al Koreio mi observis, ke la korea lingvo havas multajn vokalojn kaj konsonantojn kiuj tute ne troveblas en la eŭropaj lingvoj. Kaj ankaŭ en la eŭropaj lingvoj estas multaj vokaloj kaj konsonantoj, kiuj mankas en la korea lingvo, same kiel en la ĉina, aŭ la japana lingvoj. Pro tio mi tre ofte skribis la koreajn vortojn sur paperon, kiam mi volis aranĝi aferojn en oficejoj, ĉar la koreoj tre ofte malfacile komprenis mian parolmanieron.

Tipa ekzemplo por la diferenco inter la aziaj kaj la eŭropaj lingvoj estas la konsonantoj “r” kaj “l”. En eŭropaj lingvoj ambaŭ konsonantoj estas uzataj, sed en la aziaj lingvoj tre ofte oni uzas nur unu el ili. En la japana lingvo estas “r” sed ne estas “l” kaj en la ĉina lingvo estas “l” sed ne estas “r”. Tiu situacio foje-foje okazis seriozajn aferojn, foje-foje interesajn miskomprenojn.

Ĉu la okazintaĵo estas vera aŭ ne, mi ne scias, sed mi legis ĝin en libroj. Post la fino de la dua mondmilito amerikaj aŭ rusaj soldatoj liberigis Ĉinion, kiun antaŭe okupis japanaj militistoj. Kaj la soldatoj kontrolis la homojn kaj volis scii, ĉu ili estis ĉinoj aŭ japanoj. Do oni donis paperon al la homoj kaj ordonis, ke ili legu la vortojn, kiuj estis skribitaj sur la paperon. Tiuj vortoj havis ambaŭ literojn “r” kaj “l”. Se la kontrolitaj homoj povis legi la literojn “l”, la soldatoj konkludis, ke ili estis ĉinoj. Do oni liberigis ilin. Sed kiam la kontrolitaj homoj povis legi la literojn “r”, la soldatoj konkludis, ke ili estis japanoj. Do oni tuj arestis ilin.

La alian anekdoton mi aŭdis multajn jarojn post la fino de la milito. Laŭ la ankdoto amerika kaj ĉina ĵurnalistoj diskutas, kie estas pli granda demokratio. La amerika ĵurnalista klarigas, ke la parlamenta elekto estas tre grava afero. Li demandas sian ĉinan kolegon:

- *How often do you have elections here in China? (“Kiom ofte havas vi elektojn ĉi-tie en Ĉinio?”)*
- *Plactically evely molning. (En korekta angla lingvo: “Practically every morning”. La ĉino intermiksas la vortojn*

*election kaj erection kaj respondis jene: “Preskaŭ ĉiu matene.”)*

Miajn unuajn tagojn en Koreio malfaciligis la fakto, ke mi ne povis legi la koreajn literojn je la komenco kaj multaj koreoj ne povis legi la latinajn literojn. Tre ofte okazis, ke grandaj institucioj ne sciis, kiel oni skribu la nomon de la institucio per latinaj literoj. Ekzemple la oficiala nomo de la granda suda urbo estas Busan, sed la urba universitato nomiĝas Pusan University en angla lingvo. Kiam mi demandis koreajn lingvistojn kiel oni skribas la titolon de ĉi tiu libro per latinaj literoj, mi ricevis diversajn respondojn. Kelkaj el ili opiniis ke la titolo *황해를 넘어서* estas Hwanghae reul Neomeoseo, kelkaj opiniis, ke tio estas Hwanghelol nomoseo. Bonŝance mi renkontis esperantistojn preskaŭ ĉiutage kaj pro tio mi neniam havis seriozajn komunikadajn problemojn.

Mi pasigis la unuajn tagojn de mia korea vojaĝo en la ĉefurbo kaj mi havis la honoron renkonti denove miajn malnovajn amikojn: Kara An, lian edzinon Roza, kaj profesoron Lee Jungkee, kiu jam antaŭ tridek jaroj invitis min al Seoul. Profesoron So Gilsu mi ne povis renkonti, ĉar post pensiuliĝo li kaŝis sin en budhisma monaĥejo en la arbaro kaj dum multaj jaroj komunkiĝis kun neniŭ. Li parolis al neniŭ, telefonis al neniŭ, skribis leteron al neniŭ. Dum multaj jaroj li studis nur malnovajn budhismajn sanktajn skribaĵojn kaj profunde meditante volis kompreni la celon kaj la sencon de la vivo kaj la morto.

Dum mia dua tago en Seoul du studentinoj de Kara An akompanis min al la malnova reĝa palaco, kie reĝaj gvardistoj prezentis tre interesan ceremonion en la mezepoka reĝa kortego. Dum la ceremonio ili havis malnovajn multkolorajn vestaĵojn kaj sonorigis antikvajn muzikilojn. Abundis vizitantoj en la kortego dum la ceremonio.

Oni ankaŭ preparis por mi eblon por konatiĝi kun la vivo en la vilaĝaj komunumoj en Seoul kaj dum tiu tempo mi povis partopreni ankaŭ specialan novjarkunsidon de la Korea Esperanto Asocio. Por mi estis granda ĝojo trovi multajn bonkorajn kaj amikecajn samideanojn en tiu organizo, kiuj afable diskutis kun mi

multajn sociajn kaj ekonomiajn demandojn. Laŭ tio nun mi jam pli klare komprenas la kialojn, do kial en Orienta Azio oni povis atingi mirindajn ekonomiajn sukcesojn post la milito kaj kiel Japanio kaj Koreio povis estiĝi la plej alte evoluintaj landoj en Azio. En la seoula vilaĝa komunumo mi prelegis pri la hungara vilaĝa vivo, tiu prelego troveblas en la venonta ĉapitro de ĉi tiu libro.

La oficejo de Kara An estas en Inchon, proksime al mia seoula hotelo. Tie li okupiĝas pri komerco de afrikaj artobjektoj kaj li estas la redaktoro de la interreta organo “La Solidareco”. Li apartenas al la anarkista movado, pri kio okcidentanoj malmulte scias. Laŭ liaj klarigoj mi jam pli bone komprenas la celojn de la orientaziaj maldekstraj sociaj organizoj kaj ankaŭ la celojn de la anarkista movado. Komprenante la agadon de la movado mi ĝoje konstatis, ke ili laboras por ke oni kreu pli bonan kaj justan socion kie laŭ la principo de solidareco la riĉuloj devas helpi la handikapulojn. En Eŭropo la vorto anarkismo havas negativan signifon, do tie oni opinias, ke la anarkistoj intencas detrui la socian vivon kaj ke anstataŭ ordo ili volas krei kaoson. En Seoul mi komprenis, ke la koreaj anarkistoj intencas krei pli bonan socion kie estas pli da libereco, do kie ne la ŝtato ordonas la civitanojn kiel ili dancu.

Post la seulaj tagoj mi vojaĝxis al urbo Iksan por partopreni la sepan internacian renkontiĝon pri meditado en la centro de la ŭonbulisma religio. Ankaŭ tie mi havis tre agrablajn kaj neforgeseblajn spertojn. Mi povis konatiĝi kun la malnova budhisma religia tradicio kaj povis persone sperti la avantaĝojn de la ĉiutaga meditado. Tie mi komprenis kiel oni povas pligrandigi spiritan potencon venkante materian potencon per religia kredo kaj realmorala trejno. Mi kun ĝojo konstatis, ke en la religia centro ĉiuj homoj amike salutis unu la alian, eĉ se ili ne konis unu la alian persone.

Tio estis kutimo en mia juneco en la malgrandaj vilaĝoj en Hungario, sed bedaŭrinde nuntempe jam tiutipa persona interrilato ne plu ekzistas inter la homoj en mia lando. En la ŭonbulisma religia centro ni partoprenis ankaŭ specialajn ceremoniojn per kiuj ni povis evoluigi niajn spiritajn kaj mensajn kaj ankaŭ la fizikajn statojn de



nia korpo. Temas pri la 108 riverencoj kiuj ŝajnis esti iomete laciga je la komenco sed je la fino mi sentis, ke tio estis tre sana por mia korpo. Kvankam mi klopodis obei la instruojn, mi devis konstati ĉiutage, ke mi, eŭropano tute ne povis tiel discipline kaj senmove sidi sur la planko dum la meditado kiel la azianoj.

Profesoro Lee Jungkee organizis la meditan renkontiĝon. Mi jam renkontis lin en 1983 en Japanio, kiam li estis la ĝenerala sekretario de la Korea Esperanto Asocio. Tiam mi estis studento de japana universitato Nanzan Daigaku en mezjapana urbo Nagoya. Li perfekte preparis la kunvenon, la prelegoj estis altnivelaj. Samtempe okazis ankaŭ multaj amuzaj programoj kaj ekskursoj. Mi ĝojis vidi kian amikecan atmosferon kaj gajan etoson kreis en la komuna vespermanĝo Oh Soon-mo, kies Esperanto nomo estas Brila.

Ankaŭ mi prelegis en la renkontiĝo. La titolo de mia prelego estis “Fundamenta simileco de moralaj leĝoj en la ŭonbulika doktrino kaj katolika instruo”. Post la fino de la meditata renkontiĝo mi vojaĝis al Busan, la fama sudkorea havenurbo. Sed la venontan nokton mi pasigis ankoraŭ en la ŭonbulisma kulturcentro de urbo Chunju, kie ŭonbulisma pastro donis neuzatan ĉambbron al mi por tranokti. En tiu domo infanoj havis specialan programon en la najbara ĉambro. Tie la infanoj lernis ĉinajn literojn dum kvar tagoj. La slogano de tiu programo estis „Bone fari - bone diri”. La kono de kelkaj ĉinaj ideogramoj estas parto de la ĝenerala klereco aŭ kultureco en la korea socio.

La venontan matenon Esti venis al mia tranoktejo kaj akompanis min al aŭtobushaltejo de urbo Chunju por vojaĝi al urbo Busan. En mia ĉambro estis tro malvarma sen hejtado, sed bonŝance mi povis agrable dormi ĉar oni uzis litohejtigilon, kies korea nomo estas „ĉong gi ĵang pan.” Pri miaj spertoj en la meditata renkontiĝo oni aperigis artikolon en La Lanterno Azia. Tiu verketo reaperas ankaŭ en ĉi tiu libro en la venontaj ĉapitroj.



La aŭtoro antaŭ la enirejo de hotelo Sam Won Jang, kie li tranoktis dum sia restado en Busan. Tiu loko estas proksime al la Yongdusan parko kaj duminuta promeno al la mondfama Jagalchi fiŝmerkato.

## VILAĜAJ KOMUNUMOJ EN HUNGARIO

En ĉi tiu prelego mi parolas iomete pri kelkaj fenomenoj de la socia vivo en Hungario, kiu estas orienteŭropa lando apud la rivero Danubo. Nuntempe la nombro de la loĝantaro en Hungario estas 10 milionoj da personoj kaj la teritorio de la lando estas 93 mil kvadrat kilometroj. Do, la grandeco de la teritorio de Hungario estas simila al la teritorio de Sudkoreio, sed en Koreio loĝas kvinoble pli da homoj ol en Hungario.

Se oni volas mezuri la ekonomian evoluon-nivelon, aŭ la riĉecon de lando, tre ofte oni kalkulas la tutlandan produktadon (en angla lingvo Gross Domestic Product, mallonge: GDP). Tiu GDP estas 20 mil dolaroj po persono en Hungario kaj 29 mil dolaroj en Koreio. Do laŭ tiu analizo nuntempe Koreio estas pli evoluita industria lando, ol Hungario (same, kiel ĉiuj aliaj orienteŭropaj landoj).

Dum la mezepoko, eĉ antaŭ la unua mondmilito la plejmulto de la loĝantaro de Hungario vivis en vilaĝoj, kaj nur la malmulto vivis en urboj.

Kategorio (Nombro da homoj en u+v en miloj)	Urboj kaj vilaĝoj (u+v)							
	nombro		loĝantaro (preciza nombro)		proporcio (%)			
					u+v		loĝantaro	
	1910	1920	1910	1920	1910	1920	1910	1920
Pli ol 10	146	95	4 340 889	3 210 805	1,2	2,7	23,7	40,2
5-10	271	130	1 839 778	896 666	2,1	3,7	10,1	11,2
2-5	1 391	561	4 140 070	1 696 598	11,1	16,2	22,6	21,3

Kategorio (Nombro da homoj en u+v en miloj)	Urboj kaj vilaĝoj (u+v)							
	nombro		loĝantaro (preciza nombro)		proporcio (%)			
					u+v		loĝantaro	
	1910	1920	1910	1920	1910	1920	1910	1920
1-2	2 768	828	3 821 520	1 170 751	22,0	23,9	21,0	14,7
0,5-1	3 982	1 016	2 856 170	726 413	31,8	29,3	15,6	9,1
malpli	3 984	838	1 266 106	278 910	31,8	24,2	7,0	3,5
Entute	12 542	3 468	18264533	7 980 143	100,0	100,0	100,0	100,0

Lau ĉi tiu statistiko bone videblas, ke inter 1910 kaj 1920 la nombro de la loĝantaro signifec malgrandiĝis, ĉar Hungario malvenkis en la milito, kaj pro tio perdis grandan parton de sia teritorio kaj ankaŭ pli ol duonon de sia loĝantaro. Kaj ankaŭ bone videblas, ke antaŭ la milito 34% de la loĝantaro vivis en urboj, aŭ grandaj vilaĝoj kaj 66% vivis en lokoj, kie nur malpli ol 5000 homoj vivis en la loka komunumo.

En tiu statistiko ankaŭ bone videblas, ke 7% de la loĝantaro vivis en etaj vilaĝoj aŭ en farmoj, kie la najbaraj domoj troveblis 1-2 kilometrojn unu de la alia. Tio estas unika orienteŭropa fenomeno kaj la kialo estas historia. Dum la 16-a kaj 17-a jarcentoj la islama turka imperio atakis multajn orienteŭropajn kaj mezeŭropajn landojn kaj detruis ankaŭ parton de Hungario. Pro tio multaj hungaroj mortis en la urboj kaj vilaĝoj kaj pro tio multaj hungaroj konstruis domon por sia familio sur la kampoj kaj tiamaniere la nombro de farmoj signifec pligrandiĝis.

Post la fino de la dua mondmilito la situacio denove signifeca ŝanĝiĝis. La statistiko rilate al la urboj troveblas malantaŭe kaj bone videblas, ke en 1949 nur 36,8% de la hungaroj vivis en urboj, sed en 1994 jam 64,1%, do la plejmulto de la tutlanda loĝantaro estis urbaj civitanoj:

Kategorio	La urboj					
	nombro		loĝantaro		proporcio %	
	1949	1995	1949	1994*	1949	1994
Budapest	1	1	1 590 316	1 995 696	17,3	19,4
Pli ol 100 000	3	8	335 518	1 220 225	3,6	11,9
50 000–100 000	4	12	277 062	788 613	3,0	7,7
25 000–50 000	22	26	768 578	867 706	8,3	8,4
10 000–25 000	22	78	407 884	1 219 577	4,4	11,9
5000–10 000	2	56	18 063	417 578	0,2	4,1
Malpli ol 5000	–	19	–	74197	–	0,7
Entute	54	200	3 397 421	6 583 592	36,8	64,1

Rilate al la vilaĝoj la sama statistiko troveblas malantaŭe.

Kategorio	La vilaĝoj							
	nombro		loĝantaro		proporcio (%)			
					u+v		loĝantaro	
	1949	1990	1949	1990	1949	1990	1949	1990
Pli ol 20 000	3	–	75 794	–	0,1	–	0,8	–
10 000–20 000	50	16	644 073	211 600	1,5	0,5	7,0	2,0
5000–10 000	150	92	1 030 100	604 566	4,6	3,0	11,2	5,8
2000–5000	644	481	1 979 036	1 424 010	19,7	15,7	21,5	13,7
1000–2000	860	652	1 213 392	932 296	26,3	21,2	13,2	9,0
500–1000	901	713	663 458	519 349	27,6	23,2	7,2	5,0
Malpli ol 500	603	950	209 011	265 729	18,5	30,9	2,3	2,6
Entute	3 211	2 904	5 814 864	3 957 550	98,3	94,5	63,2	38,1

Laŭ la statistiko oni povas konkludi, ke nuntempe la plejmulto de la loĝantaro vivas en urboj aŭ grandaj vilaĝoj kaj nur malmulto en vilaĝetoj aŭ en farmoj. Post la dua mondmilito ĝis 1990 estis komunisma politika sistemo en Orienta Eŭropo kaj dum tiu tempo la registaro ordonis, ke kamparanoj organizu agrikulturajn kooperativojn kaj la tuta vilaĝa komunumo laboru kaj vivu kune tiamaniere.



Trankvila vivo de la geamikoj de la aŭtoro en Eŭropa urbeto



Dum tiu tempo, do ne plu eblis vivi por familioj sole en la farmoj. Kaj la politiko de la tiama registaro celis evoluigi la industrion kaj pro tio multaj kamparanoj estis senditaj translokiĝi al urboj kaj aliaj industriaj lokoj (ekz. minejoj, ktp.).

Sekve de tio la vivmaniero de la kamparanoj au vilaĝanoj signifecis ŝanĝiĝis. Tradicie, en la vilaĝaj societoj la morala nivelo estis pli alta ol en la urboj, la vilaĝanoj konis unu la alian persone kaj la familianoj regule helpis unu la alian (ekzemple dum tempo de rikolto ĉiuj familianoj kolektiĝis por fari la malfacilan laboron kune). Sed en la grandaj urboj la rilatoj inter la homoj estiĝis pli senpersonecaj kaj senamikecaj. Nuntempe estas tre ofta fenomeno, ke homoj, kiuj kune vivas en granda deketaĝa urba konstruaĵo, ne konas unu la alian, kaj ne salutas unu la alian.

Dum la komunisma periodo la ŝtato strikte kontrolis ĉion, do estis serioze malpermesite konstrui specialajn vilaĝajn komunumojn, kie la membroj aŭtonome organizis sian vivon, fondis lernejojn, ktp. (kiel ekzemple oni faris tion en kibucoj en Izraelo). La ŝtato strikte ordonis, kiujn lernolibrojn oni rajtis kaj devis uzi en la lernejoj, kaj nek vilaĝoj, nek urboj, nek religioj, nek fondaĵoj povis agi kontraŭ la ordono de la ŝtato. Pro tio specialaj aŭtonomaj komunumoj (similaj al la koreaj vilaĝaj komunumoj) funkciis nek en la vilaĝoj nek en la urboj en Hungario dum la komunisma periodo.

Post la politikaj ŝanĝoj en la jaroj 1989-1990 la situacio ŝanĝiĝis en Orienta Eŭropo kaj ankaŭ en Hungario. Oni denove enkondukis la kapitalisman politikan sistemon en la lando, kaj post tiu tempo multaj politikaj partioj rajtas agadi kaj denove merkata-ekonomia sistemo estas uzata en la lando. Sed pro la manko de sperto kaj tradicio nek post la politikaj ŝanĝoj formiĝis specialaj vilaĝaj komunumoj en la urboj, kie la membroj de la komunumo kune laboras, kune produktas agrikulturajn varojn kaj kune organizas lernejojn por la infanoj, ktp.

Dum la komunisma sistemo estis avantaĝo, ke la ŝtato ordonis ĉiujn civitanojn labori kaj ŝtataj oficejoj donis laboreblon por ĉiuj civitanoj, kvankam la salajroj estis pli malaltaj ol en la najbaraj kapitalismaj landoj. (La ŝtato povis fari tion, ĉar preskaŭ ĉiuj



entreprenoj, oficejoj, lernejoj, ktp. estis ŝtatposedaĵoj.) Post la politikaj ŝanĝoj estas malavantaĵo, ke senlaboreco estas grava socia problemo en Hungario, same, kiel en multaj aliaj eŭropaj landoj. Dum la lastaj dudek jaroj post la politikaj ŝanĝoj tamen neniam okazis, ke la hungara loĝantaro voĉdonis por la kandidatoj de la komunisma partio, do, post 1990 neniam komunisma parlamentano estis elektita.

Post la militoj estis serioza malriĉeco en la vilaĝoj en Hungario. En mia juneco estis elementaj lernejoj, kie diversaĝaj infanoj lernis kune en la sama ĉambro, do 6, 7, 8 kaj 9-jaragxaj, kaj estis tempo dum vintro kiam la instruisto anoncis, ke pro manko de ligno kaj karbo oni ne povis hejti la lernejon kaj pro tio ni, infanoj ne devis viziti la lernejon dum kelkaj tagoj. En nia lernolibro estis populara rakonto de Móra Ferenc, fama hungara verkisto, kies titolo estis „*La sledo*”.

En tiu rakonto temis pri infanoj en vilaĝo, kiuj estis malfeliĉaj, ĉar dum vintro neĝis kaj ili volis ludi kun sledo, sed pro manko de ligno iliaj gepatroj ne povis fari sledon por ili. Sed bonŝance dum la venonta somero la gepatroj sukcesis ricevi iom da mono kaj ili povis aĉeti lignon kaj la patro faris sledon por la infanoj. Post kelkaj monatoj venis denove vintro, denove neĝis, kaj la infanoj kun granda ĝojo iris al la montetoj por provi la novan sledon.

Sed antaŭ ol akiri la montetojn la infanoj eniris en dometon je la rando de la vilaĝo, kie ilia avino vivis sole. La infanoj konstatis, ke la avino estis malgaja, ĉar pro manko de ligno ŝi ne povis hejti sian domon, do ŝi sidis malgaje en malvarma ĉambro. Kaj la infanoj eliris el la domo, tranĉis la sedon en pecojn kaj bruligante tiujn lignopecojn ili kreis varmecon en la ĉambro. Post kelkaj minutoj ili rigardis kun granda ĝojo kiel ilia avino fariĝis pli kaj pli gaja, spertante la agrablan varmecon en la malnova domo.

Do, tia estis la instruado en vilaĝa lernejo en mia juneco kaj la situacio dum la lastaj kelkaj jardekoj jam tute ŝanĝiĝis. Jam la plejmulto de la hungara loĝantaro vivas en urboj, kie oni uzas centran hejtan sistemon, uzante gason kaj la vivnivelo nuntempe estas certe pli alta ol antaŭ kelkaj jardekoj. Pro tio multaj infanoj,

plejparte en grandaj urboj, jam tute ne povas kompreni, kia instruado en vilaĝa lernejo estis en mia juneco kaj kia la socia vivo estis en la vilaĝaj komunumoj antaŭ kelkaj jardekoj.

Estas ankaŭ alia socia fenomeno en Hungario, kio estas stranga kaj malfacile komprenebla por alilandanoj. Tiu fenomeno grave ŝanĝis la ĉiutagan vivon de la loĝantaro en la vilaĝoj post la politikaj ŝanĝoj kaj la kialo de la fenomeno rilatas al la problemo de krimfarado kaj senlaboreco.

Ĝis la politikaj ŝanĝoj dum la komunista epoko la tutan socian vivon kaj en la vilaĝoj kaj en la urboj kontrolis la komunista partio. En ĉiuj laborejoj, do kaj en la fabrikoj en la urboj, kaj en la agrikulturaj kooperativoj en la vilaĝoj, kaj en la lernejoj kaj oficejoj, ktp. en la tuta lando funkciis loka organizo de la komunista partio kaj la estro de tiu organizo gvidis kaj kontrolis la agadon.

Dum la komunista erao estis leĝo, ke ĉiuj homoj devis labori kaj la nomon kaj adreson de la laborloko oni registris en persona identifikilo. Kaj se policisto kontrolis la dokumentojn kaj konstatis, ke la kontrolita persono ne havis registritan laborejon, tiam la juĝejo povis sendi lin al malliberejo. Estis komunista slogano: “Kiu ne laboras, tiu ne havas rajton manĝi!”

Sekve de tio la kutima vivmaniero en la vilaĝoj estis, ke ĉiuj vilaĝanoj frumatene ellitiĝis, la plenkreskuloj iris al la agrikulturaj kooperativoj aŭ al la fabrikoj por labori, kaj la infanoj iris al la lernejoj por lerni, kaj la maljunuloj restis hejme kaj laboris en la ĝardenoj kaj manĝigis la porkojn kaj la kokinojn. En tiu komunumo la vilaĝanoj konis unu la alian persone kaj oni tute ne respektis homojn, kiuj maldiligente laboris.

Post la politikaj ŝanĝoj tiu situacio signifecis ŝanĝiĝis. Post la strikte kontrolita komunista sistemo la civitanoj sopiris vivi en libereco kaj multaj kandidatoj de diversaj liberalaj politikaj movadoj kaj partioj estis elektitaj parlamentanoj. Poste ili ŝanĝis la leĝon kaj ordonis ne plu puni la senlaborulojn. Kaj laŭ la nova leĝo oni ordonis, ke senlaboruloj ricevu subvencion de la ŝtato kaj tiu subvencio foje-foje estis la sama sumo, kiun la laborantaj homoj ricevis en siaj laborejoj

kiel salajron. (La homoj ricevas subvenciojn pro senlaboreco, pro havo de granda familio, pro kontribuo al hejtado, ktp.) Sekve de tio multaj homoj konkludis, ke tute ne indas labori, se sen laboro oni povas ricevi la saman sumon kiel subvencion de diversaj ŝtatoficejoj.

Alia socia problemo estis, ke la liberalaj parlamentanoj konstruis novan leĝon kaj laŭ tiu leĝo oni malpermesis, ke policistoj komencu esplori, se krimuloj ŝtelis agrikulturajn produktaĵojn en la ĝardenoj. La liberalaj politikistoj enkondukis uzi la vorton “porviva krimfarado” aŭ “vivtena krimfarado”. Ili opiniis, ke se homo ne povas vivteni pro senlaboreco, do en tiu kazo estas kompreneble, ke li ŝtelas la fruktojn kaj terpomojn kaj kokinojn el la ĝardenoj de aliuloj. (Laŭ leĝo se la valoro de la ŝtelitaj varoj estis pli malalta, ol 20 mil forintoj, do 100 dolaroj, tiam la policejo ne rajtis komenci procedon de esploro por trovi kaj puni la krimulon.)

Pro tio multaj kamparanoj kaj vilaĝanoj konkludis, ke tute ne indas labori en la ĝardenoj apud siaj domoj. Estas tiel, ĉar dum nokto krimuloj ŝtelas ĉion kaj poste ili povos fari nenion kaj ricevos nenian helpon de policejo por ricevi la valoron de la ŝtelitaj varoj. Pro tio se nuntempe oni vojaĝas tra vilaĝoj en Hungario, tre ofte videblas, ke en ĝardenoj oni produktas nenion kaj la vilaĝanoj faras nenion dum la tuta tempo ĉiutage. Estas grava socia problemo nuntempe, ke en multaj familioj la infanoj neniam vidas pozitivan vivmodelon, do multaj infanoj vidas, ke la gepatroj dum sia tuta vivo neniam iras labori. En ĵurnaloj mi legis, ke instruistoj demandis infanojn en lernejo, kio ili volas esti post la fino de lernejo kaj ili respondis, ke ili volas esti senlaboruloj, same kiel la gepatroj.

Gravan ekonomian kaj socian problemon okazis, ke post la politikaj ŝanĝoj oni malsaĝe vendis kaj privatigis la fabrikojn, bankojn kaj industriajn kaj komercajn entreprenojn, kiuj antaŭe estis posedaĵo de la ŝtato. Ekzemple, oni vendis ĉiujn fabrikojn, kiuj produktis oleon el sunfloro al francaj entreprenoj kiuj poste finis la funkciadon de la fabrikoj, malkonstruis la fabrikojn, la maŝinojn sendis al Francio kaj poste en Hungario oni devas aĉeti oleon, kio estis produktita en aliaj landoj. Sekve de tio ĉiuj homoj, kiuj laboris en tiuj fabrikoj, perdis

laboron, same kiel la kamparanoj, kiuj antaŭe produktis sunflorojn por tiuj fabrikoj.

Simila afero okazis ankaŭ rilate al la sukerindustrio. Antaŭ la politikaj ŝanĝoj dum la komunista erao estis 11 aŭ 12 sukerfabrikoj en Hungario kaj oni povis produkti la sukerbezono de la lando, eĉ Hungario povis eksporti signifan kvanton de sukero al alilanda merkato. Post la politikaj ŝanĝoj la ŝtato vendis preskaŭ ĉiujn sukerfabrikojn al alilandaj entreprenoj, kiuj malkonstruis ĉiujn fabrikojn, sendis la maŝinojn al alilandaj fabrikoj kaj sekve de tio nun estas nur unu sukerfabriko en la lando. Tiamaniere en la kapitalisma erao oni detruis la iaman faman kaj fortan agrikulturon de Hungario, kaj pro tio nun ĉiuj laboristoj kiuj antaŭe laboris por la sukerfabrikoj, kaj ĉiuj kamparanoj kiuj antaŭe produktis sukerbetojn por la sukerfabrikoj perdis la laboron kune kun la kamparanoj, kiuj antaŭe uzis la melason (flankan produktaĵon de la sukerfarado) por manĝigi siajn bestojn en siaj farmoj.



Vilaĝa vivo en Hungario

Tutipaj malbonaj decidoj okazis senesperan situacion en Hungario. Estas vilaĝetoj, kie neniu el la plenkreskuloj havas laborlokon, ĉiuj vilaĝanoj nur atendas la tagon, kiam ili ricevas la ŝtatan helpmonon. Pro timo de krimfaradoj ili eĉ en la ĝardeno ĉirkaŭ ilia domo ne laboras, ne semas grajnon, kaj produktas nenion, kvankam antaŭ kelkdek jaroj tiutipa laboro estis la kutima ĉiutaga vivmaniero en la vilaĝoj.

Tiuj malbonaj decidoj kaŭzis senesperan situacion ankaŭ en la urboj en Hungario por multaj homoj, plejparte por la laboristoj, kiuj perdis la laboron post la fino de la komunista epoko. Sed ankaŭ por la tuta loĝantaro estas malavantaĝo, ke post kiam oni malfermis 90 procentojn de la sukerfabrikoj en la lando, la alilandaj sukerproduktantaj fabrikoj dubligis la prezon de la sukero. Tiel Hungario jam ne plu povas produkti la bezonatan sukerokvanton kaj la loĝantaro devas pagi duoble pli altan prezon por krei profiton por alilandaj entreprenoj.

Antaŭ dudek jaroj en Hungario, same, kiel en ĉiuj aliaj orienteŭropaj landoj la homoj volis fini la komunistan epokon kaj ili intencis ŝanĝi la politikan sistemon. Tiam multaj homoj opiniis, ke eble la liberalismo povos konstrui pli bonan kaj homecan socion kaj pro tio multaj voĉdonis por la novaj demokratiaj partioj kaj ankaŭ por la liberala partio. Tiam la liberala partio fariĝis la dua plej forta partio en la hungara parlamento, sed nuntempe jam la plejmulto de la loĝantaro vidas, ke antaŭe ili ne tiutipan kapitalisman sistemon volis konstrui.

Sekve de tio dum la lastaj parlamentaj elektoj la liberala partio sukcesis nek unu kandidaton sendi al la parlamento, kaj la nova registaro kun la helpo de la nova parlamento dum ĉi tiuj jaroj intencas korekti la politikajn erarojn de la antaŭaj jaroj. Oni denove ŝanĝis la leĝon kaj laŭ tiu nova leĝo oni ordonis, ke policejo ĉiam komencu esplori la aferon, se okazas krimo, eĉ kiam la valoro de la ŝtelitaj varoj estas malpli ol 20 mil forintoj. La nova registaro intencas krei aŭ kreiĝi ankaŭ novajn laboreblojn por la senlaboruloj, tamen tio ŝajnas esti malfacila, ĉar nuntempe jam la plejmulto de la fabrikoj kaj aliaj entreprenoj estas privataj posedaĵoj kaj el la nacia budĝeto oni devas pagi signifecan ŝuldon al alilandaj bankoj kaj dum ĉi tiu jaro kaj ankaŭ dum multaj jaroj en la estonto.



Supre: la domo de la aŭtoro en vilaĝstila parto de Budapeŝto  
Malsupre: najbaroj helpas unu la alian por konstrui domon



## IMPRESOJ DE LA MEDITADA RENKONTIĜO

La 7-a Internacia Renkontiĝo de Meditado estis organizita en urbo Iksan inter la 9-a kaj la 12-a de Januaro, kiun ankaŭ mi partoprenis el malproksima eŭropa lando, el Hungario. Fakte mi jam ricevis inviton viziti Sudan Koreion antaŭ longa tempo, tamen mi devis atendi tridek jarojn por ke mi povu realigi la viziton. Okazis, ke en 1983 mi studis en japana universitato Nanzan Daigaku por doktoriĝi en ekonomio kaj tiam mi ankaŭ partoprenis sociosciencan konferencon en Yokohama.

Tie ni diskutis la situacion de la koreoj vivantaj en Japanio, kiuj jam naskiĝis en Japanio (same, kiel iliaj gepatroj), tamen ili suferis pro diskriminacio. Estas konate, ke la gepatroj de iliaj gepatroj per forto estis ordonitaj translokiĝi al Japanio antaŭ la dua mondmilito. (Laŭ mia kono dum la lastaj jaroj la situacio jam pliboniĝis.) En tiu konferenco okazis, ke ĉe la tagmango LEE Jungkee sidis apud mi kaj li invitis min viziti Koreion, ĉar tiam la korea registaro intencis malfermi la pordojn al la ekstera mondo.

Do, mi iris al la Hungara Ambassadejo por demandi ĉu oni permesas al mi viziti Koreion, aŭ ne. Sed la oficistoj redemandis min: *"Ĉu vi ne scias, ke ne estas diplomaciaj rilatoj inter Suda Koreio kaj Hungario kaj ĉu vi volas kaŭzi internacian skandalon?"* Do, finfine mi ne ricevis permeson, kaj tiam mi ne povis veni ĉi tien. Sed bonŝance je la fino de la okdekaj jaroj estis politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo kaj post la politikaj ŝanĝoj Hungario estis la unua lando en Orienta Eŭropo, kiu konstruis diplomaciajn rilatojn kun la Korea Respubliko.

Post tiam mi jam havis laŭleĝan eblon veni ĉi tien, sed pro multega laboro mi ne povis tre ofte vojaĝi privatcele. Unue mi fariĝis strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo, la Nacia Petrola Korporacio, poste mi laboris por la Parlamentejo kaj mia tasko estis kontroli kaj auditori la registaron kaj raportoj al la Parlamentejo, ĉu la Registaro agadas laŭ leĝo aŭ ne.

Antaŭ nelonge mi pensiuliĝis kaj tiamaniere nuntempe mi jam havas pli da libertempo vojaĝi kaj partopreni ankaŭ esperantistajn renkontiĝojn. Do, mi partoprenis la Universalan Kongreson en Kopenhago, kaj tie mi informiĝis pri la eblo de partopreno en la meditada kunveno. Kun granda ĝojo mi aliĝis al la renkontiĝo, ĉar mi rememoris, ke mi jam antaŭ tridek jaroj ricevis inviton el Suda Koreio, la mirakla lando, kiu dum kelkaj jardekoj tre sukcese evoluigis la ekonomion.

Nun la rezulto de la diligenta laboro de pli ol kvardek milionoj da sudkoreoj estas bone konata en la tuta mondo. La ekonomia evoluo estis tre rapida kaj la vivnivelo fariĝis tre alta dum kelkaj jardekoj post terura milito en la korea duoninsulo. La koreaj industriaj produktaĵoj estas bonkvalitaj kaj altnivelaj kaj multaj koreaj aŭtomobiloj troveblas sur la eŭropaj stratoj kaj ankaŭ mi mem korean televidilon rigardas vespere en mia hejmo.

Alveninte al Seulo, mi miris pri la ekonomia riĉeco, la multnombraj novaj kaj bonkvalitaj aŭtomobiloj en la stratoj kaj la precize funkciantaj publikaj transportiloj, kiuj tute ne troveblas en Orienta Eŭropo. Kaj alveninte al la Centro de la Ŭonbulisma Eklezio en urbo Iksan ni ankaŭ pozitivajn impresojn ricevis jam je la komenco. La kvara ĉefmajstro de la eklezio akceptis nin kaj antaŭe la pastroj ofertis al ni freŝajn fruktojn kaj dolĉaĵojn.

Mi kun granda ĝojo spertis, ke la preparo de la renkontiĝo estis tre preciza, ĉiuj partoprenantoj ricevis la tutan programon en bele presita libreto je la komenco kaj ankaŭ la ĉefaj elementoj de la ŭonbulisma doktrino troveblis tie en facile komprenebla internacia lingvo. Ankaŭ la manĝaĵoj estis bongustaj. Estis nur unu escepto, sed mi ne scias la korean nomon de tiu manĝaĵo. Sed mi bone rememoras, ke la japana nomo de tiu manĝaĵo estis *natto*, ĉar tio estis preskaŭ la unua frazo, kiun mi ellernis en japana lingvo, ke “*natto wa oishikunai to omoimasu*”. Tio signifas, ke la *natto* ne plaĉas al mi.

Estis nekredebla evento por mi viziti la birdoobservejon ĉe la Gungang-riverbuso. Tie ni vizitis ankaŭ la lokon, kie oni faris la filmon “*JSA -Joint Security Area*”. La temo de tiu filmo rilatas al la



dividiteco de la korea duoninsulo post la milito en 1950~1953 kaj por mi, eŭropano estis malfacila aŭskulti sen larmoj en la okuloj la historion de maljuna partoprenantino de la renkontiĝo. Tie ŝi diris al mi, ke siaj du fratinoj restis en Norda Koreio post la milito kaj dum pli ol sesdek jaroj ŝi ricevis nenian informon pri ili. Do ŝi ne scias, kie ili loĝas, aŭ ĉu ili vivas ankoraŭ, aŭ ne.

Tiutipa fenomeno tute ne sperteblas en Eŭropo. Kvankam ankaŭ Germanio estis dividite dum longa tempo, tamen ne okazis, ke la familianoj ne povis skribi leterojn unu al la alia, eĉ ili povis renkonti persone, se ili volis. Fakte, la orientgermanoj ne ricevis eblon viziti kapitalismajn landojn dum la komunisma epoko, sed ili ricevis pasporton vojaĝi al aliaj komunismaj landoj. La okcidentgermanoj rajtis vojaĝi ĉien en la mondo, do estis kutimo dum multaj jaroj, ke la okcidentgermanoj kaj la orientgermanoj venis al Hungario somere kaj pasigis du semajnojn agrable kune kun siaj familianoj ĉe la lago Balaton, la plej granda lago de Hungario.

Dum la religia kaj kultura programo de la renkontiĝo mi ĝojis sperti la amikecajn interrilatojn inter la partoprenantoj kaj estis granda ĝojo por mi vidi, kiel dece salutis unu la alian ĉiuj homoj en la religia centro, eĉ se ili ne konis unu la alian persone. Mi rememoras, ke antaŭ multaj jardekoj, kiam mi estis infano, la samo okazis ankaŭ en mia lando, ĉefe en la malgrandaj vilagoj. Sed bedaŭrinde nuntempe la interrilato inter la homoj malboniĝis en la mondo. Ankaŭ en Budapeŝt, en mia ĉefurbo jam oni konstruis grandegajn konstruaĵojn, en kiuj pli-malpli 200 loĝejoj troveblas. La plejmulto de tiuj familioj, kiuj kune vivas en la sama domo en tiutipaj konstruaĵoj, tute ne konas unu la alian persone kaj kutime ne salutas unu la alian, kiam ili renkontiĝas en la lifto aŭ en la koridoro.

La plej bonajn kaj la plej esperdonajn spertojn mi ricevis en la renkontiĝo de la plej juna partoprenanto. Ŝi estas 12 jara infano kaj ŝia nomo estas Kim Seyul, kun la Esperanto-nomo Klara. Mi miris, kiel flue kaj bone parolis ŝi en Esperanto kaj tiu fenomeno donas al mi la esperon, ke la Esperanto-movado ankaŭ en la estonto vigle prosperos en Koreio.

Okazis vespere, ke mi volis legi miajn elektronikajn leterojn en la komputilo, sed nek mi, nek la aliaj partoprenantoj sidante apud mi povis solvi la problemon, kiel mi devas ŝanĝi la koreajn kaj la anglajn literojn en la komputilo. Do, mi petis ŝin helpi, kaj ŝi tre inteligente solvis ĉiujn problemojn dum tri minutoj kaj montris al mi kiel mi povas uzi anglajn literojn en la komputilo. Do, mi konkludis, ke same kiel en Eŭropo, ankaŭ ĉi tie en Koreio tre ofte la infanoj instruas la plenkreskulojn kiel oni povas uzi la plej modernajn kaj komplikajn teknikilojn en nia alte evoluata moderna mondo.



Ora statuo de feliĉa bonzo en busana budhisma sanktejo



Interesa ceremonio en Jagalchi distrikto de urbo Busan



La prezidanto de la busana Esperanto-organizo kun s-ino Granda

## POST TRIDEK JAROJ

Mi pasigis du semajnojn en Koreio kaj dum tiu tempo mi vizitis kelkajn belajn urbojn, gustumis bungustajn, ekzotikajn mangĝaĵojn kaj ĝuis multajn freŝajn fruktojn. Post dusemajna restado alvenis la tempo por vojaĝi al Japanio. Mia malnova japana amiko, Kikusima Kazuko (ŝia esperanto nomo estas Krizantemo) donis al mi bonajn ideojn kiel eblas komforte vojaĝi el Koreio al Japanio. Temas pri la korea ŝipo *Panstar Dream*, kiun mi trovis laŭ ŝia propono en interreta paĝo [www.byferryfrom2japan.com](http://www.byferryfrom2japan.com). Per tiu ŝipo mi komforte povis vojaĝi el Busan al Osaka. Oni ofertis tre riĉan vespermanĝon kaj matenmanĝon dum la vojaĝo kaj post vespermanĝo estis interesa amuzprogramo kun belaj dancistinoj kaj bonaj muzikistoj.

Por mi la plej interesa parto de mia vojaĝo estis mia revojaĝo al urbo Nagoya. Antaŭ tri jardekoj mi vivis tie dum longa tempo kaj tio estis parto de mia vivo. Do, mi interesiĝis, kiel la urbo ŝanĝiĝis kaj kiel mia universitato evoluis post la fino de mia studprogramo tie. Miaj unuaj impresoj en la urbo estis ŝokigaj. Kiam mi elvagoniĝis el la Kintecu trajno en la Nagoya stacidomo, mi pensis, ke mi estis en nekonata amerika urbo. Mi tute ne trovis la konatan stacidomon, en kiu mi regule en- kaj elvagoniĝis antaŭ tridek jaroj. Sed mi trovis novajn modernajn ĉielskrapajn grandegajn konstruaĵojn, same kiel en la amerikaj urboj New York kaj Boston, kie mi studis post la fino de mia japana studprogramo.

Laŭ miaj rememoroj dum mia studentvivo en urbo Nagoya la plej alta konstruaĵo estis la Palaco de la Nuba Dragono en Sinsakae machi. Pro nostalgio mi volis revidi tiun palacon, ĉar tie mi loĝis dum kelkaj semajnoj sur la 17-a etaĝo je la komenco de mia studenta tempo. Sed por mi estis iom malfacila trovi la konstruaĵon ĉar nuntempe estas multaj similaj, eĉ pli altaj palacoj en tiu parto de Nagoya. Do, mi devis kelkfoje demandi la japanojn en la strato en japana lingvo, ĉu “*Unryu biru wa doko desuka?*” (Kie estas la Palaco de la Nuba Dragono?) .

Ankaŭ mia universitato grave ŝanĝiĝis kaj multe evoluis. Dum mia

studenta tempo estis nur unu kampuso, nun estas du, kaj ankaŭ multaj novaj fakultatoj funkcias nuntempe. Ikai Yosikazu, kiu studis en Nanzan Universitato en Nagoya kaj en ELTE Universitato en Budapeŝt, bonege preparis mian viziton al la universitato. Tie la prezidanto, profesoro Michael Calomano, doktoro de Chicago Universitato akceptis nin solene kun profesoro Morita, kiu estis la prezidanto de la Nagoya Esperanto Centro dum mia studprogramo. Dum tiu vizito mi transdonis mian libron pri mia japana studentvivo al la prezidanto de la universitato. Tiu libro havas la titolon: “*Ruĝa Suno kaj Verda Stelo*” kaj en la libro mi rakontas pri mia studenta vivo kaj pri la temo, kiel mi povis utiligi miajn japanajn spertojn en la Esperanto movado kaj en mia profesia kariero.

Post mia vizito al la universitata prezidanto mi promenis al fama budhisma sanktejo kun Morita Akira. Mi faris tion pro nostalgio, ĉar antaŭ tridek jaroj mi tre ofte promenis tie kun mia japana amikino. La sanktejo nomiĝas Koshoji templo kaj estas tre proksime al la universitato. Onidire tio estas unu el la plej belaj lokoj en Nagoya. La sanktejo troviĝas sur monteto en Yagoto distrikto kaj enhavas malnovan tombejon, arbaron, kvinetaĝan pagodon kaj multajn belegejn malnovajn konstruaĵojn.

Proksime al la sanktejo estis granda vendejo dum mia studenta tempo, ties nomo estis Jusco. (La korekta prononco de tiu nomo estas Ĵasko.) Mi tre ofte aĉetis malkaran manĝaĵon tie kaj surpriziĝis, kiam mi vidis frititajn lokustojn tie antaŭ tridek jaroj. Mi surpriziĝis, ĉar en Eŭropo ne estis kutimo manĝi insektojn, kaj surpriziĝis pro la alta prezo de la frititaj lokustoj. La japanoj klarigis al mi, ke antaŭ la milito abundis lokustoj en la kamparo kaj tiam multaj homoj manĝis ilin fritite por ricevi proteinojn. La manĝado de tiuj insektoj estas tre sana, ĉar la lokustoj ne estas grasaj. Bedaŭrinde post la milito oni uzas multajn kemikaĵojn en la agrikulturo por protekti la plantojn, kaj pro tio nuntempe jam nur malmultaj insektoj vivas en la kamparo. Do, nun necesas bredi ilin en farmoj kaj pro tio la kosto de tiu manĝaĵo estas pli alta, ol antaŭe.

Dum la venonta tago mi faris tuttagan promenon en la suda parto de

la urbo. Mi iris al Hitotsuyama Jutakuguchi, la loko, kie mi vivis dum unu jaro en 1983. Mi interesiĝis pri la konataj stratoj kaj domoj kaj ankaŭ pri la novaĵoj. Pro nostalgio mi ne vojaĝis per publika aŭtobuso, sed promenis dum pli ol unu horo, same kiel mi faris antaŭ tridek jaroj. Tiam mi estis malriĉa studento kaj volis ŝpari monon tiel. Post tridek jaroj mi klare vidas, ke tiu decido estis bona kaj saĝa, ĉar krom la monŝparo mi ankaŭ efike konservis mian sanon tiamaniere. Promenante matene al la universitato mi vidis, ke en multaj laborejoj la oficistoj faris gimnastikon kaj la ĉiutaga unuhora promeno matene kaj la alia unuhora promeno vespere estis bona gimnastiko por mi.

Post tridek jaroj mi volis fari la samon. Mi eliris el mia hotelo matene je la 9-a horo kaj realvenis al la hotelo vespere je la 6-a horo. Do mi faris tuttagan ekskurson, tamen mi tute ne laciĝis. Unue mi vojaĝis per subtera trajno el Nagoya Stacidomo al Irinaka. Tie mi iris al Nanzan Universitato unue kaj matenmanĝis en mia malnova universitata restoracio. Tie mi lernis antaŭ tridek jaroj la unuajn japanajn manĝaĵonomojn. Mi rememoras, ke dum mia unua vizito al tiu restoracio antaŭ tridek jaroj neniu estis en tiu loko. La japanoj pli malfrue manĝas ol la eŭropanoj. Mi iris al la kasistino kaj demandis en angla lingvo:

- *What can I have for lunch today? (Kion mi povas manĝi nun?)*

La juna kasistino respondis en japana lingvo, sed mi tute ne komprenis kion ŝi diris. Ŝi parolis nur japane. Pro tio mi devis atendi dum kelkaj minutoj ĝis kiam japana studento eniris en la restoracio. Tiam mi petis la studenton, ke li diru al mi la japanan nomon de la plej malmultekosta manĝaĵo. Li diris, ke tio estis karee raisu. Do, mi iris denove al la kasistino, diris al ŝi ke “*Karee raisu desu.*”, ricevis la kuponon, kaj kun la kupono mi iris al la alia loko, kie oni donis la manĝaĵojn al la gastoj. Tie mi denove diris al la kuiristino, ke “*Karee raisu desu.*”, kaj post mallonga tempo mi ricevis simplan, sanecan kaj bongustan orientan manĝaĵon.

La venontajn tagojn okazis la sama afero. Neniu alia gasto estis en la

restoracio krom mi, kaj mi denove povis peti nur la saman manĝaĵon. Kiam la ĉiutaga manĝado de la karee raisu estis tro monotona, mi devis lerni pli kaj pli novajn manĝaĵonomojn en japana lingvo. Tio estis tre efika metodo de la lernado de la japana lingvo.

Pro nostalgio post tridek jaroj mi denove manĝis karee raisu kaj mi konkludis, ke tiu manĝaĵo estis same bongusta, kiel tio estis antaŭ tridek jaroj. Post la matenmanĝo mi promenis al Yagoto kaj surpriziĝis, ke multaj novaj konstruaĵoj troveblis ankaŭ en tiu loko. Proksime al la Jusco vendejo mi vidis grandegajn novajn konstruaĵojn. Laŭ la ĉinaj ideogramoj sur la muro mi komprenis, ke tie funkciis nova universitato. La nomo de tiu institucio estis Chukyo Daigaku.

Poste mi promenis al Otokikiyama, poste al Yagotohigashi, poste al Motoyagoto kaj post unuhora promeno mi vidis konatan lokon. Tiu estis la ponto sur la Tenpaku rivero kaj la Tenpaku urbodomo apud la alia bordo de la rivero. Transpasante la ponton super la rivero mi alvenis al Shimada kaj post alia kvaronhora promeno mi alvenis al Hitotsuyama Jutakuguchi. Tie estis vendejo antaŭ tridek jaroj, kie trifoje dum semajno mi aĉetis bongustajn fiŝojn kies japana nomo estis kawahagi. Mi bakis ilin rekte super la fajro sen oleo, kaj mi manĝis ilin tre ofte. La prezo de tri aŭ kvar fiŝoj estis tiam 100 enoj. Bedaŭrinde tiu vendejo jam ne funkciis, do mi ne povis denove manĝi la samajn bongustajn fiŝojn.

Mi rememoris, ke en tiu loko mi devis turni min dekstren kaj promenante al la pinto de malalta monteto mi baldaŭ vidis la konstruaĵojn de la infangardistina universitato. La japana nomo de tiu institucio estas Nagoya Joshi Daigaku. La malnova domo, kie mi vivis dum unu jaro, troveblis malantaŭ la infangardistina universitato en la sama stato kiel tio aspektis antaŭ tridek jaroj.

Krom la vizito al mia malnova loĝdomo kaj al mia universitato estis speciala evento por mi viziti la esperantistan komunumon kiuj grande helpis min dum mia universitata tempo. Mi renkontis la nunajn membrojn de la Nagoja Esperanto Centro en la nova NEC oficejo en Shinsakae machi. Mi konstatis kun granda ĝojo, ke ankoraŭ multaj

esperantistoj vivas, kun kiuj mi konatiĝis antaŭ tridek jaroj. La nuna prezidanto de la Centro estas budhisma bonzo kaj li donacis al mi tre valorajn librojn pri la budhisma doktrino. Reveninte al Eŭropo mi povis pli profunde kompreni la veran budhisman instruon per la legado de tiuj libroj.

Post unusemajna restado en Nagoya mi revojaĝis al Osaka. En tiu urbo mi tranoktis en Toyo Hotel, modesta hotelo proksime al la Dobutsuen Mae stacidomo de la subtera trajno. En tiu hotelo estis du komputiloj en la salono. La gastoj de la hotelo povis uzi ilin senpage kaj tiel post du semajnoj mi denove povis legi miajn elektronikajn leterojn. Tie mi trovis leteron de d-ro Amri Wandel, profesoro de Hebrea Universitato en Jerusalemo, kaj gastprofesoro de UCLA (University of California in Los Angeles). Li proponis al mi, ke mi prelegu en la Internacia Kongresa Universitato en Hanojo, la vjetnama ĉefurbo en Julio. Danke al la moderna tekniko mi tuj povis sendi al li la resumon de mia prelego, kies titolo estis *“Kiu kontrolas la registarojn de la mondo?”*

Post unutaga restado en Osaka mi revojaĝis al Koreio per la sama ŝipo, kiun mi uzis antaŭ kelkaj tagoj. Sidante en la belaj salonoj de la ŝipo mi pensadis pri miaj novaj spertoj en Japanio. Mi konkludis, ke Japanio evoluis pli rapide, ol mia lando, Hungario, kaj pli rapide, ol la tuta Orienta Eŭropo. Dum la lastaj jaroj en Orienteŭropo oni ŝanĝis la politikan sistemon, detruis la iamajn komunistajn ŝtatojn kaj enkondukis kapitalistan merkatekonomion. La rezulto tamen estas malbona.

Budapeŝto kaj urbo Nagoya estas similaj, en ambaŭ urboj vivas plimalpli du milionoj da loĝantoj. Dum la lastaj tridek jaroj oni konstruis multajn 30 aŭ 40-etaĝajn modernajn konstruaĵojn en Nagoya kaj oni konstruis nek unu en Budapeŝto. En Orienta Eŭropo estis grandaj ekonomiaj krizoj post la politikaj ŝanĝoj kaj nuntempe tiu krizo, la malriĉeco kaj la senlaboreco estas gravaj sociaj kaj ekonomiaj problemoj en tiu parto de la mondo. Anstataŭ la solvo de tiuj gravaj problemoj en la hungara parlamentejo okazis multaj senrezultaj disputoj post la fino de la komunisma epoko. Multaj



parlamentanoj diris ekzemple, ke necesas evoluigi la demokratian sistemon kaj necesas doni la samajn rajtojn al la samseksamuloj kiujn ĉiuj aliaj homoj havas. Aliaj aldonis, ke necesas doni la rajton al la senhejmuloj ke ili tranoktu en publikaj lokoj, ekzemple en parkoj kaj stacidomoj. Pro tio nuntempe multaj partoj de Budapeŝto aspektas kiel mizerula kvartalo. Fine mi konkludis, ke Hungario kaj Orienta Eŭropo devus pli efike studi kaj apliki la japanan kaj la korean modelojn.

Post kelkaj semajnoj mi informiĝis, ke la estraro de la Internacia Kongresa Universitato akceptis mian proponon, do en Julio mi revojaĝos al Azio por prelegi en Hanojo dum la Universala Kongreso de Esperanto. En Februaro mi legis, ke oni publikigis artikolon pri mia vizito en la reta organo de Nanzan Universitato en angla kaj japana lingvoj, en la venonta ĉapitro de ĉi tiu libro ni reaperigas tiun artikolon.



Oh Gi Sook dece kliniĝas en la sanktejo

## THIRTY YEARS LATER

On January 27, 2012, former CJS student Dr. Markus Gabor visited Nanzan University President Michael Calmano, S.V.D. Markus Gabor, who came from Hungary in 1982 to study at the Center for Japanese Studies came to visit Nanzan with fellow graduates Ikai-san and Morita-san (husband of Marie-Agnes Morita who used to teach at our Department of French Literature) and had a pleasant chat with Nanzan University President Michael Calmano, S.V.D. After graduating from the CJS, he gathered together all the results from his research at Nanzan and acquired a PhD back in Hungary. From that point on, he was active as one of the very few experts on Japanese affairs in Hungary, writing a diverse range of articles on the Japanese language, Japanese economics and management. He also had a book published on his experiences as a foreign student in Japan, which we introduce below.



Photograph: (left): Morita-san, second from the left: Dr. Markus Gabor, next to him: Michael Calmano, S.V.D., far right: Ikai-san



### **CJS修了生マールクシュ氏がカルマノ学長を訪問**

1983年に南山大学外国人留学生別科へ留学されていたハンガリー出身のマールクシュ・ガーボル氏が本学卒業生でご友人である猪飼氏と森田氏(旧・仏文学科で教鞭をとられていた森田・マリイ・アニェス先生のご主人)と共に南山大学を訪れ、カルマノ学長と歓談されました。

マールクシュ氏はCJS別科を修了後、南山大学での研究の成果をまとめ母国で博士を取得、ハンガリーでは数少ない日本通として日本語や日本経済、企業経営といった多岐に渡る記事を執筆されてきました。この度、日本での留学経験を綴った著書を制作・出版されましたのでご紹介します。

写真:左から、森田氏、ガボル氏、カルマノ学長、猪飼氏

**Memorkarto**  
**skribita okaze de la transdono de la libro**  
**RUGA SUNO KAJ VERDA STELO**  
**al la prezidanto de Nanzan Universitato**

マルク・ユ・ガーボル氏著書  
南山大学寄贈を記念して

時：2012年1月27日

所：南山大学学長室

献呈書 Ruga Suno kaj Verda Stelo

寄贈式出席者



Markus Gabor



猪飼志計





## SAYŌNARA JAPAN, DASHI BWAYO KOREA

Revojaĝante al Busan mi pasigis kelkajn tagojn en la fama sudkorea urbo, kie la lokaj esperantistoj montris al mi la riĉan kulture heredaĵon de Koreio kaj dum tiu tempo mi komencis lerni la Korean alfabeton. Laŭ la koreoj tio estas la plej logika skribosistemo de la mondo kaj tio nomiĝas hangul en korea lingvo. Je la fino de mia restado en Koreio mi jam kapablis legi kaj skribi la nomojn de la urboj, kaj la nomojn de la stacidomoj de la subtera trajno en korea lingvo.

Oh Gi Sook (koree:오기속 kies Esperanto nomo estas Granda) amike ĉiĉeronis min al la plej famaj budhismaj sanktejoj en la ĉirkauaĵo de la urbo kaj samtempe enkondukis min ankaŭ en la longan historion de la lando. Ŝi estis nekredeble bonkora al mi. Kiam mi menciis, ke en mia hotelo estis litovarmigilo, kiu tre plaĉis al mi, la venontan tagon ŝi donacis al mi similan litovarmigilon.

Tio estis tre utila por mi en mia hejmo dum la unuaj noktoj post mia hejmenalveno, ĉar en ĉi tiu jaro estis nekutima malvarma vintro en Hungario. La temperaturo en Budapeŝto estis minus 9 Celsius gradoj en la flughaveno kiam mi hejmenalvenis, sed onidire dum nokto estis pli-malpli minus 14 gradoj. En mia domo la akvo glaciĝis en unu el la akvotuboj kaj tiu fenomeno ĝis nun neniam okazis en mia vivo. Sed bonŝance dum la unua nokto post mia revojaĝo al Hungario mi tute komforte povis dormi danke al la bonkvalita litovarmigilo.

Aliaj busanaj samideanoj proponis al mi evoluigi la komercajn rilatojn inter Koreio kaj Hungario kaj por esplori la eblojn post mia rehejmenvojaĝo mi informis la komercajn organizojn en mia lando pri tiuj eblecoj. En Busan mi povis konatiĝi ankaŭ kun interesaj orientaj naturkuracistaj metodoj. Temas pri la bandaĝoterapio, kiu ankoraŭ ne estas uzata en Hungario. Do ankaŭ pri tio mi informis niajn naturkuracistajn organizojn en Budapeŝto sed pro la ekonomia krizo en Orienta Eŭropo en ĉi tiu jaro ne estis ebleco enkonduki tiun kuracmetodon en Hungario.

Mi komencis studi la instruojn de Budho en la Kyoto Monaĥejo

(Kyoto Syudoin) antaŭ tridek jaroj kaj poste mi pliprofundigis miajn meditatajn teknikojn per la ĉiutaga ekzercado de la 108 riverencoj en la centro de la ŭonbulisma eklezio. Sed mi ne sciis, kiel oni riverencis 108 foje, do kio estas la vera signifo de la nombro 108. En Busan Choi Gil-Cha klarigis tion al mi en la fama Hongbeopsa templo.

Laŭ la pli ol dumiljara budhisma tradicio la nombro 108 originas en *Baekpal Beonnoi*, en la 108 pasioj, suferoj kaj malpurecoj, kiuj perturbas kaj malpurigas la menson kaj la korpon de la sentantaj estaĵoj. *Beonnoi* signifas la pasiojn kaj suferojn kiuj perturbas la animan pacon kaj malhelpas la homojn por atingi la iluminigon kaj la Nirvanon.

La nombro 108 kalkuleblas jene: Oni multiplikas la ses sentorganojn (okulo, orelo, nazo, lango, korpo kaj menso) kun la tri animaj statoj (amo, malamo kaj egalanimeco) kaj la rezulto estas 18. Poste oni multiplikas tiujn ses sentorganojn denove kun la tri emocioj (sufero, ĝojo kaj rezigno) kaj la rezulto tiel estigas 36. Fine oni multiplikas tiun nombron kun la tri tempostatoj (pasinto, nuntempo kaj estonto) kaj tiel la rezulto fariĝas 108.



Tiel evidentiĝas kial oni riverencas 108-foje dum la meditada ceremonio. Sed necesas kompreni ke la signifo de la riverenco malsamas en la okcidenta kaj orienta mondoj. En la budhisma religio la vera signifo de la riverenco ne estas adorado al la statuo de Budho, sed oni modeste kaj humile sinesploras kaj suferigas sin por penti kaj pentofari pro la 108 malpurecoj en si mem.

Dum mia restado en urboj Seulo, Iksan, Busan, Nagoya kaj Osaka mi povis konatiĝi kun la ekzotika orientazia mondo kaj provis kompreni la pensmanieron kaj la vivmanieron de la japana kaj korea popoloj. Dume mi vidis multajn belegajn parkojn kaj templojn, manĝis bongustajn manĝaĵojn kaj kunparolis kun multaj helpemaj kaj amikecaj orientaziaj homoj.

Laŭ miaj multaj pozitivaj spertoj mi povas konkludi, ke mia vojaĝo estis tre sukcesa kaj pro tio mi sincere dankas al la orientazia esperantista komunumo. Kaj en Japanio kaj en Koreio mi renkontis multajn bonkorajn kaj amikecajn homojn, kiuj foje-foje eĉ embarasigis min iomete. Post la meditada renkontiĝo mi vizitis malgrandan urbon proksime al Iksan kaj vespere mi decidis promeni iomete en la urbo. Promenante mi haltis ie en la strato, vidante ke la trafiklumo estis ruĝa antaŭ mi. Tiam nekonata koreino, kiu promenis en la sama loko, montris al mi per sia mano, ke mi libere iru al la alia flanko de la strato, ĉar ne venas aŭtomobilo. Mi ankaŭ per miaj manoj montris al ŝi, ke mi ne povis iri, ĉar la trafiklumo estis ruĝa. Do, ŝi venis al mi, kaptis mian manon kaj amike tiamaniere kondukis min al la alia flanko de la strato.

Alia afero okazis en Osaka. Vespere je la 9-a horo mi ankoraŭ ne volis dormi, do mi decidis promeni dum duonhoro ĉirkau mia hotelo. Proksime de mia hotelo mi trovis stacidomon de subtera trajno. Tie mi rigardadis la mapon de la urbo Osaka por ke mi pli bone povu konatiĝi kun la geografio de la fama sudjapana urbo. Tiam nekonata juna japana viro vidis, ke mi rigardis la mapon kaj li pensis, ke mi volis vojaĝi ien kaj mi rigardis la mapon por trovi kiom da enoj mi devis enmeti en la aŭtomaton por aĉeti bileton por la subtera trajno. Li venis al mi, donacis al mi sian unutagan vojaĝbileton kaj diris al



mi en angla lingvo ke per tiu bileto (free card en angla lingvo) mi povas vojaĝi ie ajn en la urbo senpage.

La plej embarasiga afero okazis en la ŝipo, kiam mi revojaĝis el Osaka al Busan. Mi jam en la Osaka haveno rimarkis, ke koreino havante ruĝan vestaĵon kaj flavan ĉapelon, tro longe kaj amike rigardis min. Tiam mi pensis, ke tio estis memkomprenebla, ĉar verŝajne mi estis la sola eŭropano inter la centoj da la vojaĝantoj. Do mi pensis, ke pro tio mi estis interesa en la amaso de la vojaĝantoj, kaj pro tio ankŭ mi amikece rerigardis. Poste mi tute forgesis tiun aferon kaj kiam la ŝipo jam estis en la maro, mi supreniris al la plej supera ferdeko de la ŝipo por rigardi la japanajn marbordojn.

Mi estis sole tie, ĉiuj aliaj kunvojaĝantoj estis aŭ en siaj ĉambroj, aŭ en la lobio, aŭ en la kafejoj de la ŝipo. Tiam la koreino venis al mi kaj donacis al mi freŝe varmigitan kafon kun lakto kaj freŝe varmigita manĝaĵon nomitan takoyaki en japana lingvo. Ŝi ankaŭ donacis du kartojn sur kiuj ruĝkoloraj koreaj literoj estis presitaj kun kvar anglaj vortoj: *“I love Panstar Dream”*.

Por mi estis dilemo, ĉu mi akceptu la donacon aŭ ne, ĉar mi ne estis malsata kaj pro tio mi ne intencis manĝi la takoyaki-on. Alia problemo estis, ke mi sciis, ke en mia vivo mi neniam povis trinki kafon, ĉar post trinko de kafo kutime mi tute ne povis dormi dum la venonta nokto. Sed la koreino tre afable kaj bonkore donacis al mi la trinkaĵon kaj la manĝaĵon kaj pro tio mi tamen akceptis ilin kun danko kaj mi trinkis kaj manĝis ĉion.

Sed mi ne komprenis la korean tekston sur la kartoj, do mi montris ilin al la oficistinoj de la ŝipo. Ili informis min, ke tiuj kartoj estis kuponoj por ricevi vespermanĝojn en la restoracio de la ŝipo. Aŭdante tion, mi decidis, ke mi redonos la kartojn al la koreino, kiam mi denove renkontos ŝin en la ŝipo. Kaj mi klarigos, ke mi jam havis kuponojn kaj por vespermanĝo kaj por matenmanĝo. (Laŭ regulo, ĉiuj vojaĝantoj ricevas kuponojn kune kun la vojaĝbileto aŭtomate, kiam ili aĉetas la vojaĝbiletojn.) Do, mi faris tion kaj klarigis al ŝi la situacion. Bonŝance ŝi ne ofendiĝis, sed dum la venonta nokto mi tute ne povis dormi pro la forta korea (aŭ japana) kafo en la ŝipo.

Por rememori tiujn amikecajn orientaciajn homojn nun mi dediĉas ĉi tiun libron kun dankoj al s-ino Granda (Oh Gi Sook), al la nekonata japana juna viro en la Osaka stacidomo, al la ruĝan vestaĵon kun flava ĉapelo havanta koreino vojaĝanta el Osaka al Busan en la Panstar Dream ŝipo kaj al multaj aliaj amikecaj azianoj kiuj bonkore helpis min dum mia vojaĝo en la Malproksima Oriento.

Dum mia restado en Japanio kaj en Koreio mi ricevis tre bonajn impresojn. Mi kun ĝojo promenis en la stratoj de la modernaj japanaj urbegoj kaj mi ĝuis renkonti multajn afablajn homojn en Busan kaj ankaŭ en la belaj konstruaĵoj de la Ŭonbulisma Kulturcentro en Iksan, kie la etoso estis tre amikeca. Pro tio mi decidis revojaĝi al la Malproksima Oriento denove.

Tiel mi volonte akceptis la peton de prof-ro Lee Jungkee, ke mi prelegu en la ŭonbulisma fakkunveno en Hanojo dum la Universala Kongreso kaj ke mi denove ĉeestu la meditado renkontiĝon en Koreio. Do, mi baldaŭ revojaĝos al Iksan por studi pli profunde la budhismajn meditadojn teknikojn. Mia prelego por tiu evento troveblas en la venonta ĉapitro de ĉi-tiu libro. Do, ĝis revido, Japanio – ĝis revido, Koreio. Sayōnara Japan - Dashi bwayo Korea.



La Panstar Dream ŝipo en la Osaka haveno. La aŭtoro spertis, ke en Busan estis tre bonaj cirkonstancoj por la vojaĝantoj: troveblis vojaĝ-oficejoj, bankoj, restoracioj, ktp., sed li trovis neniun similan objekton en la japana havenurbo. Eĉ per publika buso aŭ trajno ne eblis vojaĝi al la ŝiphaveno.

## INTERNA HARMONIO KAJ EKSTERA PACO

Sotesano, la fondinto de la ŭonbulana religio intencis konduki siajn disĉiplojn al la Paradizo per pligrandigo de iliaj spiritaj potencoj, venkante la meterian potencon. Por fari tion la unua ĉefmajstro de la eklezio konstruis doktrinon de verreligia kredo kaj ellaboris specialan realmoralan trejnon.

Grava komponento de tiu realmorala trejnosistemo estas la ekzercado de la 108 riverencoj. Laŭ miaj spertoj la ĉiutaga ekzercado de tiu trejna metodo havas bonajn spiritan, mensan, fiziologian, moralan kaj socian efikojn. Eĉ se la ekzercanto de la trejna metodo ne kredas la budhisman doktrinon, farante la 108 riverencojn li tamen povas facile sperti tiujn bonajn efikojn. Direblas, ke en tiu kazo la menciitan trejnan metodon oni povas uzi kiel specialan fizikoterapion.

Nuntempe en la okcidenta mondo la homaro suferas pro multaj civilizaciaj malsanoj, kiun kaŭzas streso laŭ prof-ro d-ro Selye János, la fama hungara kuracisto kaj medicina esploristo. En la tridekaj jaroj de la dudeka jarcento li laboris kiel biokemiisto en la McGill Universitato en urbo Montreal kaj en 1936 li komprenis kaj malkaŝis, ke la kaŭzo de multaj malsanoj estas la tro alta nivelo de la malutila kaj damaĝa streso.

Laŭ la libro de Vincze János, profesoro de biofiziko en la Budapesta Medicina Universitato (serio numero: Biofiziko 26, titolo: Intersciencaj Fakteroj) la venontaj simptomoj povas esti kaŭzitaj per streso:

- vejnomsano, arteriomsano, alta sangopremo (hipertensio), tro alta aŭ tro malalta pulso (kororitmio-anomalio),
- kapodoloro, dorsodoloro,
- artrito kaj alia inflamo,
- astmo kaj ekstremnivela akrasenteco de la spira sistemo,
- imunsistema anomalio,

- ulcero de stomako, diareo, vomemo kaj vomado, ulcero de intesto,
- anomalio de la urinprodukta sistemo, difektita seksa funkciado,
- haŭtoinflamo kaŭzita de neurologiaj anomalioj,
- diabeto,
- laciĝeco, narkoteco, konduta anomalio, ekstremnivela apetito, malgajeco, depresio, sendormeco.

El tiu simptomolisto bone videblas, ke la malutila kaj damaĝa streso povas kaŭzi multegajn diverstipajn malsanojn kaj pro tio por la socio estas tre grava tasko protekti la loĝantaron kontraŭ tiu streso. Tio ne estas facile solvebla problemo.

En la dudekunua jarcento centmiloj da homoj vivas en grandegaj urboj kie ne plu eblas vivi en harmonio kun la naturo. Antaŭe, dum jarmiloj la plejmulto de la homaro vivis en vilaĝoj, aŭ en urbetoj, kie la loĝantaro persone konis unu la alian kaj ili produktis la agrikulturajn produktaĵojn por si mem. La kamparanoj kun siaj bestoj kune vivis en la farmoj kaj kultivis la teron kune kun la bestoj. Kvankam la vivkondiĉoj estis malfacilaj kaj la laboro estis tro laciga, tamen estis ia harmonio en tiu vivmodelo.

Nuntempe estas grandaj urboj en ĉiuj kontinentoj, kie pli, ol dek milionoj da homoj vivas. Antaŭ nelonge mi vidis en televida programo, ke en Seoul kaj en la ĉirkaŭaj najbaraj teritorioj vivas 25 milionoj da homoj, same kiel en Tokyo-Kawasaki-Yokohama, New York kaj ankaŭ en multaj aliaj urbegoj de la mondo. En tiuj urbegoj la homoj jam ne plu konas unu la aliajn persone kaj laŭ tradicio ne salutas kaj respektas la aliulojn, kiel estis kutimo antaŭe dum jarmiloj.

La pensmaniero kaj la vivmaniero de la homaro signifece ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj. En la okcidenta mondo dum du jarmiloj laŭ la kristana instruo la homoj pensis kaj sentis, ke siaj taskoj estis labori por la komunumo kaj servi la aliulojn. Oni aŭskultis tiun instruon

ĉiudimanĉe en la preĝejoj. Estas konataj la vortoj de John F. Kennedy, la amerika prezidanto: „*Don't ask what your country can do for you. Ask, what you can do for your country!*” (Ne demandu, kion via lando povas fari por vi. Demandu, kion vi povas fari por via lando!”

Nuntempe la pensmaniero jam estas malsama. La radiaj kaj televidaj programoj ekde frumateno ĝis nokto sendas mesaĝojn al la rigardantoj kaj aŭskultantoj, ke ne la komunumo, sed la individuo gravas. Per multegaj komercaj anoncoj oni permanente kuraĝigas la loĝantaron aĉeti pli multajn varojn, eĉ se oni ne vere bezonas ilin. Sekve de tio la egoisma pensmaniero disvastiĝas en la socia vivo kaj multaj homoj pensas, ke ili povas fariĝi pli feliĉaj, se ili estas pli riĉaj, do, se ili havas pli da profito. Estiĝis akra kaj kruela konkuro en la socio kaj la partoprenantoj de la konkuro permanente bataladas kontraŭ la konkurenco. Tiamaniere la loĝantaro de la alte evoluitaj industriaj lando fariĝis pli riĉa, la vivnivelo estiĝis pli alta, tamen la homoj ne fariĝis pli feliĉaj.



La aŭtoro diskutas la efikojn de la meditadaj teknikoj kun d-rino Farkas Julia, gvidantino de la Budapesta Medicina Esperantista Fakgrupo

Konstruante grandegajn urbojn oni detruis la naturon, malpurigis la aeron kaj la akvon kaj pro la disvastiĝo de la egoisma pensmaniero la krimfarado estiĝis signifa socia problemo en multaj lokoj. Pro la malutila kaj damaĝa streso multaj homoj suferas en nia epoko kaj en multaj landoj la civilizaciaj malsanoj kaj la sinmortigoj multnombriĝas. Tio estas grava socia kaj ekonomia problemo en multaj landoj, ankaŭ en mia lando, en Hungario. (Laŭ statistiko la relativa nombro de sinmortigoj en Hungario estas ekstreme alta jam dum multaj jardekoj.)

Por eviti tiujn problemojn estas bona metodo evoluigi la pensmanierojn de la homoj kaj ŝanĝi la egoisman pensmanieron, kiu nuntempe regas la socian vivon en multaj landoj. Laŭ miaj personaj spertoj la ĉiutaga ekzercado de la 108 riverencoj efike povas malaltigi la malutilan kaj damaĝan streson kaj povas rapide pligrandigi la spiritan potencon kaj konservi la korpon en bona, sana stato.

Je la komenco de la riverenca ekzercado naturaj sonoj de rivereto auskulteblas kun kantoj de birdoj. Tio rapide trankviligas la partoprenantojn de la ceremonio, se ili bone koncentras siajn pensojn al la esenco de la ceremonio. Farante la iomete lacigajn riverencojn, kiel gimnastikajn ekzercojn kaj pripensante pri la mesaĝo de la ceremonio la partoprenantoj povas kompreni la profundajn verajn valorojn de la homa vivo kaj iom post iom sentas, ke ili estas en pacaj, harmoniaj interrilatoj kun la ekstera mondo.

Dum la kvardekminuta ceremonio oni pensadas pri la pleneco, kompletco kaj integreco de la universo kaj pri la interrilato inter la partoprenanto kaj la ekstera mondo. La partoprenanto tiamaniere kultivas sin kaj komprenas, kia valora estas la vivo (ankaŭ sia vivo, kaj la vivo de ĉiuj aliuloj) kaj humiligante sin, li komencas respekti la vivon de ĉiuj estaĵoj kaj ankaŭ la tutan universon.

Unue oni pensas pri la celo de la vivo, do demandas, de kie oni venas, kaj kien iras. Meditante pri tio evidentiĝas, ke oni ricevis multan amon, helpon, spiritan kaj materian subtenon de multaj homoj, do necesas sincere danki pro tio al ĉiuj gepatroj, prapatroj,

instruistoj, gefiloj, edz(in)o, aliaj familianoj, amikoj, konatuloj kaj ĝenerale al ĉiuj homoj, kiuj sin amas kaj prizorgas. Pensante pri tio la partoprenanto de la ceremonio faras la riverencojn, aŭskultante la instruojn kaj la trankviligajn naturajn sonojn.

Oni pensadas pri tio kaj komprenas, ke eĉ al nekonatuloj necesas danki, pro ilia servo kaj laboro, do oni dankas ankaŭ al la nekonataj laboristoj, kiuj laboras en malbonaj laborkondiĉoj kaj al la agrikulturistoj, kiuj ŝvitas por produkti bonajn manĝaĵojn en la farmoj kaj la kampoj. Ĉi tiu fenomeno sperteblas ankaŭ en la kristanaj religioj, ekzemple dum la katolikaj diservoj oni ĉiam dankas pro tio kaj preĝas por la aliuloj, sed ne tiel komplete por la tuta homaro kaj por la tuta universo.

Je la komenco de la ceremonio la partoprenanto detale analizas, kiu li (ŝi) estas, serĉas sian veran spiriton, komprenas, ke sia korpo kaj animo estas altvaloraj, preĝas por la sanoj de sia korpo kaj animo kaj por akiri saĝon, per kiu li scipovas sin mem serĉi, trovi kaj regi. Komprenante tion li konkludas, ke sia hodiaŭa ĉi-tiea vivo estas altvalora kaj modeste kaj humile riverencas pro la mirindeco de sia vivekzisto. Li rememoras, kiom multe li amas sin mem, sentas, ke sia amo estas ĝuste sia interna vivo kaj pro tio li riverencas, por ke siaj familianoj ĉiam amu unu la alian, por ke oni spertu la forton de amo kaj la kreskon de ĝojo, por ke oni serĉu ĝojon nur en amo kaj por ke oni sciu, ke amo trafluas la tutan universon.

Rilate tiun ideon denove evidentiĝas, ke estas profunda simileco en la instruoj de la kristana kaj la budhisma instruoj. Antaŭ unu jaro dum la 7-a Internacia Renkontiĝo de Meditado ĉi tie en Iksan mi jam prelegis pri tio kaj klarigis, ke laŭ Jesuo Kristo la plej grava leĝo (en latina: *mandatum magnum*) por la homaro estas

- Ami, respekti kaj adori Dion, la Kreanton de Ĉiuj Estaĵoj tutkore, tutanime kaj tutmense.
- Ami kaj respekti ĉiujn aliajn homojn en la mondo, same, kiel homo amas sin mem.

Post la pripensado de tiuj dilemoj de vivo la partoprenanto de la

riverenca ceremonio fokusas al pli profundaj filozofiaj temoj. Li pensas, ke la fonto de sia vivo kaj la origino de ĉies vivo de la universo vivas en si mem, kaj laŭ tio li scias kaj kredas, ke ĉiuj prapatroj kaj spiritoj ĉiam vivas ĉi tie en si. Komprenante tion, li petas pardonon de ĉiuj homoj, kiujn li vundis. Ankaŭ tiu agado okazas ĉiudimanĉe en ĉiuj kristanaj diservoj kaj en la katolika kaj en la protestantaj eklezioj.

Sekvante la dankesprimon pro la vivo, la penton pro la kulpoj kaj la pardonpeton, la partoprenanto votas pliboniĝon kaj riverencas por ke li ne faru malbonaĵon por si mem kaj por ke li estu nek tro fiera pri sia avantaĝo, nek malnobliĝanta pro sia malavantaĝo. Poste li promesas malkaŝi la bonojn de aliuloj kaj kaŝi iliajn kulpojn. Li riverencas, por ke li ne rivelu gravajn aferojn al aliuloj kaj por ke li ne havu venĝemon kaj koleremon al ili. Rilate al la aliuloj li promesas diri nur la veron.



Komencante la ekzercadon de la meditadaj teknikoj oni pensadas pri la signifeco kaj valoro de la vivo



La partoprenanto deklaras en penso, ke li ne esperas facilan plenumiĝon de sia laboro, ne esperas, ke aliuloj obeas lin laŭ lia volo kaj li bone scias, ke la vivo havas multe da malfacilaĵoj. En la okcidenta mondo mi trovis du dirojn, kiuj havis similajn signifojn. En Honolulo, la ĉefurbo de Havaii oni vendis en la merkato la venontan diron, skribite sur ligno:

*DIO DONIS AL NI*

*LA FORTON, por ke ni ŝanĝu ĉion, kion ni povas ŝanĝi,*  
*LA PACIENCON, por ke ni toleru ĉion, kion ni ne povas ŝanĝi, kaj*  
*LA SAGĜECON, por ke ni povu rekoni: kion ni povas, kaj kion ni ne*  
*povas ŝanĝi.*



Dum la ekzercado de la 108 rivenecoj la partoprenantoj kultivas siajn korpon kaj spriton. La korekta spirado estas grava parto de la ceremonio.

La alian diron mi trovis en Eŭropo. En la Eŭropa kulturo estas konate, ke en la antikva Greka historio Itaka estis rigardite, kiel feliĉa utopia lando kaj la vivocelo de multaj grekaj homoj estis vojaĝi tien, en la landon de feliĉeco. (Itaka do estis simbolo de feliĉeco.) Komprenante tion, bonvola patro kuraĝigis sian filon jene:

*„Leviĝu, kaj ekiru al Itaka!*

*Ne hastu, sed rigardu kaj vidu!*

*Ne supozu, ke Itaka riĉe bonvenigos vin!*

*Itaka estas neniu alio, sed tio estas la vojaĝo mem (al Itaka).*

*Gravas nur, kio vi fariĝas dum via vojaĝo.”*

La vera signifo de tiu alegoria diro montras, ke la celo de la homa vivo estas la trovo de feliĉo. Do, atingi la celon, oni devas vojaĝi al Itaka, la lando de feliĉeco. Sed la alveno al Itaka tamen ne sufiĉas por trovi veran feliĉecon. En tiu senco ne gravas, ĉu oni alvenas al Itaka, aŭ ne, sed gravas nur, kiel oni evoluas dum sia vivo (En tiu senco la vivo estas simbole la vojaĝo al la lando de feliĉeco). Sekve de tio, se oni efike kultivas sin dum sia vivo kaj se oni pligrandigas sian spiritan kaj mensan potencon, komprenas la veron kaj vivas en harmonio kun la ekstera mondo, tiam oni atingas feliĉecon.

El tiu alegoria diro kompreneblas, ke la celo de la homa vivo estas la serĉado de feliĉeco, do oni devas vivi tiel, ke ĉiu momento estu la plej bona tempo en la vivo. Por tio oni faras la sekvantan riverencon en la ceremonio. Poste oni votas, ke nepre rekomencas eĉ pro eta bonfaro, vivas ĉiam juste en la mondo, ne ignoras justecon pro egoismo, ne estas tro avara al aliuloj, ne insidas kontraŭ aliuloj por sia intereso kaj pensadas pri la bonŝanca deziro gajni pli grandan profiton per malgranda spekulajo.

La partoprenanto komprenas, ke necesas kreskigi la forton por deteni sin de ĉiuj avidoj, deziras, ke la valoro de vivekzisto ne enfalu en sklavecon al materio, ekkonas, ke alkroĉiĝo al siaj propraĵoj povas kaŭzi suferon kaj konkludas, ke pro sia malsaĝo li povas enfali en la kavon, kiun li mem elfosis kaj baraktis. Por eviti tion li promesas

kreskigi la forton de saĝo por ne esti malkuraĝa kaj malnobla. Li venkas kolereemon per toleremo por povi fari bonon, ne malrespektas malfortulojn per ligo kun fortuloj, ĉefigas honeston sen flato kaj riverencas por fariĝi homo, kiu estas justa kaj honesta pli al si mem, ol al aliuloj.

Li pensadas, kaj komprenas, ke feliĉo, malfeliĉo kaj avido estas en sia menso, scias, ke feliĉo ne estas donata de aliuloj, sed kreata de si mem, kaj ke ordinarajaĵo estas altvaloraĵo. Laŭ la pripensado li rekonas, ke alkroĉiĝo al pasintaĵo estas malutila, same kiel troa zorgado pri la estonteco kaj konkludas, ke liberiĝo de ĉiuj posedaĵoj malgraŭ posedo estas dezirata.

En tiu punkto denove evidentiĝas, ke estas profunda simileco en la orienta ŝonbulana kaj la okcidenta kristana pensmanieroj. Estas miloj da kristanaj monaĥejoj kaj centmiloj da monaĥoj kaj monaĥinoj tra la mondo, kiuj vere liberiĝis de ĉiuj posedaĵoj malgraŭ posedo kaj tiamaniere vivas sian vivon en feliĉeco, servante la aliulojn. La plej bona ekzemplo de tio estas la vivo de Patrino Tereza en Kalkuto, kiu ricevis Nobel-premion kun multegaj monoj, tamen ŝi liberiĝis de tiu mono kaj ofertis la tuton por aĉeti manĝaĵon por la malriĉuloj kaj por konstrui kuracejon por la malsanuloj.



La ĉeestantoj de la meditado riverencas en la budapeŝta renkontiĝo

La partoprenanto de la medita ceremonio pensadas kaj scias, ke sin pacigas pacienco kaj ke pento estas ĉefaĵo. Ankaŭ tio estas grava parto de la kristana diservo, do ankaŭ en la katolika diservo oni ripetas tiujn vortojn ĉiusemajne en la sankta meso. Estas interese, ke en ambaŭ religioj, do kaj en la ŭonbulana kaj en la kristana oni rekonis kaj agnoskis, ke la saĝo, aŭ la vero povas liberigi la homaron. „La vero liberigos vin” legeblas en la Biblio kaj ankaŭ en la ŭonbulana religio estas devo de la religianoj la serĉado de la vero celante atingi saĝecon. Pro tio ankaŭ en la 108 riverencoj oni pensadas pri la esenco de la vera vivo kaj riverencas por akiri liberecon per saĝo.

Post la riverenco por tio la partoprenanto deklaras en penso, ke li volas fariĝi mastro de menso anstataŭ postkuri ĝin, promesas diligente kultivi sin, dankas pro malfacilaĵoj, kiuj sin fortigas, konservas la komencan puran menson malgraŭ tempofluo, preĝas en la menso plena je dankoj al ĉio, dankas pro la povo trovi sin en silento, deziras havi altvaloran purecon por solidigi sian vivon, riverencas por malriĉuloj, kiuj malfacile vivas pro malriĉo kaj por divido kun aliuloj, senkonsidere al tio, ĉu li havas multe aŭ malmulte.

Farante la riverencojn oni komprenas, ke la mondo estas plena kun malfacilaĵoj, estas multaj homoj kiuj suferas pro diversaj kialoj: malriĉeco, malsaneco, ktp., kaj ankaŭ la terglobo malsaniĝas pro malpurigo de la naturo, kiun okazas la malsaĝa agado de la homaro. Pro tio oni riverencas ankaŭ por la handikapuloj, kiuj havas klaran kaj puran animon, por memvola malriĉo malgraŭ ĝuebla riĉo, por modesteco, kun kiu oni humiligas sin sidante en malalta loko, por cedemo, kun kiu oni ĉiam pli konsideras aliulojn, ol sin mem.

La partoprenanto pensadas, ke la terglobo kaj la naturo malsaniĝas, konscias, ke ĉiuj homoj kaj ĉiuj estuloj de la terglobo vivas en la sama komunumo, preĝas por la vivuloj detruitaj kaj turmentataj pro homa avido, deziras, ke la malsaniĝanta ekosistemo resaniĝu, aŭskultas sonon de la vivo, je kiu ĉielo kaj tero planas kaj luminiĝas rekonante, ke la vivo estas ritmo de animo.

Pensante pri tio oni ekscias, ke la vivo estas objekto de amo kaj

sopiro, sentas, ke spirito puriĝas pro sono de pura riverakvo, dankas pro la povo aŭdi belan kaj klaran birdosonon, lasas sian korpon al freŝa vento kaj dankas pro la povo spiri puran aeron. Poste oni riverencas al la sovaĝaj floroj, kiuj ĉiam en sia loko sentigas al si belecon, al montoj kaj kampoj, kiuj silentas brakumante dekstron kaj maldekstron kaj dirante per vento kaj neĝo kaj ankaŭ al la tero, kiu ĉiam vivigas ĉiujn plantojn kaj estulojn.

Oni dankas al la ĉielo, kiu kreskigas ĉiujn vivulojn, deziras sian pacon kaj sopiras pacon kun ĉiuj vivuloj. La partoprenanto riverencas por paco de siaj kunvivantaj najbaroj, por paco inter regionoj sensence dividitaj, por paco inter ŝtatoj batalantaj pro politikaj interesoj, por paco inter ĉiuj religioj de la mondo, por paco inter vivantoj kaj mortintoj, por paco inter homo kaj la naturo kaj por paco de menso plena je ilumiĝo.



Partoprenantoj de la Meditada Renkontiĝo en Iksan kun la Ĉefmajstro

Oni preĝas ankaŭ por manpremo inter havuloj kaj senhavuloj, por manpremo inter sanuloj kaj malsanuloj kaj por manpremo inter lernintoj kaj nelernintoj. La partoprenanto riverencas por la vivo perdinta sian originan aspekton pro malluma ombro, akceptas modeste ĉiujn karmojn kaŭzitajn de si, dankas al homoj, kiuj amas kaj prizorgas sin, dankas pro ĉiuj bonoj kaj belaĵoj, kiujn li ĝuas, kaj dankas ankaŭ pro la mirindeco de sia vivekzisto kaj pro la senĉesa naskiĝo de novaj vivuloj. Fine oni riverencas por si mem, kiu entenas ĉi ĉion, komprenante ke estas unu universo, kaj sentante, ke li estas altvalora vivulo en tiu universo.

Tiamaniere la kvardekminuta riverenca ceremonio finiĝas kaj poste estos silento en la ceremonia ĉambro. Nur mallaŭta sono de monteta riverakvo aŭskulteblas kun kanto de birdoj. Farante la 108 riverencojn la korpo de la partoprenanto iomete laciĝas kaj pensante pri la menciitaj multaj profundaj filozofiaj temoj li komprenas la veran lokon de sia vivo en la universo. Tiel lia animo plipuriĝas kaj ankaŭ lia spirito pligrandiĝas.

## **Konkludoj**

1. La ĉiutaga ekzercado de tiu trejna metodo havas bonajn spiritan, mensan, fiziologian, moralan kaj socian efikojn.
2. La kvardekminuta farado de la 108 riverencoj havas similan efikon, kiun farado de gimnastiko havas, do konservas la korpon en bona sana stato. Pro tio eblas konkludi, ke tiun trejnan metodon oni povas uzi kiel specialan fizikoterapion.
3. Aŭskultante la sonon de la naturo, la sonon de la riverakvo kaj la monotonajn instruojn rilate al la pripensendaj temoj la partoprenanto trankviligas sin kaj malaltigas la malbonan kaj damaĝan streson. Tiel oni povas eviti la estiĝon de multaj civilizaciaj malsanoj, kiun malbona kaj damaĝa streso kaŭzas, pro kiu centoj da milionoj da homoj suferas en la nuna mondo.
4. Ripetante la moralajn instruojn la partoprenanto povas ŝanĝi sian pensmanieron, purigi sian animon kaj altigi sian

moralan nivelon. Komprenante la instruojn oni kondutas pli modeste, alte taksas la valoron de vivo kaj fariĝos pli feliĉa homo en la socio. Tio estas la individua avantaĝo de la ekzercado de tiu trejnometodo.

5. Krom la avantaĝo por individuoj la ekzercado de la 108 riverencoj havas avantaĝojn ankaŭ por la tuta homa komunumo. Se la membroj de la socio estas pli moralaj, tiam la krimfarado malgrandiĝas, la medio kaj la naturo plipuriĝas, la ekonomia evoluo plirapidiĝas kaj la internaciaj rilatoj fariĝas pli pacaj. Pro tio estus dezirata uzi tiun metodon de sinkultivo ne nur en la ŭonbulana religio sed ankaŭ en aliaj socioj kaj en la orienta kaj en la okcidenta mondo.



Supre: modernaj konstruaĵoj en la koreaj urboj kaj vilaĝoj.  
En la venonta paĝo: arta objekto, donaco de la Granda Dharma Majstro de la Ŭonbulisma Eklezio al la aŭtoro. La signifo de la vortoj:

*„Kun saĝaj okuloj,  
Kun pasio je publika utilo  
Vi estu honesta gvidanto!”*

Tiamaniere oni instruas la partoprenantojn de la meditataj renkontiĝoj por ke ili fariĝu pli perfektaj homoj. La mondo estus certe pli feliĉa, se la homaro en ĉiuj landoj obeus tiun instruon.





聖眼을 가추고  
 公蓋에 열정을  
 正直한 지도자

九七年 直  
 翰山





# ENHAVO

Antaŭparolo al la korea eldono .....	4
Antaŭparolo al la originala eldono .....	6
Enkonduko .....	9
STUDENTA VIVO EN JAPANIO .....	12
1. Helpe de stipendio „Verda Stelo” en japana universitato .....	13
2. La Granda Lernejo en la Sudaj Montetoj .....	19
3. Bambudanco kaj dramoj en la sanktejo .....	25
4. Rigardo malantaŭ la „Ĉielan Harmonion” .....	33
5. Semajnfinaj invitoj kaj tralandaj vojaĝadoj .....	39
6. Senlaboreco kaj kurioza psikoterapio .....	45
7. Indianoj de la Ekstremoriento .....	52
8. Fleksiĝemo de la bambuo kaj la tao-filozofio .....	58
EVENTOJ EN EŬROPO .....	63
1. Stulteta ĵurnalisto kaj azena amo .....	64
2. Mia agado dum la komunismo .....	67
3. Post la politikaj ŝanĝoj .....	71
4. Kanoniza procedo en urbo Roma .....	75
5. Vizito de aziaj vojaĝantoj en Eŭropo .....	79
6. Ponto inter popoloj kaj kulturoj .....	82
POST TRIDEK JAROJ .....	84
1. Tagmanĝoj kun emiroj kaj sultanoj .....	85
2. Ansera hepataĵo post ansera hepataĵo .....	88
3. Elekto kaj erekto .....	93
4. Vilaĝaj komunumoj en Hungario .....	98
5. Impresoj de la meditata renkontiĝo .....	110
6. Post tridek jaroj .....	115
7. Thirty years later .....	121
8. Sayōnara Japan, Dashi bwayo Korea .....	125
INTERNA HARMONIO KAJ EKSTERA PACO .....	130

La aŭtoro de ĉi tiu libro studis en japana universitato je la komenco de la okdekaj jaroj kaj pri siaj studentaj travivaĵoj kaj spertoj li verkis multajn artikolojn por diversaj eŭropaj kaj aziaj ĵurnaloj. Tiuj verketoj estas reaperigitaj en la unua parto de la libro. Per tiuj verketoj la legantoj komprenas kiel eŭropa studento sentis sin en la ekzotika orientazia lando kaj kiel li vidis la socian vivon en la Lando de la Leviĝanta Suno.

Dum la lastaj jardekoj ankaŭ mi laboris en diversaj aziaj landoj kiel diplomato. Tiel mi bone komprenis, ke la studado de la aziaj lingvoj efike helpas la homojn por kompreni la pensmanieron kaj la vivmanieron de la aziaj popoloj. Dum lia studprogramo en Japanio Márkus Gábor sukcese studis ne nur la parolatan japanan lingvon sed ankaŭ la komplikan ĉinan skribosistemon. Pro tio li pli profunde komprenis la malnovan riĉan kaj valoran kulturen tradicion de la orienta mondo, ol la eŭropaj kaj amerikaj turistoj kiuj nuntempe amase vizitas tiujn interesajn kaj ekzotikajn landojn.

Post tridek jaroj Márkus Gábor revojaĝis al Orienta Azio kaj vizitis Koreion kaj Japanion, la du plej alte evoluitajn industriajn landojn de Azio trans la Flava Maro. En la dua parto de la libro li verkas pri siaj novaj spertoj. Tiuj verketoj havas multkolorajn vojaĝraportojn, interesajn informojn pri la historio, kulturo, ekonomio, arto, religio kaj la socia vivo de la Malproksima Oriento. La aŭtoro tre ofte komparas la eŭropan kaj la azian situacion kaj laŭ profunda analizo konkludas, kiel ekonomia kaj socia krizo estis en multaj okcidentaj landoj, kiam en Orienta Azio oni konstruis samtempe riĉajn kaj rapide evoluantajn modernajn sociojn konservante ankaŭ la tradiciojn.



*Nanovfszky György*

Dr. Nanovfszky György  
ambasadoro de Hungario  
en urboj Moskva, Jerevan, Tbilisi,  
Baku, Taskent, Ashabad kaj Singapuro

**ISBN 978-963-08-3761-3**